REGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

87/4. 16,- Ft

HUNGARA VIVO

FARIĜU ANKAŬ VI
NIA KOMERCA PARTNERO!



La plej granda komerca entrepreno de Transdanubio

NIA VARLISTO:

— Dommastrumaj kaj kuirejaj aparatoj
— Laboriloj, malgrandaj maŝinoj
— Ĝardenaj aparatoj
— Hejtaj kaj kuiraj aparatoj
— Artikoloj por instalado de banĉambroj
— Aparatoj de telekomunikado
— Elektraj dommastrumaj maŝinoj
— Bicikloj, motocikloj

FERROVILL

Komerca Entrepreno
H-9021 GYŐR
Gorkij u. 21.
Telefono: 16-022
Telekso: 024241

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Rados, P. A.: En centro de la hungara turismo 122
Révész, S.: Timoj, faktoj kaj esperoj pri Hungario I. 125
Szenes, I.: La saĝa realismo kaj la diabla cirklo. Intervjuo kun akademiano József Herman 129
Haszpra, O.: Esperanto kaj la scienc-teknika revolucio 132
Hungara poezio 133
Gergely, M.: Fratino Gioconda *(Imre Szabó)* 134
Panoramo 140
De partemento Győr-Sopron 142
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 143
Paĝo de komencantoj 144
Tóth-Máthé, M.: Tiel estas multe pli ekscite *(István Takács)* 145
Moldova, Gy.: Historioj pri la dogano *(d-ro István Nagy)* 146
Unu poemo – en du tradukoj 147
Petelei, I.: Kamparana honto *(Jozefo Kiss)* 148
Avar, P.: Moderna koncepto en la medicino 152
Recenzoj 154
Golden, B.: Finnugristoj-esperantistoj 157
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 158
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 159
Leterkesto, Korespondi deziras 160

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 1-3.
Telefono: 563-659, 564-093
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXVIIa jaro, 1987 n-ro 4
(134)

La foto sur la frontpaĝo...

prezentas la konstruaĵon, en kiu estas la nova sidejo de Hungara Esperanto-Asocio. La nova sidejo – kun sia 470 kvadratmetra areo – certigas ne malŝatindajn kondiĉojn por la laboro de HEA, sekve oni povas diri, ke la dua centjaro de Esperanto startis bone en Hungario. El la raportaĵo sur la sekvaj paĝoj oni povas informiĝi pri tio, ke HEA posedas ankaŭ aliajn ejojn (librovendejon, deponejon, presejon), do, verŝajne ĝi estas inter la plej bone provizitaj landaj asocioj de la mondo.

En tiu ĉi numero ni komencas aperigi la artikolserion de Sándor Révész, *kiu revuas la nunan ekonomian kaj politikan situacion en Hungario. Certe ĝi ne estas legaĵo facila, sed tiuj, kiuj* vere *interesiĝas pri la nunaj hungaraj realaĵoj, nepre legu ĝin.*

Eksperimente ni aperigas ĉi-numero du pli longajn rakontojn – ni ŝatus ricevi reagojn, ĉu oni volonte akceptas tiajn, aŭ preferus trovi nur kurtajn legaĵojn sur la paĝoj de nia revuo? Same ni atendas la opinion de niaj legantoj koncerne la aplikadon de la malpli grandaj litertipoj. Tio ebligas al ni aperigi pli da materialoj, sed ni ne scias, ĉu la malgrandaj literoj ne forpelas la legemon de niaj abonantoj?

Literaturamantoj trovos en tiu ĉi numero krom la pli longaj rakontoj ankaŭ du malpli longajn, humurajn pecojn kun ilustraĵoj, poemojn tradukitajn el la hungara, kaj recenzojn.

Tiu ĉi numero atingos la plej multajn el niaj abonantoj, kiam ili revenos el la Jubilea Kongreso, plenaj de entuziasmo. Ni nepre konsilas en tiu momento legi la intervjuon, faritan kun József Herman, *direktoro de la Lingvoscienca Instituto de la Hungara Akademio de Sciencoj. Liaj esence simpatiaj, sed sobrige-amarige realismaj vortoj devas pripensigi nin: ĉu ni havas ŝancojn por la „fina venko", kaj se ne, kiel ni re-formulu nian strategian celdifinon? Jen demando, kiun alfronti ni ne povas eviti sojle de la dua centjaro.*

Por fini optimisme tiun ĉi enkonduko, mi atentigas pri la relanĉo de la rubriko „Paĝo de komencantoj", en kiu ekde nun aperos po du rakontoj: la unua (ĉiam diklitera) kun la uzo de la vortoj de la unuaj tri, la dua (normallitera) kun la utiligo de la unuaj kvin oftecgrupoj de la Baza Radikaro Oficiala. Akiru tiu rubriko multajn novajn adeptojn por la Internacia Lingvo!

EN CENTRO DE LA HUNGARLANDA TURISMO

Pri la nova sidejo de HEA

Se esperantisto foliumas la Jarlibron de UEA, li trovas en ĝi plurajn dekojn da landaj asocioj, fakaj societoj ktp. Tamen la popularecon de Esperanto oni ne povas nomi bona. Multaj el ni memoras la vortojn de la Brita ĉefministrino, kiu antaŭ kelkaj jaroj parolis pri la „malsukceso" de Esperanto. (Temas pri lando, en kies parlamento onidire agadas relative granda grupo – „lobby" – de deputitoj favora al la Internacia Lingvo.) Pasintjare princo Claus, edzo de la Nederlanda reĝino, diris pri Esperanto en intervjuo, donita al hungara revuo: „kondamnita al morto". Oni ne forgesu: parolis edzo de ŝtatestrino de tiu regno, kiu donas hejmon al la plej grava organizo de la internacilingva movado, Universala Esperanto-Asocio. El tio sekvas: niaj lingvo kaj movado malgraŭ ĉiuj klopodoj kaj relativaj sukcesoj havas malbonan propagandon, malaltan gradon de popularec0.

Kial mi parolas pri tio ĝuste koncerne de la nova sidejo de la Hungara Esperanto-Asocio? La motivo estas, ke la unuan (povas esti, ke anka- la lastan) fojon en la historio de nia movado okazis, ke landa asocio pro la feliĉa koincido de kelkaj hazardoj ricevis lokon ĉe la plej grava punkto de turismo de la koncerna lando.

La nova adreso de HEA estas: Budapeŝto, la distrikto, placo Szentháromság (de Sankta Triunuo) 1-3. Ĝi situas en la centra punkto de la Fortikaĵo de Buda (Budaburgo). Eble por kelkaj legantoj povas esti strange, ke en lando, estrata de komunista partio, placo havas religidevenan nomon. La klarigo: en la centro de la placo staras barokstila memoraĵo al la Sankta Triunuo, kiun starigis pro danko la urbanoj, restintaj ĉi, kaj aranĝi la ejojn tiel, ke ĝi povu esti vivaj post la pesto, kiu mortigis grandan parton de la loĝantaro en la Orient-Eŭropaj urboj en la komenco de la 18a jarcento. Similajn monumentojn oni trovas en preskŭ ĉiuj malnovaj urboj de Aŭstrio, Bohemio, Moravio, Hungario. La Buda-an „pesto-kolonon" faris majstroj Antonio Hörger kaj Filipo Ungleich de 1710 ĝis 1713.

La alia famega konstruaĵo de la placo estas katedralo de la Sankta Virgulino, alinome „Preĝejo de Matiaso". La gotika adorejo komencis esti konstruita en 1255 laŭ la ordono de la reĝo de Hungario Béla (Adalberto) la 4a, kaj la konstruado finiĝis en la tempo de Matiaso Korvino, reginta ĉe la fino de la 15a jarcento. La multevidinta, suferinta konstruaĵo, kiu de 1541 ĝis 1686 estis ĉefmoskeo de la turkaj okupantoj, ricevis la hodiaŭan formon en la fino de la pasinta jarcento. Laŭ la projektoj de Frigyes Schulek ĝi estis rekonstruita de 1873 ĝis 1896.

La tria famaĵo de la placo estas la iama urbodomo de Buda, kies konstruadon komencis en 1692 Venerio Ceresola kaj finis en 1774 Matiaso Nepauer. Antaŭ ĝi en niĉo sidas la statuo de Minerva (Atena) kun la malnova blazono de Buda (ĝis 1873 Buda kaj Peŝto estis apartaj urboj): pordego kun tri turoj. La statuo estas kopio de la originalo de Carlo Amati; la skulptaĵo nun troviĝas en la konstruaĵo de la Ĉefurba Konsilio, trans la Danubo, en la urboparto Peŝto.



La pompa novgotika antauhalo

La plej „nova" konstruaĵo de la placo estas la iama Ministerio de Financoj, projektita de arkitekto Sándor Fellner, konstruita de 1901 ĝis 1904 en novgotika stilo. Tial ĝi harmonias kun la apuda Matias-preĝejo.

En tiu ĉi granda domo kune kun aliaj instancoj ricevis lokon la centro de Hungara Esperanto-Asocio. „Kiel ĉio ĉi komenciĝis?" – mi demandas la sekretarion de HEA, sinjoron Oszkár Princz.

„La afero ekiris antaŭ dek jaroj – li rakontas. – La 120 kvadratmetra ejo en la strato Kenyérmező montriĝis malgranda por la centra oficejo de Hungarlanda Esperanto-movado. Tiun sidejon ni ricevis en la jaro 1966, kiam okazis la 51a UK en Budapeŝto. (Antaŭe la Asocio havis du

En la sekretariejo: la ĉarma sekretariino antaŭ la nova kopiilo

malgrandajn ĉambretojn en la Petőfi Sándor-strato, kaj kompare al tiuj la nova loko signifis grandan paŝon antaŭen.) La centro estis tie pli ol 20 jarojn, kaj dum la movado kaj ĝia agado pli kaj pli kreskis, la ejoj restis la samaj, tute nesufiĉaj. La multjara provado ĉe la konsiliaj, ŝtataj kaj partiaj instancoj akiris principan subtenon, sed ne rezultigis ricevon de nova sidejo. En la jaro 1985 ano de la tiama Estraro turnis sin al unu el la sekretarioj de la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio. La tiama vicprezidanto kaj ĉefsekretario de la Asocio same traktis kun la sekretario, kiu ne nur promesis, sed ankaŭ donis efektivan helpon. Tio kaŭzis, ke komisiono pri lokigo de Budapeŝtaj oficejoj ofertis kelkajn ejojn por ni. Tiuj aŭ ne konvenis, aŭ jes, sed en la lasta momento tiun konvenan kaptis antaŭ ni alia instanco.

Finfine ni ricevis grandan parton de la unua etaĝo de tiu ĉi iama Ministerio en la Burgo, kiu konstruaĵo dum multaj jaroj post 1945 servis kiel studenthejmo de la Budapeŝta Teknika Universitato. Ĉi tie ni havas 470 kvadratmetran aeron, 15 salonojn kaj vastan koridoron (unu trionо de la areo), kiun ni povos uzi kiel babilejon, legejon de gazetoj ktp. (Mi memorigas, ke en la antaŭa loko ni havis 120 kvadratmetrojn.) La koridoro povos servi ankaŭ kiel ekspoziciejo, kiam estos finita sur la muroj la lokigo de siaspecaj reloj, kiajn havas ankaŭ muzeoj, galerioj por pendigi bildojn.

Ĉi tie ni povos aranĝi ekspoziciojn pri diversaj temoj, eblos dekori la koridoron per la pentraĵoj de Hugo Landheer, kiujn la Nederlanda artisto donacis al nia Asocio en 1982.

Se oni iras laŭ la vico de la salonoj, unu apud la alia oni trovas kabineton de la prezidanto kaj ĉefsekretario, la sekretariejon, kiu konsistas el la akceptejo (laborejo de mia sekretariino) kaj la kabineto de la sekretario, tio estas de mi – klarigas Oszkár Princz. – Tiĉambran blokon okupas la oficejoj pri mastrumado: Laborejo de la ekonomia gvidanto, tiu de la librotenisto – en la sama salono funkcias la perkomputila administrado de la anaro de HEA –, tiu de la kasisto. En la sekvaj salonoj laboras la organiza sekretario kun siaj kunlaborantoj, apude situas la kabineto de la redakcioj: Hungara Vivo, Budapeŝta Informilo kaj la hungarlingva Világ és Nyelv (Mondo kaj Lingvo). Ili ricevis unu ĉambron, kiun ili povos uzi alterne.

En la apuda salono laboras la komputiloj. Ĉi tie funkcias la Terminologioa Sekcio de UEA, kie nun okazas la kompostado de la aperonta Hungara-Esperanta Vortaro. La sekva salono estas kabineto de la vicprezidantoj, oportuna ankaŭ por aranĝi malpli grandajn kunvenojn.

Sekvas la biblioteko, poste la kabineto de la referento pri turismo, la salono de la komisionoj, kie povas kunveni eĉ 25-30 personoj. Ĉi tie funkcios laŭ la planoj la Centra Lingvolernejo de HEA, gvidota de la referento pri instruado, kies laborejo jam estas tie.

Tio estas la nuna situacio. En la sekva tempo ni devos fari ŝanĝojn, ĉar post iom da tempo la Asocio aĉetos la faman bibliotekon de Károly Fajszi, estantan sub ŝtata protekto. Ne havante alian ejon lokigi ĝin, ni devos la bibliotekon transporti tien ĉi, kaj aranĝi la ejojn tiel, ke ĝi povu esti en ili. Tio kaŭzos por ni multe da klopodoj, tamen HEA post tio posedos grandvaloran informejon pri la Internacia Lingvo kaj ties kulturo" – finas la rakonton la sekretario.

Al la demando „Ĉu ni havas aliajn ejojn?" Oszkár Princz respondas jese. Evidentiĝas, ke la Asocio konservis sian librovendejon (oficiale: informan kaj kulturan servon), grandan parton de la deponejo en la Kenyérmező-strato, same la kelon en la strato Péterffy, kie ni planas organizi junularan klubon. Krom tio en la kelo de la iama Ministerio de Financoj HEA posedas 100 kvadratajn metrojn. La originala plano estis transporti tien ĉi la presejon de la Asocio. Sed tio kostus tro multe, kaj funkciigi produktejon en artmonumento, en kies ĉirkaŭaĵo por veturiloj malpermesitas halti, estus iom komplike. Nun HEA strebas rezigni pri tiu areo, kaj konservi sian presejon en la strato Mészáros, kie ĝi situas de la jaro 1983.

Kio koncernas la meblaron – tio estas aparta problemo. En tiom multe da salonoj estas bezonaj multe da diversaj mebloj, kiuj kostas. Tamen la Asocio jam povis kaj espereble povos ricevi de diversaj entreprenoj kaj instancoj meblojn, kiujn ili pro iuj kialoj jam ne bezonas, sed ni povas ilin ankoraŭ bone utiligi.

Forlasante la belan gotikstilan konstruaĵon mi longe admiras la artmonumentojn, situantajn apude en la plej malnova parto de la hungara ĉefurbo. Apud mi ĉe la Triunu-kolono fotas unu la alian japanaj

La kompostistino Ildikó Mészáros



Laboras László Berényi, la enpaĝigisto



La presisto Endre Simkó, kiu presas ankaŭ Hungara Vivo

gejunuloj, grupo de Sovetiaj turistoj eniras la Matias-preĝejon, ĉe la hotelo Buda-Hilton, situanta en la strato, komenciĝanta ĉe la placo Szentháromság, haltas taksioj. El ili eliras usonaj vizitantoj de Hungario. Mi memoras la fotojn el la gazetaron kiuj montris la Britan, la Ĉinan ĉefministrojn, la ĝeneralan sekretarion de KPSU, kiuj eliris el la aŭtomobilo ĝuste ĉi tie, por iri al la Fiŝista Bastiono (elvidejo situanta proksime) por admiri la panoramon de Budapeŝto.

Tiu ĉi loko, la placo de la Triunuo, estas tiu parto de Budapeŝto, kiun vizitas fakte ĉiu gasto de Hungario, veninta en Budapeŝton. Kiam estos preta la tabulo de nia Asocio, ĉiu el ili povos legi la vorton „Esperanto". Tiamaniere, la nova sidejo de HEA povos esti unu el la ĉefaj (eble la ĉefa) internacia propagandejo de la Internacia Lingvo.

Péter András *Rados*



La estrino de la Librovendejo de HEA, Ernesztina Lőrincz vendas ĉiujare milojn da Esperantaj libroj

En centro de la Hungar landa turismo

Sándor Révész

Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario

Unua parto: LA EKONOMIO I.

Jen, artikol-serio por realisme prezenti la aktualan situacion de Hungario. Kiucele? 1. Memcele, oni sciu ion pri ni; 2. Ni timas kaj esperas, kaj ambaŭ sentoj estas paroligaj; 3. Ni konscias, ke kaj la timindaĵoj kaj la esperindaĵoj, kiujn nia socio prezentas, estas instruaj — jen pozitive, jen negative.

Du anticipaj rimarkoj: 1. Hungario travivas malfacilan periodon; 2. De Pollando kaj Ĉeĥoslovakio tra Hungario, Jugoslavio kaj Sovetunio ĝis Ĉinio kaj Vjetnamio oni parolas pri vivnecesaj, profundaj ŝanĝoj en la politika kaj ekonomia mekanismoj. Neniu scias, kie, kio, kion rezultigos.

* * *

La rektaj kaŭzoj de niaj nuntempaj ekonomiaj problemoj radikiĝas en la erara ekonomipolitiko de la 70aj jaroj. Ĉijardeke la reformprocezo (ĵus komenciĝinta) haltis, mem la vorto „reformo" malaperis el la oficiala parolmaniero. Oni ignoris la efikojn de la ekonomia mondkrizo (dirante, ke la socialismaj partner-rilatoj defendas nin), kaj la interna, hungara prezostrukturo fariĝis tute malreala kaj misorientanta. La entreprenoj (ne formale, sed praktike) perdis grandan parton de tiu aŭtonomeco, kiun la reformo certigis al ili. Preskaŭ ĉiujn fundamentajn instituci-sistemojn de la socio atingis (denove) centrigaj, unuigaj kampanjoj: la kooperativojn, la entreprenojn, la konsilantarojn (la lokajn ŝtatadministrajn instancojn), la lernejojn, la sanitarajn servojn ktp. La interesoj por uzi la produktilojn, la kapitalon kiel eble plej profite, apenaŭ funkciis en la ekonomio, kiam oni efektivigis tre ambiciajn investajn programojn. La reguligon de la salajroj kaj la individuaj enspezoj direktis ne ekonomiaj, sed ideologiaj motivoj. Multe altiĝis la salajroj en la grandaj, ŝtataj entreprenoj dum la privata sfero velkadis ombre de sufokaj impostoj. La okcidentaj bankoj (inunditaj de arabaj petroldolaroj) volonte kaj abunde financis ĉion ĉi. Komence de la sepdekaj jaroj Hungario praktike ne havis ŝuldojn en dolaroj. Fine de la jardeko la *porkapa* dolarŝuldo en Hungario estis pli granda ol en Pollando!

En 1978 Hungario alvenis la sojlon de la krizo — oni devis urĝe ŝanĝi la direkton. Oni formulis la jenajn celojn:

— haltu la ŝuldo-kresko, la lando restu solventa (pagokapabla);
— bilanco de la ekstera komerco en la dolar-sistemo iĝu pozitiva, t.e. kresku la eksporto kaj malkresku la importo;
— anstataŭ la memcela, malprofita kreskigo de la produktado oni modernigu, adaptu al la mondekonomiaj postuloj la strukturon de la produktaĵoj, kaj tiamaniere oni antaŭpreparu la „novan periodon de la kresko";
— oni „defendu" la vivnivelon.

Ni vidu, kio okazis de 1978 pri la diversaj problemoj de la hungara ekonomio.

Ŝuldo, solventeco: Hungario restis solventa, pagis siajn ŝuldojn kaj interezojn bonorde, kvankam en 1982 nur lastminute ĝi saviĝis de nepagiveco. Hungario neniam petis moratorion. Malgraŭ tiel multe da ŝuldoj ne aparteni al la granda grupo de la landoj petintaj moratorion, ja, estas granda rezulto. Ni vidos, kiom kostis al ni tiu rezulto. La ekstera ŝuldo de la ŝtato inter 1980 kaj 1984 iom malaltiĝis. La ekonomigvidantoj formulis tiel, ke „la plej malfacila periodo estas jam malantaŭ ni", oni povas plani modestan konjunkturon por la sekvaj jaroj. Tion antaŭvidas ankaŭ la rezolucio de la parti-kongreso en 1985. Multe da ekonomikistoj, kiuj vidis la problemojn pli profundradikaj, priskeptikis tiun optimismon, kaj ili pravis. En 1985-1986 la tendencoj renversiĝis, la ŝuldo denove altiĝas, ĝi estas nun nur 5 %-oj malpli ol komence de la „ekvilibriga periodo". Novembre de 1986 la Centra Komitato de la Partio denove devis elpaŝi per rezolucio memkritika kaj alarmiga.

Pozicio de la ekstera komerco: Imre Pozsgay, ĝenerala sekretario de la Patriota Popolfronto komence de 1986 diris la jenon: „Neniu grava celo de la 6a kvinjara plano (1981-1985) plenumiĝis." La bilanco de la ekstera komerco en la dolar-sistemaj rilatoj inter 1981-1985 fakte estis aktiva, sed ne la eksporto kreskis laŭplane, la aktiveco devenas ĉefe de la importŝparado, kaj tiu „ŝparado" ja, ĝenerale kostas multe. Tiu „defensiva" aktivigo de la bilanco kaŭzis tion, ke la profiteco de la eksporto malboniĝis, la strukturo de la eksporto rigidiĝis, ne adaptiĝis al la mondkomercaj tendencoj. Por importita unuo en 1985 oni devis eksporti je 8,2 % pli ol en 1980. Tiu tendenco impetiĝis en 1986, dum unu jaro la interŝanĝoroporcio (terms of trade) malboniĝis je 7,5 %.

Jen la bilanco de la ekstera komerco en dolar-sistemaj rilatoj inter 1980 kaj 1985. (Kun la transport-kostoj; en milionoj da dolaroj.)

1980: - 14,6
1981: + 42,2
1982: + 516,8
1983: + 658,9

1984: + 720,8
1985: + 303,0
1986: - 480,0

Laŭ la analizo de vicministro pri ekstera komerco ni perdis 60-100 milionojn da dolaroj pro la prezo-falo de la petrolo (ja, pro la t.n. „Bukureŝta prez-regulo" la prezoj en KEI nur prokraste kaj paŝ-post-paŝe sekvas la mondmerkatajn prezojn, do la prezo de la soveta petrolo ekfalos nur ekde la nuna jaro), la pro-Ĉernobila import-stopo en Okcidenta Eŭropo forprenis de ni 20 milionojn da dolaroj de eksport-enspezoj. La prezoj de la hungaraj agrikulturaj varoj falis je 5-10 %, dum la kafoprezo saltis ĝis la ĉielo, ankaŭ la devalutiĝo de la dolaro tiris kelkdek milionojn el nia poŝo. Nur parton de la perdo oni sukcesis kontraŭbalanci per devaluto de la forinto kaj per specialaj eksport-instigaj subvencioj (kiuj ja ankaŭ kostas multe, eĉ se en forintoj).

Mi aldonu ankoraŭ, ke parto de la komerco inter la landoj apartenantaj al la rublo-sistemo efektiviĝas en dolaroj. Sen tio nia dolarbilanco estus eĉ multe pli malbona.

Fakte ne mankas la eksteraj faktoroj, kiuj malfaciligas nian situacion; protektismo, COCOM-listo (listo de varoj kun alta teknologio, kiun okcidentaj landoj ne vendas al ni), Ĉernobilo, sekvetero ktp., ktp. Sed tiu, kiu konstruis sian domon el pajlo, ne miru pri la lupo aŭ uragano, kiu forblovas ĝin.

La strukturo de la produktado, samkiel la var-strukturo de la eksporto, ĝi tute ne moderniĝis. Tiu celo de la 1978a programo praktike tute ne efektiviĝis. Nek la proporcio de la novaj produktaĵoj, nek la averaĝa aĝo de la industriaj produktaĵoj (16 jaroj!) montras pliboniĝon. Ja, en krizaj jaroj multe da landoj aplikas restriktan ekonomi-politikon, sed dum la fastaj jaroj de la malkonjunkturo oni ja per restrukturigo de la ekonomio, per modernigaj, novigaj paŝoj „antaŭpreparas la futuron". Sed Hungario dum la jaroj de la stagnado ne antaŭpreparis, ne fundamentis, sed forkonsumis sian futuron.

Jen, kelkaj indikoj: la investado de 1978 ĝis 1985 en la prilaboraj industri-branĉoj reduktiĝis je 40 %! La proporcio de la neta akumulado en la interna utiligo de la nacia enspezo reduktiĝis de 28 % al 11 %! La hungara ekonomio eniris magian cirklon: pro la malalta teknika nivelo kaj la ne-konvena varstrukturo la eksporto estas tre multekosta, la monon oni devas forpreni de la akumulado, la teknika nivelo pli kaj pli postrestas malantaŭ la mondmerkataj postuloj, la profito fariĝas pli kaj pli malprofita... ktp. La manko de la financaj rimedoj ne estas la sola kaŭzo. Ja, estas multe da entreprenoj, kie oni eĉ la disponeblajn financajn rimedojn destinitajn por la teknika evoluigo oni ne uzis por tiu celo. En 1985 la maŝinaro de la hungaraj agrikulturaj kooperativoj ekzemple jam 48 %-e amortiziĝis je nulvaloro! Entrepren-nivele apenaŭ funkcias interesoj por la teknika modernigo. Oni ne povas forgesi, ke tiu „teknika sintrunkigo" okazas en tiu periodo, kiu kvalite, revolucie transformas la teknikon. Eĉ se iun komput-teknikaĵon ne malpermesas la COCOM-listo, do la aĉeton malebligas la restrikta import-politiko. Se la entrepreno hazarde havas sufiĉe da dolaroj por la maŝino, do mankas la intereso, ĉar la maŝina laborforto ĉe ni estas multoble pli kara, kaj la eksperta laborforto multoble pli malkara, ol en la evoluintaj landoj.

Do, ne estas mirinde, ke unu monaton post la unua alarmiga rezolucio de la Centra Komitato, aperis alia ankaŭ memkritika kaj same alarmiga komuniko pri la akcelo de la teknika evoluo. La teknika epokŝanĝo komence de la 80aj jaroj jam atingis la landojn de la t.n. „meza periferio" en Sudorienta Azio, Sud-Ameriko, Sud-Eŭropo (Turkio, Grekio, Portugalio ktp.), tiujn landojn ni devas postkuri. Tiu aserto estas prenita el intervjuo kun eksperto de la Centra Komitato de Partio, kaj la aparatanoj de la Centra Komitato, ja, ne kutimas troigi negative...

La alia tereno, kie la lando forkonsumas sian futuron estas la *infrastrukturo.*

Jen, la ekzemplo de la ŝoseo-reto. Por almenaŭ konservi la (ne tro bonan) staton de ĉefŝoseoj oni devus reasfalti 1200 kilometrojn da ŝoseoj ĉiujare. Dum la 6a kvinjara plano (1981-1985) oni reasfaltis 680 kilometrojn jare. La monoumo, kion oni antaŭvidas por la 7a kvinjara plano por la sama celo sufiĉos por 500 kilometroj jare. Laŭ la kalkuloj de la Ministerio pri Trafiko ĉiu sparita forinto kaŭzas 2,5-3 forintan damaĝon (la veturiloj konsumas pli da materialo, ili foruziĝas pli rapide, la transportado daŭras pli longe ktp. pro la malbonaj ŝoseoj. 38 % de la ŝose-pontoj estas ĉu maltaŭgaj el trafika vidpunkto, ĉu simple danĝeraj. Diablo scias, kiam oni renovigos ilin. La fervojelektriga programo (eĉ se lantiĝinta) efektiviĝadas, sed la stato de la reloj kaj de la vagonoj malantaŭ la lokomotivoj pli kaj pli malboniĝas.

Rilate la nombron de la telefon-stacioj Hungario estas inter la lastaj landoj en Eŭropo. Kalkulante la damaĝojn pro la manko de telefonstacioj oni parolas pri gigantaj sumoj. Dum la 7a kvinjara plano oni instalos laŭplane je 70-90 % pli da telefonstacioj ol en la 6a kvinjara plan-periodo, kaj tiel oni atingos, ke en 1990 nur ĉ. 15 % de la hungaraj familioj havos neplenumitan peticion por telefon-ŝtacio. (Memkompreneble tute ne volas ĉiuj hungaraj familioj telefonon. Vilaĝanoj malofte peticias por telefono. Ja tiuj, kiuj volas telefonon devas krediti al la Poŝto je malalta interezo egalvaloron de 4-5 monata meza salajro en formo de obligacio.)

Ni ne havas lokon por pli da ekzemploj. Resume: en Hungario la proporcio de la infrastrukturaj investoj estas multe malpli alta ol en la simil-nivele evoluintaj, ne plan-ekonomiaj landoj. Antaŭ la mondmilito la hungara infrastrukturo estis pli evoluinta (t.e. malpli postrestinta) ol la industria produktado. Nuntempe estas ĝuste kontraŭe. La proporcio de la

infrastrukturo en la nacia havaĵo en 1950 estis ankoraŭ 82 %, en 1980 nur 59 %.

La pozicio de la t.n. „ne-produkta sfero" tre similas al la pozicio de la infrastrukturo. Dum la pasinta kvaronjarcento nur en tri sinsekvaj jaroj naskiĝis tiom da beboj, kiom sufiĉas por la reproduktado de la loĝantaro. Tiu trijara „demografia inundo" kaŭzis tiel grandajn problemojn, ke kelkloke oni uzis eĉ vagonojn kiel klasĉambrojn. Laŭ la vicministro pri klerigo en la universitatoj kaj altlernejoj la motivitajn financajn postulojn de la esplormetiejoj oni povas plenumi ĉirkaŭe dekprocente!

La vivnivelo: La reala valoro de la porkapa enspezo inter 1981-1985 altiĝis je 7 %. Tiel malrapida altiĝo (ĉ. 1 % jare) subjektive rimarkiĝas stagnado aŭ nivel-falo. La reala valoro de la salajroj averaĝe malaltiĝis je 5 %, tio signifas, ke la pluso venas de ne-salajraj aŭ krom-salajraj enspez-fontoj.

Laŭ la statistiko en 1985 la reala valoro de la porkapa enspezo altiĝis je 1,5 %, tamen laŭ la opini-sondado de la Amaskomunikada Instituto tri kvaronoj de la demanditoj opinias tiel, ke ilia enspezo malaltiĝis. Ja oni devas konsideri ankaŭ tion, ke la statistika kalkulo de la inflacio estas subtaksa preskaŭ ĉie en la mondo pro metodologiaj malfacilaĵoj. Pluse: en la 80aj jaroj malaperis aŭ reduktiĝis diversaj rabatoj (je vojaĝkostoj, publika manĝo-servo ktp.), la loĝantaro devas kovri pli grandparte la kostojn de la instalado de gas-kanaloj, akvo-kanaloj, telefona kablaro, pli granda parto de la loĝejoj konstruiĝas per privata mono ktp. Sume: por konservi la viv-nivelon oni ĝenerale devas labori pli ol antaŭe.

Fone de la ĝenerala stagnado de la vivnivelo la situacio estas jena: tiuj, kiuj sukcesis kapti iun formon la novaj et-entreprenaj eblecoj, aŭ trovis bone pagitan kromlaboron, tiuj konservis aŭ levis sian viv-nivelon (la tavolo de la relative riĉaj et-entreprenistoj signife larĝiĝis); kaj tiuj, kiuj pro iu kaŭzo nek krom laboras, nek entreprenas, ties financaj problemoj de jaro al jaro pligraviĝas.

Kaj la leĝa sfero de la et-entreprenado kaj la „griza" aŭ „nigra" ekonomi-sferoj okupas multe pli grandan parton de la ekonomia vivo ol en la 70aj jaroj. En tiuj sferoj memkomprenebleĵ kaj la prezoj kaj la enspezoj altiĝas pli rapide, kaj tiun altiĝon la statistiko nur etparte povas respeguli. Ĉiuokaze tiuj, kiuj ne enspezas nur elspezas en tiuj sferoj, ja, vivas malfacile.

Finfine, kiuj perdis plej multe? Tiuj nefakaj laboristoj, kiuj ne kunportis socian kapablon por orientiĝi, informiĝi en la ĝangalo de la ekonomio aŭ/kaj kiuj laboras en depresiaj teritorioj aŭ industri-branĉoj; salajruloj de ne-ekonomiaj kaj nepotencaj ŝtataj institucioj (pedagogoj, flegistinoj, ktp.); pensiuloj. La pli malriĉaj tavoloj perdas pleje, do, la proporcio de la malriĉuloj grandiĝas en la socio.

Varo-provizado, mankoj: La var-mankado estas tipa fenomeno de la plan-ekonomioj. En Hungario la manko-fenomenoj en la merkato de la konsum-varoj ne estas okulfrapa. Ja, sperta, „indiĝena" aĉetanto ĉiam scias pri provizore aŭ longdistance mankantaj artikloj, sed la hungara konsum-merkato laŭ la Mezorient-Eŭropaj orient-Eŭropaj normoj estas bone provizita. Dum la lastaj jaroj en pli da gravaj artiklo-specoj pliboniĝis la provizado ol male. Sed: bedaŭrinde la plej kronikaj mankoj tuŝas ĝuste la elementajn kaj konstantajn vivbezonojn, temas pri la loĝejo, la telefono, la sanitaraj servoj kaj la mebloj.

Laŭ la ekspertaj taksoj 20-25 % de la loĝantaro vidas antaŭ si la taskon havigi kontentigan (aŭ entute ian) loĝejon. Tiu tasko, ja, estas longdaŭra viv-determina faktoro. En Hungario la pli granda parto de la loĝejoj ĉiam konstruiĝis per privata mono. La proporcio de la ŝtata loĝejinvestado daŭre malgrandiĝas ekde la dua duono de la 60aj jaroj. Dum la lasta kvinjara planperiodo 78 % de la loĝejoj konstruiĝis per privata mono, sekvontperiode tiu proporcio signife pligrandiĝos. Praktike nur la mizeraj familioj kun multe da infanoj kaj kelkaj specifaj socigrupoj (sportistoj, ministoj, oficiroj ktp.) povos kalkuli je ŝtata lu-loĝejo.

La prezo de la loĝejoj jam de la komenco de la 70aj jaroj altiĝas multe pli rapide ol la salajroj. Inter 1970 kaj 1983 la averaĝa salajro altiĝis je 110 %, la prezoj de la oficiale aĉeteblaj loĝejoj altiĝis (po kvadratmetro) je 280 %! Sed oni devas atendi multe por aĉetebla ŝtata loĝejo, kaj la prezoj de la privataj loĝejoj dum la sama tempo altiĝis je 450-500 %! La kosto de la loĝejkonstruado por unusola kvadratmetro estas pli ol dumonata averaĝa salajro. Aldone la kvalito de la loĝejoj konstruitaj far ŝtataj konstruentreprenoj estas ja multe kritikinda, kaj la aĉetanto estas praktike senpova. La loĝejo estas la plej ofta motivo de la sinekspluatado, la loĝejo kostas viv-longajn ŝuldojn. La loĝejproblemo estas tutcerte inter la ĉefkaŭzoj de tio, ke la mortokvanto de viroj de laborkapabla aĝo en Hungario estas la plej alta en la mondo.

Oni mencias inter la avantaĝoj de la planekonomioj la forigon de la *senlaboreco,* kvankam — kiel montras la ekzemplo de Jugoslavio aŭ Vjetnamio — senlaboreco povas aperi ankaŭ en planekonomioj. En Hungario estas multe pli da postenoj neokupitaj ol da homoj serĉantaj postenon, tamen estas regionoj, profesioj kaj industribranĉoj, en kiuj ne estas facile trovi laboron. Multe da pensiuloj, dommastrinoj kaj handikapitoj serĉas vane laboron (ilin nenie kalkulas senlaboruloj, nek okcidente, nek oriente), kvinono de la laborisoj ne laboras en tiu urbo/vilaĝo, kie ili loĝas, kaj la ĉiutaga veturado kaŭzas multe da problemoj. Signifa parto de la diplomitoj, fakuloj devas entrepreni laboron nekonvenan al ilia faka edukiteco. En Hungario oni jam registras kelkmil homojn, kiuj estas fakte senlaboruloj („laboron serĉantaj"), sed la pli grandaj problemoj verŝajne estas ankoraŭ antaŭ ni. Dum la sekvontaj jaroj (se ni ne volas bankroti) oni devos malfondi signifnombre entreprenojn, ĉesigi la produktadon en multaj uzinoj, koncize: la ekonomion

oni devas serioze restrukturigi, kaj tio signifas, ke iamaniere ankaŭ la laboristaro restrukturiĝos, kaj estos homoj dum pli-malpli multe da tempo sen laboro. Oni antaŭpreparas la jurajn-socialajn formojn por alfronti la antaŭvideblajn problemojn. Oni jam enkondukis la t.n. „monhelpon por laborserĉado" por tiuj laboristoj, kiujn oni en amaso, organizite decidis „alilokigi". Tiun monhelpon jam eĉ en la tagĵurnaloj kaj amaskomunikiloj foje-foje oni nomas monhelpo por senlaboruloj. Ankoraŭ neniu scias kiom da homoj, kiugrade tuŝos la laborserĉaj problemoj, sed neniu pensas, ke tiuj problemoj estas tiel gravaj kiel en Okcidenta Eŭropo aŭ Jugoslavio.

Ni devas paroli ankoraŭ pri la *agrikulturo.* Ĝis la mezo de la 80aj jaroj la agrikulturo estis la plej dinamisma kaj sukcesa branĉo de la hungara ekonomio. La produktorezultoj de pluraj agrikulturaj artikloj estis mondnivele pintaj aŭ preskaŭ pintaj, la enlanda merkato de legomoj kaj fruktoj estis (kaj ankoraŭ estas) bone provizita, la agrikulturo havis ŝlosilan rolon en la hungara eksporto. Dum la 60aj jaroj elformiĝis bone funkcianta koopera sistemo inter la kooperativa, la privata kaj ŝtata produktado. La rezultoj unuavice baziĝis sur tio, ke la individuaj interesoj kaj iniciatoj havis multe pli grandan funkci-terenon en la agrikulturo ol en la industrio.

Meze de la 70aj jaroj fortiĝis la ŝtata interveno, oni kampanje unuigis multe da kooperativoj (tre ofte malgraŭ la volo kaj interesoj de la kooperativanoj), efektiviĝis grandaj investo-programoj, kiuj ofte kontraŭdiris la ekonomian racion.

La agrikultura produktado fariĝis tre multekosta, la administraj kostoj rapide altiĝis, kaj nun ili estas pluroble pli grandaj ol ĉe iliaj eksterlandaj konkurencantoj. Multe bremsis la evoluon de la malalta nivelo de la provinca infrastrukturo. En la unua duono de la 80aj jaroj la ekonomi-politiko ŝarĝis la agrikulturon pli kaj pli. La imposto-politiko fortiris pli kaj pli da kapitalo de la agrikulturo, dum la financaj apogoj reduktiĝis kaj la prezstrukturo ŝanĝiĝis malfavore al la agrikulturo. (La prezoj de la industriaj produktaĵoj inter 1980 kaj 1985 altiĝis je 32 %, la agrikulturaj produktaĵoj plikostiĝis nur je 21 %.) La manko de la kapitalo eksufokis la agrikulturon, la maŝinaro teknike-fizike malnoviĝis (la energikaj riparkostoj iĝis gehenaj), la kooperativoj multloke ne povis aĉeti eĉ la necesan kvanton da minerala sterko.

30 % de la agrikultura produktado estas eksportitaj, la agrikulturo donas la trionon de la dolar-sistema eksporto (ĝia proporcio en la malneta nacia produktado estas nur 18 %). La internacia agrikultura merkato ŝanĝiĝis malfavore al la hungara agrikulturo. La merkato plenŝtopiĝis, oftiĝis la protektismaj paŝoj, ĉesis la mon-abundo en kelkaj gravaj importintoj (unuavice en la petrolon eksportantaj arabaj landoj), la prezo de la malaltnivele prilaboritaj varoj rapide falis, la merkato taksis (relative) pli la prilaboradon. Pro la kapitalmanko la hungara agrikulturo ne povis sekvi tiujn ŝanĝojn. La agrikultura eksporto fariĝis ĉiam malpli profitdona.

La maklera mekanismo inter la (privataj) produktantoj kaj la merkato misfunkcias. La ŝtataj makleraj entreprenoj (malgraŭ multe da reorganizadoj) estas inertaj, rigidaj, malentreprenemaj, burokratiaj kaj ja, en la agrikulturo la malrapida maklerado sufokas la merkaton. Leĝaj formoj por la privata agrikultura maklerado ne ekzistas, do la maklerado okazas nigre kaj estas en la manoj de mafioj, kiuj monopoligas la informojn. Do, la produktantoj grumblas pro la malaltaj prezoj en la pogranda vendado, la konsumantoj grumblas pro la gehenaj kostoj en la podetala vendado, kaj la kapitalo malaperas dumvoje en mafiaj poŝoj.

Ankaŭ la naturo ne estas bonvola al la hungara agrikulturo. Jam tri jarojn sinsekvajn vizitas nin la sekvetero kaj la majaj, juniaj frostoj.

La hungara agrikulturo havis signifajn rezervojn. (Ekzemple la industria „flankagado" de la agrikulturaj kooperativoj, sen kiuj jam multe da kooperativoj bankrotintus.) Ŝajnas tiel, ke la rezervoj jam elĉerpiĝas. La agrikultura produktado en 1985 ekfalis.

(Daŭrigota)

SUR LA BORDOJ DE DANUBO

Tiun titolon portis la ekspozicio, kiun organizis esperantistoj el Sverdlovsk (USSR) okaze de la Nacia festo de Hungario en la plej luksa Urala kulturpalaco, tiu de Uralmaŝ. Dum la tuta aprilo, oni povis vidi librojn, revuojn, bildkartojn, prospektojn, fotojn, artikolojn kaj aliajn materialojn, kiuj rakontis pri la vivo de la nuna Hungario. Apartaj standoj estis dediĉitaj al la 68a Universala Kongreso de Espeanto, en kiu du Sverdlovskanoj partoprenis, al Hungara Vivo kaj al la esperantlingvaj verkoj de István Nemere. La ekspozicio vekis certan, kvankam ne furoran, intereson kaj pri Hungario kaj pri Esperanto.

Aleksander *Korĵenkov*

Nia revuo okupis ŝatindan lokon en la ekspozicio
Foto de Sergej Ŝĉokotov (Fotoklubo de Uralmaŝ)

La saĝa realismo kaj la „diabla cirklo"

Intervjuo kun akademiano József Herman, direktoro de la Lingvoscienca Instituto de la Hungara Akademio de Sciencoj

En la historia kvartalo de Budapeŝto, je nur kelkdek-metra distanco de la nova sidejo de HEA, funkcias la Lingvoscienca Instituto de la Hungara Akademio de Sciencoj. Ĝia direktoro estas akademiano József Herman, internacie rekonata romanisto, scienculo de la nov-latinaj lingvoj. Li komencis sian karieron kiel mezlerneja profesoro pri la lingvoj latina kaj franca, inter 1947-1949 li daŭrigis la studadon en Parizo, kaj tie li doktoriĝis pri la historio de la franca lingvo. Post sia reveno al Hungario baldaŭ li komencis labori en la tiam fondiĝinta Lingvoscienca Instituto, kaj apenaŭ nur jaron poste li fariĝas katedrestra profesoro en la same freŝe fondita Altlernejo de Fremdaj Lingvoj, por baldaŭ okupi ties direktoran seĝon. La sekva stacio de lia kariero estas katedro en la Filologia Fakultato de la Universitato „Eötvös Loránd", kaj en 1957 la Universitato „Kossuth Lajos" en Debrecen, kie li refondis la intertempe likviditan katedron pri franca filologio. Dum kelka tempo li oficis kiel dekano de la Filologia Fakultato. Intertempe li verkas fakajn librojn kaj studojn, kaj dum jaro laboris kiel gastprofesoro en la fama Pariza Universitato „Sorbonne".

Jam kiel doktoro de la lingvosciencoj, en 1970 li estas invitita fare de UNESKO ofici kiel direktoro de ties sekcio pri supera instruado. Li partoprenis ankaŭ en la fondo de la UN-Universitato en Tokio, kiu okupiĝas pri la akordigado de la sciencaj esploroj koncerne certajn tutglobajn problemojn. Li revenis al Hungario en 1975, por denove dediĉi sin al la scienca laboro. Li ekoficis tiam en sia nuna posteno, kun unujara interrompo, kiun li pasigis instruante romanistikon en Parizo. En la jaro 1985 – kun la anticipa aprobo de la partoprenintaj 35 landoj – li estis plenumsekretario de la Eŭropa Kultura Forumo, okazinta en Budapeŝto.

La n-ro 1985/3 de la hungarlingva revuo *Kritika* sub la titolo „Lingvo, ŝtato kaj politiko" aperigis artikolon verkitan de profesoro Herman. Tiu artikolo estis la unua en Hungario, kiu antaŭ sufiĉe granda publiko okupiĝis pri la gravaj demandoj de la lingvopolitiko. La n-ro 1985/4 de *Világ és Nyelv*, hungarlingva revuo de HEA faris komentojn pri tiu artikolo. Jen la antaŭhistorio de la jena intervjuo.



„Esperanto meritas nur admiron..."

Sinjoro profesoro, kio estas la tasko de la Lingvoscienca Instituto, kaj kio karakterizas ĝian nunan agadon? Ĉu ĝi kunlaboras kun similaj eksterlandaj institutoj, kaj se jes, sur kiuj terenoj?

– Nia instituto okupiĝas pri hungara kaj Urala – enkadre de la lasta, pri finno-ugra – lingvistiko, pri ĝenerala lingvistiko kaj pri fonetiko. Ni realigis ankaŭ grandajn kolektivajn entreprenojn: ekzemple la hungaran lingvoatlason kaj la vaste konatan sencdifinan (plenan) vortaron. Nuntempe ni laboras ĉefe pri la preparado de la granda vortaro de la hungara literatura kaj komuna lingvo, kaj pri la ellaborado de la historia gramatiko de la hungara lingvo. La sciencaj kunlaborantoj de la instituto multe okupiĝas pri lingvoteoriaj demandoj, pri la studado kaj aplikado de la modernaj tendencoj de la lingvistiko. La plej multaj el ili havas ankaŭ signifan individuan esplortemon. Kompreneble, ni kunlaboras kun pluraj similaj eksterlandaj institutoj. Tio realiĝas unuavice en la formo de organizado de reciprokaj studvojaĝoj kaj komunaj konferencoj, sed ni planas ankaŭ komunajn esplorlaborojn.

Kian rolon povas havi hungara scienculo en la esplorado de la novlatinaj lingvoj?

– La lingvoscienco estas scienco internacia, ankaŭ pri la hungara lingvo okupiĝas rezultoplene ne-hungaraj scienculoj, tiel nenio malhelpas, ke ankaŭ pri la novlatinaj lingvoj okupiĝu personoj, kies gepatra lingvo ne estas novlatina lingvo. Estas scienchistoria fakto, ke la novlatina lingvistiko naskiĝis dum la 19a jarcento en Germanio. Ja la leĝoj, difinantaj la strukturon kaj historian transformiĝon de la lingvoj, estas esence komunaj. Kompreneble alilingvano renkontas limojn pri difinitaj temoj. Ekzemple mi mem ne povus diri ion novan pri la Pariza parolata lingvo, ĉar mi ne vivas en Parizo. Sed koncerne la malnovajn evoluperiodojn aŭ mem la leĝojn de la evoluo, ni tute ne havas malavantaĝojn kompare al la francaj kolegoj. Romanistiko estas internacia scienco, kaj ĝiaj centroj ankaŭ nun estas en la germanlingvaj kaj Skandinaviaj landoj, kaj en Norda Ameriko. Estas do bona afero, ke ankaŭ la hungara lingvoscienco partoprenas en tiu internacia laborado.

Kiel esploranto de la novlatinaj lingvoj, kion vi opinias pri Esperanto, kiun ĝiaj parolantoj ofte nomas „moderna latino" de nia epoko? Eĉ, Jean Jaurés, la fama franca socialisto kaj filozofo asertis: „Esperanto estas la latino de la demokratio."

– Kio koncernas Esperanton kiel lingvan kreaĵon, t.n. artefaritan lingvon, kiu utiligis certajn elementojn kaj strukturajn karakterizaĵojn de la ekzistantaj naturaj lingvoj, nu, ĝi meritas nur admiron. Esperanto venkis ĉiujn siajn rivalojn, kaj sendube ĝi estas la plej sukcesa kaj ankaŭ el lingvistika vidpunkto la plej pripensite kreita, la plej elasta kaj plej riĉa artefarita lingvo. La eldiro de Jaure rilatas tamen ne la internajn kvalitojn de la lingvo, sed ĝiajn celojn. Estas senduba fakto, ke laŭ siaj funkciaj aspiroj Esperanto certagrade kompareblas al la mezepoka latino, en tiu senco do la eldiro de Jaures estas ĝusta.

Laŭ via artikolo, aperinta en la revuo *Kritika*, lingvopolitiko difineblas esence kiel sinsekvaj paŝoj de ŝtato, aŭtoritato aŭ alia formo de la potenco, por rekte aŭ nerekte, sed celkonscie reguli, influi la uzadon de certa lingvo. En tiu artikolo vi skribis interalie: „...fariĝis aktuala tasko ankaŭ la scienca esplorado de la eblaj celoj, efiko, rimedoj de la lingvopolitika scienco." Mi petas vin, bonvolu koncize skizi por niaj legantoj la esencon kaj ĉefajn celojn de la lingvopolitika scienco.

Pri demokratia lingvopolitiko

– La lingvopolitiko ne estas memstara scienco; ĝi estas esplorbranĉo etendiĝanta al pluraj fakoj – la lingvoscienco, politologio, sociologio kaj psikologio –, ĝi situas ie inter tiuj sciencoj, kaj utiligas ties rezultojn. La celo de la lingvopolitika scienco – kiel de ĉiuj sciencoj – estas unuavice la ekkono de la realo, kaj estas tireblaj el ĝi ankaŭ konkludoj, utiligeblaj en la praktiko. La scienculoj, okupiĝantaj pri lingvopolitikaj esploroj, atentigas la ŝtatojn pri tiuj konkludoj, sed kompreneble ne dependas de la scienculoj, ĉu oni utiligas iliajn konkludojn aŭ ne. Ekzemploj abundas ĉie en la mondo. Estus maljuste respondecigi la eksperimentemajn scienculojn de tiu ĉi nun naskiĝanta esplorbranĉo pri la ĉirilataj multaj problemoj de la mondo.

La ĉefa direndo de via menciita artikolo estas la sekva pensoĉeno: „...la baza celo de la demokratia, kaj tiom pli de la socialisma lingvopolitiko ĝenerale ne povas esti io alia, ol la konservado, protektado, funkcia riĉigado de la lingvoj naciaj, naciminoritataj, de la t.n. gepatraj lingvoj..." Tiu ĝusta kaj grava celo, se oni rilatigas ĝin al plurnaciaj ŝtatoj, jam inkludas la postulon de la egalrajteco de la gepatraj lingvoj de ĉiuj nacioj, vivantaj en la koncerna ŝtato.

Sed en la multspecaj interŝtataj organizoj kaj en la internacia komunikado nur tre malofte povas validiĝi la postulo de la egalrajta uzado de la naciaj lingvoj. Tiu fakto komprenebe havas neeviteblajn objektivajn kaŭzojn. Ĝuste tial la pligraviĝantaj lingvaj problemoj, fontantaj el tiu kaŭzoj, bezonus esploradon fare de la lingvopolitika scienco, kaj ankaŭ ĝian starpunkton. Kiel vi opinias pri tio, sinjoro profesoro?

– En si mem ŝajnas tre evidenta la paraleleco de la nacia kaj internacia lingvaj situacioj. Sed ĝi enhavas ankaŭ erarigajn elementojn. Ĉar ne estas la sama afero solvi lingvan problemon enkadre de pli-malpli unueca socio kaj ŝtato, aŭ en interŝtataj organizoj, kiam oni devas reguli la lingvan komunikadon inter ŝtatoj, havantaj tre diferencajn interesojn. Kvankam ankaŭ via demando aludis la neeviteblajn objektivajn kaŭzojn de tiuj diferencoj, mi volus atentigi pri ili tre emfaze, ĉar cetere ŝajnus tro alloga la paraleligo: se la lingvopolitiko postulas interne de la ŝtatoj lingvan demokration, do kial ni ne postulu tion ankaŭ internacie? La afero ne estas tiel simpla.

Vere ne, sed ĝuste tial estas demando tre grava, ĉu la lingvosciencaj institutoj okupiĝas pri la internaciaj problemoj de la lingva egalrajteco? Ĉu ili havas tian celon, tian programon?

– Mi kredas, ke ne okazas tiaspeca lingvoscienca esplorlaboro, kvankam ĝi estus tre interesa. Sed tia esplorlaboro inter la nunaj cirkonstancoj de la internacia komunikado havus tre klarajn limojn. Kaj cetere: estus nefacile difini, kion signifas internacia lingva egaleco? Ja estas evidente, ke senliteraturan lingvon de eta gento ne eblus rigardi egalrajta kun ekz. la hispana lingvo

Avantaĝoj kaj malavantaĝoj

Laŭ mi la egalrajteco en internacia sfero estas rilatigebla nur al popoloj, kiuj havas memstaran ŝtaton aŭ aŭtonomion en federacia ŝtato, kaj adekvatan propran kulturon.

– Jes, sed la demando ankaŭ tiel estas tre komplika. Oni povus tamen okupiĝi pri ĝi, sed inter la nunaj internaciaj cirkonstancoj tio havus karakteron pli deklareman ol sciencan.

Jam ankaŭ tio havus signifon, ja oni povus deklari ankaŭ principojn koncerne la internacian lingvan egalecon, kiujn oni povus konsenti aŭ malkonsenti – kaj tiuj principoj povus maturiĝi en la diskuto.

– Deklari tiajn principojn ne estas la tasko de la scienco. La scienco povas priskribi nur la faktan situacion kaj ties mov-leĝojn. Jam per tio ĝi malkovrus problemojn, sed tiuj rezultoj en si mem ne fariĝus bazo por agado. Kaj se tamen jes, la decido estus nepre politika. Kaj ĉar estus tre facile trovi en la mondo scienculojn kaj aliajn homojn – tute ne senmoralajn aŭ stultajn –, kiuj opinius ke en la internacia lingva komunikado oni devas certigi gvidan pozicion por iu aŭ tiu t.n. „granda" lingvo. Ja ankaŭ tiu starpunkto havus praktikajn, ekonomiajn avantaĝojn.

Tamen unuavice por la spiritaj mastroj de tiu elektita lingvo...

– Do, tiu demando nuntempe estas esence politika demando, kaj tial ĝi ne povas esti temo de sciencaj esploroj. La scienco nun povas diri pri ĝi malmulte, kaj laŭ tiu malmulto eblus decidoj tre diferencaj.

Se la lingvopolitika scienco ekzistas jam depost du jardekoj, ĉu jam lanĉiĝis la penso pri la bezono de lingva politiko, bazita per interŝtata kontrakto, kiu okupiĝus sinteze ankaŭ pri la problemoj de la internacia lingva komunikado?

– Tia penso ne lanĉiĝis ankoraŭ. Bedaŭrinde, nun ankoraŭ mankas la kondiĉoj por tiaspeca internacia lingvopolitiko. La grandpotencoj neŝanceleble persistas ĉe la klopodo certigi por sia lingvo hegemonian rolon en la internacia vivo. Tiu sinteno el la vidpunkto de la funkciado de la internaciaj organizoj estas sufiĉe praktika kaj ekonomia, ĉar ĝi reduktas la nombron de la uzeblaj lingvoj. Ja la ĉiudirekta samtempa interpretado kaj la tradukado de la oficialaj dokumentoj al ĉiuj oficialaj lingvoj jam en si mem sufiĉe ŝarĝas la buĝeton de la internaciaj organizoj. La enkonduko de nova lingvo – tio tamen okazis foje-foje dum la lastaj jardekoj – necesigis elspezi dolarmilionojn de unu tago al la alia, por ne paroli pri la organizaj kaj ceteraj malfacilaĵoj. El tiu vidpunkto plene akordiĝas la strebado de la grandpotencoj limigi la oficialan lingvouzon al siaj propraj lingvoj, kaj la ekonomiaj, organizaj konsideroj de la internaciaj organizaĵoj. Tio bele funkcias en la praktiko, kvankam estas evidente, ke tiel la reprezentantoj de landoj kun t.n. „malgrandaj" lingvoj suferas certajn malavantaĝojn. Krome la manko de lingva kompreno en difinitaj kazoj povas kaŭzi politikan malkomprenon, tamen, la nuna sistemo montriĝis esence funkcikapabla. Estas do neverŝajne, ke UN aŭ UNESKO en la antaŭvidebla estonteco modifu sian lingvan politikon.

Strategioj kaj interesoj

Via artikolo diras pri la t.n. mondlingvoj, ke „ili havas fortajn internaciajn funkciojn". Estas konata fakto, ke tiajn funkciojn dum la homa historio ĉiam havis aliaj lingvoj, konvene al la internaciaj potencrilatoj de la koncernaj epokoj. Sed en nia epoko la lingvoj kun internacia funkcio havigas al siaj ŝtato kaj nacio grandajn lingvajn privilegiojn, kiuj siavice „naskas" signifajn ekonomiajn, politikajn kaj kulturajn avantaĝojn, kaj samtempe malavantaĝojn por la popoloj, kies lingvo ne apartenas al la t.n. „mondlingvoj". Multaj homoj akceptas tiun fakton kiel eternan leĝon.

Sed ĉu oni povas akcepti la nunan situacion malgraŭ la fakto, ke ekzistas la evoluinta, neŭtrala Esperanto, kiu laŭ la opinio de multaj lingvistoj jam estas taŭga por la rolo de internacia peranta lingvo?

– Kio koncernas la unuan parton de via demando, tio esence estas reale tiel. Sed deziratajn celojn oni povas atingi nur surbaze de realaj analizoj. Tiu regulo validas ankaŭ koncerne la eblan rolon de Esperanto. Mi mem bone povas imagi, ke Esperanto fariĝu helplingvo de la internacia lingva komunikado. Sed mi volas emfazi, ke tio povas okazi nur iom post iom. Krome estas verŝajne, ke ĝi ne povos atingi centprocentan pozicion, t.e. ke oni uzu ĉiam nur ĝin en la internacia komunikado. Tion mi trovas utopio. Aliflanke, mi trovas ebla kaj respektinda celo, ke Esperanto fariĝu internacia peranta lingvo kun paŝ-post-paŝe vastiĝanta uzado. Respondi al la demando, kiagrade tiu celo povas realiĝi, jam estus aŭgurado, kaj la scienco ne okupiĝas pri aŭgurado. La internacia helplingva rolo de Esperanto ŝajnas esti atingebla, kvankam oni devas konsideri la fakton, ke multaj naciaj kaj internaciaj tendencoj efikas kontraŭ tio. Tamen, povos okazi antaŭenpaŝoj al tiu celo.

Se estus eble elformi kompleksan internacian lingvopolitikon, ĉu ĝia tasko povus esti ĝuste la akcelo de la akcepto de la sola demokratia solvo, kiun prezentas la neŭtrala Esperanto? Ĉu ne tiu solvo certigus plej efike la egalrajtecon kaj protekton de la naciaj lingvoj enlande kaj internacie?

– Mi kredas, ke ĉirilate oni devas proksimiĝi al la demando kun aparte saĝa realismo. Oni devas eliri el tio, ke en la ekzistanta internacia situacio la strategion de la lernado de fremdaj lingvoj ĉe ĉiuj nacioj difinas la interesoj de mallonga kaj meza perspektivoj. Estas evidente, ke la lingva politiko, eliranta el la nunaj kaj la nun antaŭvideblaj interesoj de la socio, instigas al la lernado de la jam disvastiĝintaj fremdaj lingvoj. Tiel estas ankaŭ en Hungario. Estas sendube, ke el certa vidpunkto tio alportas malavantaĝojn, kaj kreskigas la internacian malegalecon inter la naciaj lingvoj.

Kio eblas, kaj kio dezirindas?

En la fora estonteco estas imageble, ke la uzado de Esperanto, aŭ de alia lingvo samtipa kiel Esperanto, mildigu tiun malegalecon. Sed estas tute neimageblaj en la antaŭvidebla estonteco tiusencaj decidoj de la naciaj parlamentoj aŭ de internaciaj organizaĵoj. Ĝuste tial, ĉar tiaj decidoj ne akordiĝus kun la interesoj de mallonga kaj meza perspektivoj, kaj la politiko ne faras decidojn por periodoj post 200 aŭ 300 jaroj. Miaflanke mi trovas ebla kaj dezirinda tion, ke la Esperanto-movado en la opaj landoj kaj internacie fortiĝu, kaj iom post iom kreu la kondiĉojn por tio, ke la ebloj de la fakta internacia uzado de Esperanto plu maturiĝu, kaj en posta periodo oni povu lanĉi, ke Esperanto ricevu ankaŭ oficiale subtenatan, pli signifan rolon en la internacia lingva komunikado. Sed mi pensas, ke tio estos ebla nur en la pli fora estonteco.

Estu permesate al mi fari rimarkon: tiaj tre bonintencaj analizoj, kiel la supra, kvazaŭ senvole fortigas certan „diablan cirklon". Politikistoj kaj lingvistoj, simpatiantaj al Esperanto, ofte diras: kiam jam ellernis Esperanton grandaj amasoj, kaj la amasoj mem postulos la aplikadon de tiu lingvo, tiam ankaŭ ŝtate kaj internacie ĝi fariĝos pli akceptebla. Sed samtempe tre grandaj amasoj, simpatiantaj al Esperanto surbaze de elementa logiko, diras kun la saĝa logiko de la evidenteco la jenon: kial oni jam nun ne instruas Esperanton en ĉiuj lernejoj de la mondo, kaj kial oni ankoraŭ ne enkondukis ĝin sur ĉiuj kampoj de la internacia komunikado? Ĉar unuavice ŝtataj kaj interŝtataj decidoj povus certigi la vere vastan internacian uzadon de la lingvo. Kaj tiam volonte ellernus ĝin ankaŭ la miliardoj da plenkreskuloj, ĉie en la mondo. El tiu ĉi „diabla cirklo" sekvas do la demando: ĉu la lingvoscienculoj rekonas, ke la nuna sistemo de la internacia lingva komunikado estas maldemokratia kaj maljusta? Kaj se jes: ĉu surbaze de la komunikadaj interesoj de la plimulto de la popoloj ili ne havus la sciencan, socian kaj moralan devon, utiligante siajn eblojn, pozitive influi la politikon, kiu povas fari la necesajn decidojn? Ja la registaroj nuntempe tre ofte turnas sin al kompetentaj scienculoj kaj sciencaj institucioj, antaŭ ol fari decidon.

– Mi kredas, ke oni ne rajtas respondecigi la lingvistojn pri la nuna lingva situacio. La lingvoscienco simple ne estas bezonata por konstati la internacian malegalecon inter la naciaj lingvoj. Tio estas okulfrapa statistika fakto, kaj ĝi sekvas evidente el la priskribo de la situacio. Sed estas vero, ke la temon ĉirkaŭas „diabla cirklo", kiu ekzistas ankaŭ sur pluraj aliaj terenoj de la vivo. Ekzemple, la teknika evoluo estas ebla grandparte dank' al la militindustriaj esploroj. Ankaŭ tio estas dolora „diabla cirklo", el kiu la natursciencoluloj kaj inĝenieroj solaj ne povas eliri. Ankaŭ de la lingvoscienco oni ne povas atendi, ke ĝi ekmilitu kontraŭ la mondlingvoj. La lingvoscienco povas konstati, ke ĉirilate ekzistas tre signifa internacia malegaleco, kaj ĝi povas malkovri ties kaŭzojn, faktorojn, krome ĝiajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Sed tute certe la lingvistoj ne havas unuecan opinion pri tio, kiel oni povus helpi en tiu situacio. La lingvoscienco havas signifan taskon sur la kampo de la esplorado de la naciaj lingvoj. Certe ĝi povas emfazi, ke eksperimento pri internacia uzado de artefarita lingvo eventuale ebligus tiri utilajn konkludojn koncerne la elirvojon el la nuna situacio. Sed ĝi ne povas surpreni la gvidadon de la Esperanto-movado, ĉar ĝi havas alian taskon.

Ĉu la scienco devas elpaŝi?

Estus eĉ superflue, ke la lingvoscienco surprenu la gvidadon de la Esperanto-movado. Sed la ekzemplo de la natursciencoluloj, menciitaj de vi, estus sekvebla ankaŭ alirilate. Mi aludas tiujn scienculojn, kiuj elpaŝas kontraŭ la vetarmado kaj la intensa militcela utiligo de la scienco, kaj rifuzas partopreni ekzemple en la „stel-milita" programo. Ĉio ĉi havas grandegan politikan, moralan signifon. Ankaŭ sur aliaj sciencaj terenoj jam okazis, ke scienculoj elpaŝis por grandsignifaj publikaj celoj. Eble ankaŭ de la lingvoscienco oni povus atendi, ke – sen surpreni rolon en la movado – elpaŝu por la konkludoj, tireblaj el la nuna lingvopolitika situacio.

– La afero ne estas tiel evidenta, ĉar la nunan sistemon de la internacia lingvouzo kaj de la lingvaj privilegioj, oni ne povas rigardi danĝero samranga kiel la atoma milito. Do, la elpaŝo kontraŭ la lasta klasiĝas kiel tute alia demando. Pri tio

certe ni samopinias. Kaj ankaŭ tio estas klara, ke la laborantoj de la scienco sur ĉiu kampo havas la rajton, en certa senco eĉ la moralan devon, elpaŝi laŭ sia konvinko por aŭ kontraŭ certa pritakso de difinita publika afero. Sed tio ne nepre signifas, ke la lingvoscienco devas elpaŝi por iu difinita lingvopolitika solvo.

Mi persone opinias, ke la enkonduko de Esperanto en la sferon de la internacia komunikado estas interesa eksperimento, kaj estas grave daŭrigi la komencitan laboron. Kiom oni sukcesos pri ĝi, tion mi ne scias. Unu afero estas certa: en la antaŭvidebla estonteco internacia decido ne estos atingebla. Ekzemple mi, kiel lingvisto, nun ne povus rekomendi al la hungara registaro enkonduki Esperanton en la lernejojn kiel devigan studobjekton.

Tion ankaŭ mi ne rekomendus, eĉ se mi estus ministro kompetenta pri la temo. Mi proponus prefere, ke oni komencu „maturigajn" intertraktojn kun la registaroj de kiel eble plej multaj landoj, por konvinki ilin subteni tiun ĉi aferon. Kaj rezulte de pli longa procezo, la temo de la enkonduko de Esperanto post certa tempo povus veni al la tagordo de UN aŭ UNESKO, kie surbaze de la anticipaj pritraktoj povus naskiĝi internacia kontrakto pri ĝi. Mi certas, ke ankaŭ la plimulto de la amasoj akceptus tian kontrakton entuziasme, se la amaskomunikiloj liverus realajn informojn pri la faktoj tiukampaj.

Faktoj kaj perspektivoj

– La hungara registaro en la internacia lingva politiko strebas unuavice akceli la studadon de la t.n. malmulte disvastiĝintaj lingvoj, interalie tiun de la hungara lingvo. En la konferencoj de la procezo de Helsinki kaj en la kunvenoj de UNESKO ĝi lanĉis tiajn rezoluci-proponojn, al kiuj aliĝis ankaŭ multaj aliaj ŝtatoj. Do, mi ne povas imagi, ke paralele kun tio ni estu ankaŭ la avangardo de la batalo por la enkonduko de Esperanto. Estas evidente, ke la hungara ŝtata gvidado, kiel ĝis nun, ankaŭ en la estonteco donos signifan moralan subtenon al la Esperanto-movado. Sed mi ne kredas, ke estus utile fari la subtenadon al Esperanto parto de la ŝtata politiko aŭ de la ekstera politiko. Mi eĉ ne kredas, ke en la nuna kazo tiaspeca internacia iniciato povus esti realisma, precipe tiam, se ĝi venus de ni. Mi opinias, ke nun estas pli ĝuste resti ĉe la morala subtenado, kaj en la internaciaj forumoj simpatie rilati al la iniciatoj de la Esperanto-movado.

Ne temas pri tio, ke la subtenado al Esperanto fariĝu parto de la ŝtata politiko, ja estas klare, ke tio nun estas nek necesa, nek ebla. Sed ankaŭ sen tio estus bezonate, ke la lingvistoj kaj la registaroj reale alfrontu la faktojn de la nuntempo, kaj jam nun oni komencu la maturigadon de reala kaj efektive demokratia perspektiva decido. Tiel alfrontis la faktojn jam en la jaro 1920 dek kvar registaroj, kiam en la unua sesio de la Ligo de Nacioj ili proponis, ke oni enkonduku Esperanton en la lernejojn de la mondo. Tio estas historia fakto, historia precedenco. Se ili jam tiam trovis aktuala la ĉiamanieran solvon de la internacia lingva komunikada problemo, do en la nuna tempo estas eĉ pli aktuale studi la temon laŭ vidpunktoj tutglobaj kaj longperspektivaj. Ja tia studado estas neevitebla ĉe la prijuĝo de grandsignifaj problemoj.

– Mi kredas, ke nun ni parolas pri la sama afero, nur niaj alirmanieroj estas diferencaj.

Jes, ankaŭ mi pensas tiel. Ĝuste tial la supraj problemoj meritus pridiskutadon en pli vastaj rondoj. Ĉu la Lingvoscienca Instituto de nia malgranda lando, aparte interesita pri la solvado de la problemo, ne povus elformi ian kunlaboradon kun siaj eksterlandaj partneroj por komuna maturigado de novspeca kaj vere demokratia internacia lingvopolitiko?

– Al tiu demando mia respondo estas tre simpla. En nia Instituto nun komenciĝas certaj lingvopolitikaj esploroj. Kaj ĉirilate komencas konturiĝi la ebloj de kunlaborado kun scienculoj alilandaj, okupiĝantaj pri la sama temo. Sed estus ankoraŭ tre frue diri, ke tia internacia kunlaborando vere eblos. Ni mem ŝatus, se tia kunlaborado realiĝus.

Sinjoro profesoro, dankon pro la intervjuo.

Imre Szenes

Esperanto kaj la scienc-teknika revolucio

Alparolo al la intervjuo kun d-ro Péter Várkonyi

Kun granda intereso mi legis la intervjuon kun d-ro Péter Várkonyi, hungara ministro de eksteraj rilatoj, pri la lingvaj problemoj de la internacia komunikado. (HV, 1987/2.) Post pluraj interesaj respondoj li mem faris demandon – kiu egalis kritikon – pri tio, kial Esperanto ne partoprenas en la scienc-teknika revolucio kaj en la komputotekniko?

Tiu demando nediskuteble pruvas, ke la informado de la Esperanto-movado al la ekstermovada sfero estas malforta, nekompleta, kaj ĝi havas malgrandan efikecon, ja la aplikado de Esperanto en la naturscienco kaj en la teknikaj sciencoj povas fieri pri tre riĉaj tradicioj, kaj ĝuste en la lasta jardeko ĝi estas la plej grava tereno de la disvastiĝo de Esperanto. La progreso estas la plej rapida ĝuste sur la tereno de la komputotekniko, kaj inter la diversaj esperantistaj fakuloj ĝuste la komputistoj formas la plej fortan grupon. Pri ĉio ĉi oni povus kompili tre ampleksan raporton, ja ekz. en la internacia konferenco INTERKOMPUTO '82 de la Komputoscienca Societo „János Neumann" ĉ. 100 prelegoj estis faritaj kaj pridiskutitaj esperantlingve fare de la fakuloj alvenintaj el diversaj landoj.

Estas menciinda la evoluigo de la tradukprogramo, okazanta en la nederlanda entrepreno BSO, kiu ĉe tradukado inter du ajnaj lingvoj unue transiras al Esperanto, kaj de ĝi al la cellingvo, atingante per tio grandan precizecon kaj samtempe ekonomiecon. Prijuĝante la programon laŭ la nuna stato de la evoluigo, oni povas konstati, ke ĝi estos konkurkapabla kun la tradukprogramo Eurotra kaj kun aliaj ok-naŭ nun evoluigataj maŝinaj tradukprogramoj. Estas interesa novaĵo (laŭ la prelego de d-ro K. Schubert, farita marte de 1987 en la Leipzig-a foira Esperanto-renkontiĝo), ke oni rezignis pri la modifado de Esperanto kiel pontolingvo, ĉar la Zamenhofa Esperanto ankaŭ en sia originala formo preskaŭ perfekte plenumas la komputilajn postulojn.

Sed la demando de la hungara ministro pri eksteraj rilatoj el alia vidpunkto estas multe pli grava. Ĝi klare pruvas, ke en la nuna epoko nur tiu lingvo povas kalkuli pri rekono, kiun eblas uzi en la internacia scienca komunikado, kaj kiu efektive estas uzata tie. Ju pli intense iu lingvo estas uzata en tiu sfero, des pli granda estas ĝia aŭtoritato, kaj paralele kun tio kreskas ĝiaj ŝancoj disvastiĝi. El tio sekvas, ke, kvankam la nuna scienc-teknika aplikado de Esperanto pruvas ĝian ĉi-kampan aplikeblecon, ankoraŭ necesas prioritate subteni ĝian disvastigon en la scienc-teknika sfero, por ke la ekonomiaj avantaĝoj de ĝia uzado demonstriĝu post nelonga tempo ankaŭ en grandaj dimensioj. Tio faros la pluan disvastiĝon aŭtomata.

D-ro Otto Haszpra
doktoro
de la teknika sciencoj universitata profesoro

Hungara poezio

Miklós Radnóti
(1909-1944)

Dua eklogo

PILOTO

Ni flugis fore nokte, mi ridis prokolere,
super la kap' ĉasuloj zumzumis jam abele,
amik', defendo fortis, pafadis ili ronde,
ĝis nia nova svarmo aperis horizonte.
Oni povintus trafi, balae min kuntiri,
sed tamen mi revenis! kaj morgaŭ povos iri
por bombi, kaj Eŭropo sin kaŝos pro timemo...
Sed fakte! ĉu vi verkis? ĉu pretas jam poemo?

POETO

Mi verkis, kion fari? Poeto verkas, kato
miaŭas, hundo bojas, koketas per frajado
fiŝet' malgranda. Same poet' priverkas ĉion,
kė ankaŭ vi en alto ekkonu mian mion,
kiam eksplodaj domoj ruinas tuj en fumo,
ŝancele inter ili kun vejnoj sanga luno,
ĉifiĝas tiam tuta placaro, la timema,
la spiro tiam haltas, ĉielo 'stat vomema,
jen venas aviadiloj, jen flugas al la foro,
jen ĵetas ili bombojn freneze kun stertoro!
Mi verkas, kion fari? Kaj tio risko-riĉas,
eĉ sola vers' – vi scias? – fragilas kaj kapricas.
Tio – kuraĝo same: poeto verkas, kato
miaŭas, hundo bojas, koketas per frajado...
Kaj tiel plu. Kaj vi do? Nur aŭdi la motoron
vi scias, plu nenion. Ne aŭdi tiun bolon
orelojn ŝiras por vi. Ĝi iĝis via parto.
Kion vi pensas, diru, flugante en la alto?

PILOTO

Priridu min. Mi timas. Sopiras karulinon,
kaj lite, okulferme etendi mian spinon,
aŭ nur pri ŝi zumkanti mallaŭte inter dentoj –
en la kantin-vaporo sovaĝa flugus sentoj.
El alto mi revenus, sur ter' mi estus tie,
en mond' knedita por mi 'stas mia lok' nenie.
Vi pravas: l'aviadilon mi fakte troe amas,
sed en la alto nia dolororitmo samas...
Sed scias vi! Priverkos! Ne estos plu mistero:
kiu nur neniigas, mi estis hom' de Tero,
nun ĉiel-tere fremda. Sed kiu min komprenos?
Ĉu vere?

POETO

Se mi vivos, por viaj pripoemos!

La 27an de Aprilo 1941.

Tradukis: Péter András Rados

Gábor Garai
(1929–)

FRAGMENTO.

Vundoj — inter si infektitaj,
vundoj — ŝiritaj reciproke,
vundoj — senĉese kolektitaj.
Jelpegas lupoj helpovoke.

Vekrioj niaj nun susure
sonas ĉe l' randoj de arbaro,
kvankam ĝiskoras nin sature
la kaŝvundiĝoj kun amaro.

Sed ni eltenis kiel multe
ĝis tiu nia finstertoro:
dentŝiris ni la dorsojn murde —
kuntremas nun ni en doloro...

Tradukis: Imre Szabó

Lőrincz Szabó
(1900-1955)

HÉVÍZ, VINTRE

Kiel vaporas en arbaro blanka
la drakplugita fetorŝlim-kratero
de la reŭmato-murda lag-mistero!
Kiel sin levas akvo frenezanta
ĉielen! kvazaŭ flokus neĝ' lavanga,
supren; aŭ daŭre feinar' eterus,
(sinkaŝe, jes ja, ĉar ĝi jen aperus
kaj alilokas jam, kiam la lanta
rigardo kaptus ĝin). Kiel vaporo
petolas mole! kiel al la foro
disvualiĝas rukte la kamparo!...
Lotuso ruĝas, sur la foliego
someron kvakas rano, la kolego,
kaj borde froston tremas februaro.

El la hungara tradukis: Imre Szabó

Mihály Gergely (1921-)

Fratino Gioconda

Mi vidas, ke via atento ne preteris la unikecon de fratino Mária. Ŝi ekscitis kaj konsternis vin samtempe; ĉu mi adekvate karakterizas la efikon?... Vi trafis, tiu Mona Lisa-rideto kompakte enhavas ŝiajn kompletan personecon kaj tragedion. Kun la kuracisto-kolegoj kaj la pli inteligenta sanitara personaro ni nomas ŝin simple fratino Gioconda... Se vere interesas vin tiu ekstrema homa dramo, mi rakontos al vi la historion de fratino Gioconda. Hodiaŭ nokte mi ja deĵoras, mi devis neatendite enveni por anstataŭ iun mian subkuraciston... Ĉu mi povas regali vin per mokaĵ? Ne, tio ne faras problemon, vi vidas, mi jam eĉ preparis ĝin, mi devasnur ŝalti ĝin.

Jes, ŝia rideto jam ĉe la unua vido al ĉiu revokas la imagon pri Mona Lisa, sed sufiĉas vidi ŝin la duan, la trian fojojn kaj ekscii iometon el la komponantoj de la kurioza rideto... el la kunefikantaj motivoj por kompreni, ke tiu ĉi Gioconda neerareble apartenas al nia epoko. Ĉu vi vidis jam Mona-Lisa-n en originalo en la salono de Louvre, vide al Sejno? Nu, tiam vi eble kapablas reimagi ankaŭ la fonon, pri kiu la estetikistoj kaj laikaj estetikuloj parolas tiom malmulte. La plimulto eĉ ne rimarkas, en kia komponita unueco ekzistas la virino kun sorĉa, ĉasteme koketa... kaj mezurite sinretena rideto kun la pejzaĝo pentrita kun fabele riĉaj, variaj, puraj konturoj kaj paŝtelaj koloroj. Ĉu vi ne provis ankoraŭ vidi ilin aparte? Jes ja, mi trovis, ke eĉ unu sen la alia estas memstaraj, la bildo de la virino kaj tiu de la pejzaĝo, nu tamen, tiel kune... Sed la rideto de fratino Gioconda estas komprenebla nur pere de sia fono, sen tio ĉiu homo, informita iom pri la nervomalsanoj, klarigas tuj ĉion per patologiaj misfunkcioj.

Mi konas ŝin jam dek kvin jarojn, la unuan fojon mi renkontis ŝin printempe de 1951. En la profesio mi estis rigardata ankoraŭ kiel novulo, tamen jam ekde jaroj mi estis ekstera kunlaboranto de tribunalo kiel eksperto pri mensaj malsanoj. Pro kelkaj aferoj mi renkontiĝis kun la tribunalestra juĝisto Jablonkai, la oficaj rilatoj iom post iom profundiĝis je amikaj kontaktoj. La komisiojn li kutime sendis skribe, sed tiun fojon la leteron antaŭis lia telefonado. Tiutage antaŭtagmeze mi devis aperi en alia afero antaŭ la tribunalo, post mia enketado mi eniris al Jablonkai.

Li senvorte metis antaŭ min la maldikan aktaron de iu krimo, sed jam malfermite, kaj tiel, ke mia rigardo kaptu la fotojn faritajn sur la loko de la krimo. La plej supra bildo reprezentis la detalojn de modeste meblita ĉambro kun sofolito, malfermita por dormado, sur ĝi taŭzita, sangoŝmirita litaĵo kaj sur la transa flanko de la sofolito kuŝis kadavro de mortinta knabineto. Videblis klare, ke la infano estas mortinta, kaj tio ankaŭ, kiel surprize, belega ŝi estas... Jes, ŝi estis ne ĉiutaga belulino eĉ mortinte... Ŝi estis eble tri-kvar-jara. Antaŭ ol mi demandus ion, Jablonkai ekparolis.

„Mi estas praktikanta juĝisto dudek jarojn, mi esperis jam havi la bonŝancon, ke mi evitos kondamni homon je morto. Tio iel ĉiam naŭzis min... Sed hieraŭ, kiam mi ricevis tiun ĉi aferon, kaj la dosiero malfermiĝis ĝuste ĉe tiuj fotaĵoj, mi vidis unue tiun ĉi etan malfeliĉulinon, kaj pensis tuj: tiu, kiu povis murdi tiun belegan infanon, ne meritas indulgon." El la buŝo de juĝisto, kaj ĝuste el la lia, ĉio ĉi sonis surprize. Li estis ankoraŭ daŭre sub la influo de la unua impreso, kvankam dume li havis tempon por trastudi la aktojn kaj konsideri la aferon. La juĝisto daŭrigis: „Ankaŭ mia Julnjo estis ĝuste tri kaj duon-jara, aldone, ili similas unu al la alia kiel fratinoj. Aŭ ĉu eble, ke nur mi vidas tiel en la unua konsterniĝon? Mi ne scias... Ĉiukaze plenmotive mi havas la konstaton: tiu virino ne povas esti normala, se ŝi kapablis fari tion. Mi ŝatus, se vi okupiĝus pri ŝi zorgeme. Kaj se vi povas, kiel eble plej

La aktojn de la polica enketado kaj la akuzon mi trakuris dum kvaronhoro, kun doktoro Koroda, oficiala kuracisto-eksperto de la tribunalo, mi interkonsentis pri la dato de la unua esploro. La sekvan tagon mi komencis okupiĝi pri la murdinta patrino, sinjorino Györgyné Ottó. Pri fratino Gioconda.

Mi tre ĝojas, ke mia kafo estis al vi bongusta. Bonvolu nur, vi povas fari notojn trankvile, tio min ne ĝenas.

Por ke vi vidu, kial estis nia fakopinio baze grava en tiu ĉi afero, mi pensas, ke vi devas unue ekkoni mem la krimon. Mi petas pardonon, ĉar post dek kvin jaroj mi ne plu memoras pri ĉiuj detaloj, sed la gravaj momentoj kaj motivoj de la okazintaĵo restis en mi klaraj. Kaj por desegni la fonon al la portreto de fratino Gioconda, laŭ mia prijuĝo, tiom eĉ sufiĉas. Cetere vi vidos; se la historio ne lasos al vi trankvilon, kaj vi volos ĝin priverki, laŭ la nomo kaj jaro de la tribunala pritrakto la materialon povas trovi la tribunalo arkivo dum kelkaj minutoj.

Do, mem la krimo... Okazis komence de decembro aŭ januaro, ke en iu duetaĝa domo en la strato Mátyás király iu virino demandis la alian, ĉu ŝi vidis jam tiutage sinjorinon Györgyné Ottó, ĉar ŝi ankoraŭ ne renkontis ŝin, kvankam ŝi loĝas en la najbaraĵo. La maljuna kunluantino respondis, ke ankaŭ ŝi ne vidis ilin, ŝi iris veršajne en sian laborejon por aranĝi sian disciplin-proceson, la antaŭan tagon ŝi menciis pri tiu sia intenco. Eblas, ke ili foriris jam frue, kiam ŝi, kutime, dormis iomete ankoraŭ, ja ŝi aŭdis tra la muro jam frumatene moviĝetojn, paroladon. La najbarino posttagmeze denove interesiĝis ĉe la kunluantino, sed tiam, post la nova nea respondo, ŝi petis permeson eniri en la komunan vestiblon de la kunluata loĝejo, kaj ŝi frapetis sur la pordo de sinjorino Ottó. Al la plurfoja strebado venis nenia respondo, do ankaŭ la knabineto ne estas hejme; la najbarino ĉagreniĝis, ke la eble sola lasita infano malsatas. Fine venis al ŝi en la kapon, kaj ŝi kaše enrigardis tra ŝlosiltruo. Ŝi konstatis surprizite, ke la ŝlosilo estas interne en la seruro. Suspektante malbonon, ŝi enkuris al la domzorganto. La pordo, ŝlosita deinterne, grandigis en ĉagrenigan signon la antaŭnelonge diritan rimarkon de la domzorganto: en la loĝejo de Györgyné Ottó la ŝutro estas mallevita breĉe, preskaŭ plene, kaj malantaŭ ĝi lumas la elektra lampo. Somere, en la semajnoj de la varmego, tio estas ĝenerala tiom, ke oni eĉ ne rimarkas la aferon, sed vintre?...

La domzorganto sciis, kio estas la farendaĵo en tia situacio, post kelkaj minutoj li revenis kun juna policano, kaj ili triope ekiris al la unua etaĝo. La domzorganto kunportis ŝlosilojn, inter ili falsan ŝlosilon, sed vane li strebadis ĉe la seruro. Ĝis tiam ariĝis jam multaj el la samdomanoj, la ekscitiĝo kreskis; por la domzorganto sufiĉis la senvorta kapjeso de la policano, li per malgranda puŝo malfermis la pordon. La policano kun la domzorganto kaj la najbarino enpaŝis la loĝejon. Interne li baris la vojon per seĝo, por ke la scivolemaj homoj ne sekvu ilin kaj

ne malaperigu la spurojn de la eventuala krimo, kaj post tio li ekiris internen, tra la vestiblo, kuirejo. Premante la naztukon al la buŝo, la serĝento singardeme malfermis la pordon de la ĉambro. Ilin akceptis teura vidaĵo: sur la sofolito, sur la sangoŝmirita litaĵo kuŝis sinjorino Ottó kaj ŝia filino, senvivaj... La serĝento ordonis halton al la akompanantoj, li iris sola al la sofolito, kaj per palpado li konstatis la staton de la du homoj. La virino oscedadis timigaj vundoj, profunda piko super la maldekstra mamo, ĉirkaŭ la koro, kaj kvar pli malgrandaj vundoj inter la kolo kaj la ŝultroj. La korpo de la infano jam malvarmiĝis, la policano trovis sur ŝi nenian eksteran vundon. En la najbaraĵo estis telefono, de tie li raportis al la polica centro. Ene de kelkaj minutoj alvenis la gvidanto de la kriminala grupo kun du kunlaborantoj, post iom da tempo alkuris la ambulanco. Oni faris plurajn fotojn pri la loko, kaj poste la ambulancistoj forportis sinjorinon Ottó.

La policoficiro, gvidanta la enketon, devis komenci la esploradon ĉe la pridemandado de la samdomanoj. El la leteroj, trovitaj dum la traserĉado de la loĝejo, li povis ekscii la adreson de la eksedzo, translogiĝinta antaŭ duonjaro. Li ordonis deklarigi la iaman edzon. La senadresa adiaŭletero, kušanta sur la tablo, malkašis tre malmulte. Jes, mi pensas, ke tiun adiaŭleteron mi kopiis... Se mi ne eraras, ĝi troviĝas en la dosiero kun miaj ekspertaj opinioj. Jes, jen ĝi. Ĉu mi laŭtlegu ĝin? Entute kelkaj linioj.

„Mi esperas, ke mi ne plu estos baro sur la vojo de iu ajn. Mia bona patro, pardonu min, sed kredu, estas pli bone tiel, ĉar ne eltenos jam longe mia koro, kaj la penso, ke mia etulino Gyöngyi estos orfa, frenezigas min ĉiel.

Venu prefere la plej granda krimo. Pardonu min ĉiu, al kiu mi kaŭzis ĉagrenon aŭ kiun mi ofendis per mia ĉeesto. Nun jam povas ĝoji miaj akuzantoj. Estas bonŝance por ili, ke mi estas jam laca por povi elteni tiom multe. Mi petas, metu min en la saman lokon kun mia infano, por ke neniam mi devu disiĝi de ŝi. Sinjorino Ottó."

Vidu, kiel inteligentaj, belaj estas ŝiaj literoj. Kaj atentu, ke ŝia sinregado sufiĉis nur por la komencaj du linioj, ĉe la sekvaj ŝi jam ĉagrenite malpaciencis, la lastan linion kaj la subskribon jam neniu povas legi krom mi... Pripensu, ke ŝi skribis tiun leteron matene je la sepa, murdinte la infanon. Tio estas la nekutima, ke ŝi skribis la leteron ne antaŭ la plenumo de la faro, sed dume. Ankaŭ tio suspektigis ion pri ŝia terure forta deciditeco, same kiel la larĝaj vundoj sur ŝia korpo. La spuroj, trovitaj surloke, pruvas, ke tiu virino volis morti ĉiel. Mi ne forgesu: sur la tablo apud la adiaŭletero estis trovitaj medikamentaj fioloj kaj skatoloj, malplenaj skatoloj de fortaj dormigiloj kiel Dorlotyn, Tardyl, kaj glaso, sur kies fundo restis kelkaj gutoj da lakteca, blanka likvaĵo. La glaso estis sendita al la laboratoria analizado, la fingropremoj sur la klinko estis fiksitaj por scii, ĉu hazarde ne iu tria persono faris ĉion ĉi. Vi scias, en tiaj kazoj oni devas esplori ankaŭ tiun eblon. Per ekskluda metodo malvastigi la cirklon, klarigi la cirkonstancojn.

De la samdomanoj, specife de la maljuna, soleca kunluantino, la policoficiro ricevis konvinkan elirpunkton, iliajn informojn sekvatage sinjorino Ottó konfirmis en ĉio. La unuan tagon la hospitalo ne permesis pridemandi la virinon spite al tio, ke post la kirurgia interveno, post la ĉesigo de la sangado ŝi rekonsciiĝis por mallonga tempo. Ŝia stato estis mortodanĝere kriza, tial oni devis prokrasti la pridemandadon ĝis la sekva tago.

La deklaron de sinjorino Ottó mi rakontas laŭ la polica protokolo... Ankaŭ tiu protokolo estis mallonga, ĝi koncentriĝis al la kvalifikite gravaj momentoj same, kiel ĉiuj aliaj enketdokumentoj. Unu semajnon antaŭ la okazaĵo, la laborejo denuncis sinjorinonttó. La gvidanto de la ĉiovendejo akuzis ŝin pri defraŭdo. Mi ne memoras precize, ne troveblas en miaj notoj, sed temis pri iu bagatela sumo. Eble eĉ ne estis ĝis cent forintoj. Jes, tutcerte, estis eĉ ne cent forintoj... Laŭ la denunco, sinjorino Ottó kiel kasistino manipulis ion per la kaso. Ŝi puŝis sur la klavaro ne ciferojn, nur nulojn, sed la monon ŝi prenis de la ačetanto, kaj metis ĝin en sian poŝon. Kaj ĉiam la prezon nur de unu aŭ du duoblaj kafoj, pri tio mi certe memoras... Apenaŭ kvar-kvin tiaj kazoj okazis, laŭ la deklaro de la kafkuiristino, nu do, kiel mi diras, malgrava sumo... La vendejestro tamen denuncis ŝin, li tuj vokis la revizoron de la entrepreno, kiu tamen ne trovis malregulaĵon sur la tiutaga fakturrulaĵo krom kelkaj nulsumoj. Sed la kasmašino National montris nulon ankaŭ tiam, se ĝia funkciiganto hazarde tuŝis iun brakon. Ili trovis tamen dekforintan monbileton, falditan kvaroble, en la oficejo de la vendejestro, sur la ŝtonplanko, lavita antaŭ nelonge, ili kalumniis sinjorinon Ottó, ke ŝi faligis ĝin, tiel ŝi volis liberiĝi de la krimdokumento jam antaŭ la enketo, tial ŝi povis postuli poste tiel trankvile, ke oni traserĉu ŝiajn poŝojn, kaj ke eĉ la polico povas esplori la akuzon, ŝi ne havas kaŭzon timi... Tiutage oni vere portis ŝin en la policejon, kaj tiun nokton ŝi pasigis en la ĉelo de arestitoj. Laŭ la enketo, tiu nokto havis la plej grandan rolon en la decidiĝo de sinjorino Ottó, ties impresoj donis la finan puŝon.

Eĉ se ŝi faris tion, ŝia kulpo estis bagatela en tiu periodo, kiam homoj grandanombre estis enkarcerigitaj kaj pendumitaj pro la akuzo de spionado, patrujperfido, sabotado, komploto... La deklarigo ne daŭris longe, poste ŝi estis eskortata en la gardkarceron. Kiel ŝi rakontis dum niaj esploroj, ŝi ne pensis pri tio, ke la polico prenas serioze ĉion ĉi, estis tiom evidenta la senbazeco de la kalumnio. Ŝi pensis, ke oni simple deklarigas kaj poste ellasos ŝin. Kiam oni kondukis ŝin en la komunan ĉelon, jam tiam estis tie tro multaj, sed dum la nokto venis novaj arestitoj. Post noktomezo du knabinoj, dek kvin-, dek ses-jaraj, ili estis kaptitaj pro laborevitado kaj por-profita prostituĵo. En iu kavemo de la monto Gellért ili fiaskis, kie ili loĝis plurajn semajnojn, kaj kien ili invitis la virojn. Ili ambaŭ havis amaton, al kiuj ili donis la akiritan monon, kaj ili kvarope aranĝis grandajn orgiojn. Tio, kion la knabinoj rakontis, kaj tio, kiel ili parolis, ilia terure senmorala sinteno havis pereigan impreson al sinjorino Ottó. Ŝi havis kialon kredi, ke la vendejestro kaj liaj kunuloj tamen sukcesos pruvi la akuzon, kaj ŝi restos senkulpe en la malliberejo. Por monatoj, jaroj, tion tiutempe vere ne eblis antaŭdiri, li rememoras pri tiuj jaroj; la tribunaloj pli kaj pli malofte juĝis laŭ la paragrafoj de la kriminala kodo, la decidojn tre ofte motivis vidpunktoj ekster la suverena tereno de justico. Ankaŭ sinjorino Ottó vivis en tiu medio, ŝiaj trudpensoj pri la grava puno ĉiel estis bazitaj kaj kredeblaj. Sed en la febre ekmuelanta mekanismo de ŝiaj imagoj ne ŝi mem estis la plej ĉagrena punkto, sed la filino. Ŝi diris, ke tiunokte ŝi povis ekdormi eĉ ne por unusola minuto, ŝin turmentis senĉese koŝmaro: la edzo forlasis ŝin, li eksedziĝis, li eĉ ne vidis la infanon de tiam, li ne scivolemis pri ŝi, ŝi enkarceriĝis, kiu povas scii, por kiom da tempo; kio okazos tiel al la infano?, kiu edukos ŝin, kaj eĉ se iu plenedukos ŝin, kio ŝi fariĝos? Ĉu tia malĉasta knabino, kiaj tiuj du junaj kunulinoj en ŝia terura nokto?... Ne, ŝia infano neniam fariĝos tia!...

Post kiam ŝi alvenis ĉe tiu ĉi punkto en la dedukto, zumis en ŝia kapo nur, ke ŝi liberiĝu eĉ se nur por sola tago por povi fari ĉion, kion ŝi devas plenumi por la interesoj de la infano. Kaj, evidente, ankaŭ por ŝiaj propraj interesoj, ĉar ŝi ne reiros en la malliberejon, se ŝi foje jam liberiĝis, ŝi decidis ankaŭ pri tio.

La sekvan tagon tagmeze ŝi estis ellasita. Bedaŭrinde anstataŭ trankviligi ŝin, oni eĉ plie timigis la malfeličan virinon per la tiam praktikata, bone konata sekretumado, stulta orgojlo.

Pasis ses tagoj ankoraŭ en la instinkta kročiĝo al la vivo kaj en la timo pro la malhela estonto kun la infano. Ŝi iris plurfoje al la sekcio de la personaraj aferoj en la vendejentrepreno, ŝi urĝis esplori ŝian aferon, sed oni nur promesadis al ŝi

malvalidigi la decidon pri la interrompo de ŝia laborkontrakto. Okazis eĉ, ke la koncerna aferŝarĝito ne akceptis ŝin, kvankam sinjorino Ottó sciis bone, ke li enestas. Estis grava motivo ankaŭ tio, ke ŝi rimarkis, kiel kaŝridetis pri ŝi du kolegoj kun malica ĝojo, kiam ŝi volis paroli kun la ĉefo de la magazen-entrepreno. La ekstreme sentema virino jam ne povis regi super la novaj ŝokaj influoj, ŝia decido maturiĝis definitive.

Ŝi volis plenumi la finan aferon vespere. En glaso ŝi solvis dek ses Dorlotyn-ojn, dudek Tardyl-ojn, dek unu bromtablojdojn, sed kiam ŝi volis doni la solvaĵon al la infano, venis al ŝi en la kapon, ke ŝi ne trinkos ĝin, ĉar ŝi ĉiam abomenis la medikamentojn. La gason ŝi ne volis malfermi pro la soleca virino vivanta kun ili en la sama loĝejo. Intertempe la infano endormiĝis, kaj ŝi fariĝis senpova kontraŭ la dormanta infano. Ŝi zorgeme kovris la filinon kaj kuŝiĝis apud ŝi, vestita, kaj ŝi rigardis ŝin... Dum horoj ŝi nur rigardis la belegan malgrandan homon, la grandan deziron de sia vivo, la trian, kiu restis por ŝi, ĉar ĉe la unuaj du ŝi abortis. Ŝi eĉ ne deturnis sian rigardon de ŝi, tiel pasis la horoj, kaj dume ŝi repensis pri sia tuta malsukcesa vivo. La saldo ĉiukaze estis por la memdecidita morto. La filineto vekiĝis frumatene, kaj diris, ke ŝi ŝatus ludi, ili ludu vojaĝon. Ili pakos ĉion, kaj ili vojaĝos malproksimen... Jes, ili forvojaĝos, ili vojaĝos tre-tre malproksimen; tiel eĥis en la virino la vortoj de la infano. La knabineto tordis viŝtukon ĉirkaŭ sia kolo, ĝi estos la ŝalo, ĉar estas aĉe malvarme, kaj ŝi ne volonte sentas malvarmon. Kaj la virino, jam-jam duone freneza, laŭ la ideo proponata de la situacio, kaptis la du ekstremaĵojn de la viŝtuko, kaj ŝi furioze premis la maldikan kolon de la infano, ĝis ŝiaj baraktantaj membroj senmoviĝis. Kiam ŝi ne plu aŭdis ŝian spiradon, ŝi bele rekuŝigis ŝin en la liton, kovrante ŝin eĉ per la peplomo, kvazaŭ ŝi gardus ŝin kontraŭ la malvarmo. Kaj ŝi kuŝiĝis denove apud ŝi, brakumadis, kisadis ŝin kaj ploris, ploris forgesante pri la tempo, pri la mondo, pri si mem. Kiam ŝi povis denove kolekti siajn pensojn, ŝi skribis sian adiaŭleteron, poste ŝi ĵetis ĉiujn troveblajn medikamentojn en la solvaĵon, atendantan sur la tablo devespere, kaj ŝi trinkis ĝin. Ŝi rekuŝis apud la infanon kaj atendis la efikon. Sed, post nelonga tempo, antaŭ ol la dormigiloj narkotus ŝin, ŝin kaptis intensa laksado. Verŝajne ankaŭ laksigaj tablojdoj abunde eniris la solvaĵon, kaj ili malhelpis la sorbiĝon de la venenoj... Liberiĝinte de siaj stomakospasmoj, ŝi elektis en la kuirejo la plej akran tranĉilon, rekuŝis apud la infanon, malvarmiĝintan jam preskaŭ plene, ŝi metis la tranĉilon super sian koron, kaj per granda forto ŝi pikis ĝin en sin mem. Ŝi perdis la konscion. Post kelkaj horoj ŝi rekonsciiĝis. Ŝi sentis, ke pro la sangoperdo ŝi malfortiĝis, tamen per la restintaj fortoj ŝi ankoraŭ kvar fojojn pikis en sian kolon. Iam ŝi lernis, ke ie tie estas dikaj arterioj, kaj unu piko trafos iun el ili. Denove malheliĝis ĉio por ŝi, kaj ŝi vekiĝis nur en la hospitalo.

Estas tiom, kion sinjorino Ottó diris pri siaj motivoj al la deklariga ĉefleŭtenanto, kaj tiom eĉ sufiĉis por la policoficiro. La duan fojon ŝi parolis ankoraŭ pri sia edzo, pri tio, ke li eksedziĝis, sed pri tio, kial li forlasis ilin, ŝi preferis silenti. Kaj ŝajnas, ke estis sufiĉe diskreta, aŭ mi ne scias, kia, tiu armea oficiro, ŝia iama edzo, ĉar ankaŭ li ne parolis pri la veraj cirkonstancoj de la divorco. Ankaŭ al mi sinjorino Ottó konigis ilin nur en la tria parolado.

Ŝi kuŝis en la hoŝpitalo tri semajnojn. La sindromo, fiksita tie, ĉar ankaŭ ĝin mi notis por mi kontrolcele, estis: „intox. narco. suicidum. Vulnus puct. colli et pectoris l. son. Hydropneumothorax art. l. d. (Pervenena suicido farita per dormigiloj. Pikitaj vundoj sur la kolo kaj torako. Hidropneŭmotorako kun likvaĵkolektiĝo)"... Laŭ la ĉefkuracisto de la sekcio pri interna malsanoj, sinjorino Ottó en la hospitalo kondutis „rigide", ŝi neniam parolis spontanee, ŝi respondis al la demandoj nur per kelkaj vortoj.

Ŝia ahospitala flegado inkludis preskaŭ nur la postkuracadon de la vundoj kaj la venenado, kaj pasis tri monatoj, ĝis ŝi estis sendita al ni por psikiatria esploro, kvankam ŝia sanstato dekomence postulus kompetentan neŭrologian terapion. Vere, post ke ni konstatis tion kun kolego Koroda, sekvis nova monato ĝis la tribunala traktado, kiam ni fine povis ekkuraci la nervomalsanan virinon.

Pardonu min, mi eĉ ne demandis, ĉu vi fumas?... Feliĉulo vi estas, se vi povas vivi sen tio; mi ĉiutage forfumas unu kaj duonan skatolojn da Symphonia... Bonvolu!... Venu nur trankvile, fratino Mária, vi ne ĝenas. Ĉu jam denove la Mesio?... Pardonu min, mi devas vin lasi sola por kelkaj minutoj. Ni havas novan malsanulinon, ŝi venis al ni antaŭ du semajnoj, ŝi havas la fiksan ideon, ke ŝi estas Jesuo Kristo, kaj de tempo al tempo ŝi faras longajn surmontajn predikojn. Ŝia malagrable fajfanta, kantaĉa voĉo, evidente, maltrankviligas ŝiajn samĉambranojn, tiam ne estas facile repaciĝi ilin. Bonvolu, dume vi povas traserĉadi tiujn notojn, espereble vi povos orientiĝi en ili. Kiel vi fartas, kara fratino Mária, ĉu ne, hodiaŭ mi ankoraŭ ne demandis pri tio?... Mi ĝojas aŭdi ankaŭ hodiaŭ, ke vi fartas bone. Baldaŭ komenciĝos en la televido la vespera filmo, mi esperas, ke vi spektos ĝin. Mi proponas varme... Ni iru, ni endormigos Jesuon rapide, kaj vi povos iri tuj kun la pasantaj malsanulinoj en la televidilan ĉambron....

Nu, ĉu vi bone observis fratinon Gioconda?... Mi parolis kun ŝi kelkajn vortojn, por ke vi povu dume observi ŝin nerimarkeble. Estus utile, se vi decidus priverki la historion. Vi pravas, hodiaŭ jam neniu suspektus ion pri ŝia terura pasinto, sed en la unuaj esploroj estis malfacile ŝin ekparoligi. Ŝi nur ploris, ploregis, tio okazis monatojn post la krimo, kvankam pri la murdo, pri la filineto ni starigis eĉ ne unusolan demandon. Fine ŝi inklinis paroli pri sia infanaĝo. Pri la infanaĝo, kiu en la memoro de plenkreskulo beliĝas je fabelmondo, sed ŝi konservis nur la spasmojn, nur la vundojn. Aŭ eĉ pli precize: kompreneble, en tiu situacio revenis laŭvice tiuj ŝiaj memoroj. Ni vidu, kiel mi fiksis ilin en miaj notoj.

Ŝia skarlatino kaj la morto de la pli juna fratino... Ŝi estis okjara, kiam ŝi malsaniĝis je skarlatino. Ŝi resaniĝis, sed la fratino ricevis de ŝi la malsanon, kaj tiu mortis... Ĝis tiam, ŝi sentis tiel, ke la gepatroj same amis ilin ambaŭ, sed de tiu momento ŝi fariĝis la kaŭzo de la morto de la fratino, tiel ŝi komprenis la rimarkojn de la gepatroj. Kaj kvankam ankaŭ ŝi estis bela knabino, ili eĉ ne menciis ŝian belecon, ili parolis senĉese nur pri ŝia fratino, mortinta frue, ke ŝi fariĝus kiel belega junulino... Mi pensas, ke la tragedio de tiu malfeliĉa virino komenciĝis tiam, kaj plej multe malutilis al ŝi, eĉ nevole, la kamparanaj gepatroj, kiuj eĉ konjekton ne havis pri pedagogio... Imagu vin en la situacio de la knabino, nekutime saĝa kaj sentema en tiu medio, en kiu jam tiutempe venene ekfunkciis aliaj influoj. Fratino Mária sincere amis sian unusolan fratinon, ŝi amis siajn gepatrojn, la morto de la fratino turmentis ankaŭ ŝin dum monatoj: tiu damaĝo de la nervoj, kiun ŝi devis suferi pere de tio, sufiĉus eĉ en si mem. La konduto de la sensuspekte maldelikataj gepatroj rapide estigis en ŝi la unuan longdaŭran konsciencriproĉon: ŝi kaŭzis la morton de la fratino kaj la nerekompenceblan doloron de la amataj gepatroj. Vidu, nun venas al mi en la kapon eĉ tio, kion fratino Mária ne tiam, sed poste menciis: kiom terure estis vidi la patrinon dum la entombiga ceremonio. Ŝi kun senbridiĝinta cerbo ŝrikadis, ŝi volis salti en la tombon al la filino, fine ŝi svenis. La senkonscia reago de la difektit-anima knabino estis tre trafa, ŝi havis la senton, ke la patrino troludas sian rolon, jam-jam aktorante. Mi pensas, ke tiu troludo ankaŭ poste restis en la patrino, multe malutilante per ĝi al ŝia unusola vivanta infano.

La familiaj kvereloj... La patrino estis romkatolika, kaj kiel eblas suspekti jam el la ĝisnunaj, ŝi estis troigema ankaŭ en la religio, kio ofte ne plaĉis al la kalvinana patro, al la pli rigora kamparana viro kun pli reala pensmaniero. Mária, kvankam ŝi estas baptita je la religio de la patrino, sentis inklinon prefere al la patro, se estis eble, dimanĉe ŝi akompanis patron en la preĝejon, tie ŝi sentis sin pli bone. Bedaŭrinde, ŝi povis fari tion malofte, ĉar la patrino ĵaluze gardis ŝin. La gepatroj estis cetere pacemaj homoj, sed pro la religiaj malsamaj vidmanieroj ili ofte interbruis, Mária multe suferis ankaŭ pro ĉio ĉi.

La vundoj de la malriĉeco... Ambaŭ el la gepatroj portis iom da havaĵo en la geedzecon; la patro havis domon, ilia dupoa heredaĵo estis entute ses arpentoj da agro. Unuvorte, la tipa etkamparana sorto: senĉesa, malfacilega laboro kaj malsato al la tero... Ankaŭ la gepatroj de Mária laboris por tio, por vivteni sin, por akiri kelkajn arpentojn kaj tiel eliri el la prema malriĉeco. Kiam Mária finis la kvaran klason de la elementa lernejo, ili havis jam dek unu arpentojn, ankaŭ la prestiĝo de la familio leviĝis iom en la vilaĝo, oni komencis estimi ŝian patron, la bonan mastron, la lertamanan ĝardeniston. Tamen ilia stato ne boniĝis tiom, ke ili povus konkuri kun la ŝvabaj kamparanoj, apartenantaj al la pli riĉa tavolo de la vilaĝo, kiuj vestis siajn infanojn, precipe la filinojn, kvazaŭ tiuj estus fraŭlinoj de la urbaj burĝoj. Pro la malriĉeta vesto ankaŭ Mária estis ofte primokata, kaj tio faris la infanon eĉ plie retiriĝema kaj enfermiĝema.

La konflikto inter la ambicioj kaj la ebloj... Mária estis ekstreme saĝa infano, ŝi finis la unuajn kvar klasojn kun eminenta rezulto, kaj pro la konvinko de la instruisto la gepatroj enskribigis ŝin al la porburĝa lernejo. Kun tiu kondiĉo, se ŝi tenos siajn bonajn rezultojn ankaŭ en la porburĝa lernejo, ŝi povos lerni plu, ŝi povos fariĝi kuracistino aŭ mezlerneja profesorino, kio estis tiutempe jam firma deziro de la infano. Ŝi finstudis ankaŭ la porburĝan lernejon kun diplomo elstara, sed la gepatroj tiam rezignis pri la daŭrigo. Somere de 1940 tio estas tute komprenebla ĉe kamparana familio kun dek unu arpentoj. La patro, rezerva subserĝento, finfaris jam la okupacian enmarŝadon al Košice kaj al la Sub-Karpata regiono, kaj li atendis, kaj li povis antaŭvidi, ke la alproksimiĝo de la milito por li portos soldatservon ĉe la fronto, eble sekvos la morto, invalideco aŭ militkaptiteco. Ĉio ĉi okazis vere tiel. Somere de 1941 la patro estis mobilizita inter la unuaj kaj sendita al la fronto, de kie li rehejmiĝis post duonjaro, kun grava vundiĝo, invalide. Mária devis helpi en la kampa laboro, sed ja, la lertan mastron eĉ du virinoj ne povis anstataŭi.

La trompiĝoj de la edukantino... En 1942, post la resaniĝo kaj ekssoldatiĝo de la patro, la gepatroj lasis la filinon dungiĝi kiel edukantino de filino de familio kun mezgranda bieno en la najbara vilaĝo. Ŝi estis tiam dek ses-jara, preskaŭ matura, okulalloga junulino kun bona konduto, fajna gusto, la membroj de la riĉa familio ekŝatis kaj alte taksis ŝin. Ŝi rememoras pri tiuj kelkaj monatoj, kiel pri la plej bela periodo de sia vivo, kiam abrupte malkaŝiĝis por ŝi tiom da nekonataj ĝojoj de la vivo. La ĝojo pro la interesaj konversacioj pri variaj temoj, pro la legado, pro la bona literaturo. Ŝi povis laŭtlegi sentoplene, tial, post ke tio altiris la atenton, eĉ la plenkreskuloj volonte aŭskultis ŝin, ŝi devis laŭtlegi po kelkaj horoj ĉiutage al la maljuna patrino de la bienposedanto. La parencaj kaj konataj junuloj, vizitante la familion, traktis ŝin preskaŭ kiel samrangan, ili nomis ŝin fraŭlino Mária, eĉ troviĝis iuj, kiuj provis amindumi al ŝi. Tiu memorinda periodo finiĝis per la somerumado. La familio, vojaĝanta al Budapeŝto por la someraj ferioj, kunportis ankaŭ ŝin, sed tie ŝiaj malriĉa vesto kaj nepraktikata konduto estis multe okulfrapa, la junaj viroj de la societo rigardis ŝin nur duonkulturita kamparana knabino, kaj okazis du fojojn, ke la enuantaj junuloj ĉikanis ŝin hontige. Mária pro tio ĉagreniĝis tiom, ke ŝi tuj eksiĝis el la laboro kaj reveturis en sian vilaĝon.

La unua geedzeco... La bienista familio, reveninte el la somerumado, revokis Mária-n, tiom ili ŝatis ŝin, precipe la maljunulino ne povis malhavi ŝin. Ili invitis ŝin plurfoje, ili promesis pli altan salajron, tiel ŝi aŭtune daŭrigis la edukantinan vivon. El la nova salajro ŝi povis pli bele vesti sin, ŝi komencis koni la karakteron de tiu mondo, ŝi povis orientiĝi en ĝi pli bone, sed ŝiaj malsaneska sentemo kaj suspektema sinreteno restis senŝanĝaj. La bienposedanto renovigis sian kastelon, la laboron direktis juna konstrumajstro. Tra semajnoj li logis tie en iu el la gastĉambroj, li manĝis kun la multmembra familio, li pasigis eĉ la vesperojn kune kun ili. Ĉiu rimarkis jam en la unuaj tagoj, kiom ekplaĉis al li la juna edukantino, sed Mária, pro la nekaŝita proksimiĝo de la konstrumajstro, fariĝis eĉ pli singarda. Ŝi ne povis nei, ke plaĉis al ŝi la amindumado de la riĉa, ĉarmvizaĝa viro, lia baldaŭa propono pri geedziĝo, tamen printempiĝis, kiam ŝi diris jeson. Ĉu ŝi amis tiun viron?... Ĝis la renkontiĝo kun la dua edzo, ŝi kredis, ke ŝi amas lin, sed la veran amon ŝi ekkonis nur kun Ottó, post li ne plu estis viro en ŝia vivo. Tamen ni restu ankoraŭ ĉe ŝia unua edzineco. Estas evidente, ke estis flata, alloga eblo por filino de etkamparano edziniĝi al iom riĉa konstrumajstro, loĝanta en urbo, eniri la rangan societon, se ŝi sola, pere de sia propra edukiteco, ne povis supreniri tien, ĉar ŝi devis definitive rezigni pri sia infanaĝa revo: fariĝi kuracistino aŭ instruistino. La edzo – laŭ sia propra maniero – amis ŝin, li vestis ŝin kiel grafinon, ĉar li estis tre malmodesta homo, kaj en societoj li fiere montradis sian junan, belan edzinon. Mi diras, li amis sian edzinon propramaniere; tio estas, ke li ne forlasis la kartludon, drinkadon kaj virinumadon. Mária ĉion ĉi ne volis kredi, la unuajn tiajn flustrojn ŝi eĉ ne finaŭskultis, sed la flustroj obstine ripetiĝis, la klaĉado fariĝis pli laŭta, ŝi devis aŭdi ĝin... Ŝi preskaŭ malsaniĝis pro la trompiĝo. Ŝi gravedis kun la unua infano, pro la ŝoko ŝi abortis. Ŝi volis rehejmiĝi al la gepatroj, sed la viro ne lasis tion. Li gardigis, enŝlosis, minacis ŝin, kaj li ĵuris pri reboniĝo, nur ŝi ne forlasu lin. Kaj poste iunokte la viro kartludante perdis sian tutan havaĵon, domon kune kun la mebloj, kaj poste li pafis al si en la kapon. Mária estis graveda denove, kaj ŝi abortis denove, kvankam tiam, spite al ĉio ĉi, ŝi tre volus havi infanon, esperante, ke eble la familio povos teni la edzon hejme.

Ĉe la Kinoentrepreno... Mária restis sola, en la domo estis lasita por ŝi nur loĝejo kun ĉambro kaj kuirejo, vere, tio kontentigis ŝin. Ŝi ne volis jam reloĝiĝi al la gepatroj, intertempe ŝi tro malproksimiĝis disde tiu vivoformo. Troviĝis bonvolaj konatoj, kiuj pretis helpi, tiel ŝi rapide ricevis laborlokon ĉe la kino. Sekvis la liberiĝo, ŝi finstudis uzinmastran kurson, oni nomumis ŝin tuj anstataŭanta uzinestro... Multaj viroj flirtadis ĉirkaŭ la bela vidvino, multaj amindumus al ŝi, sed ŝi preskaŭ malsaneske timis ilin, ŝi akceptis el ili neniun en sian konfidon. Tamen baldaŭ aperis la viro, kiu gustumigis la amon al ŝi. En la urbo alvenis nova distrikta partisekretario, ankoraŭ fraŭlo, iama instrumentisto, bonkonduta, bonaspekta. Ĉio okazis tiel, kiel estas preskribita en la granda libro de amo: ĉe la unua renkontiĝo ili enamiĝis unu al la alia, post unu monato ili estis edzo-edzino. Antaŭe mi vortumis malprecize; en la vivo de Mária la monatoj de la edukantina laboro estis la unua memorinda periodo, sed la feliĉan etapon de ŝia vivo alportis ŝia dua edzineco. Mi pensas, ke sekrete ŝin eĉ nun vivigas ties memoro. Ŝi amis sian edzon fanatike, ŝi eĉ ne rimarkis liajn mankojn, vantaĵojn, karieremon, ŝi vidis nur liajn virtojn, kaj tiujn ŝi grandigis, ĝis ili kovris ĉion antaŭ ŝi. Fine ŝi renkontiĝis kun iu, apud kiu solviĝis ŝiaj spasmoj, inhiboj el la nervoj, al kiu ŝi transdonis sin korpe-anime senrezerve. Kaj kronumante ĉion naskiĝis ŝia filineto. Ŝ ia amo al la edzo estas eĉ en tio, kiel ŝi serĉis nomon al la filineto. La nomo de la edzo estis György, kaj ŝi nomis la filinon Györgyi; do jes, ankaŭ vi sentas la kompletan sindonemon de enamiĝinta

virino, ĉu?... En 1948 estis lanĉita la unua staboficira kurso en la popolarmeo, la departementa partia komitato proponis ankaŭ ŝian edzon, kaj li ĝoje akceptis la distingan komision. Post duonjaro li estis jam majoro, ili transloĝiĝis al Budapeŝto... En ilia duopa kontakto, en la familia vivo ŝanĝiĝis nenio, eĉ; pro la pliboniĝintaj materiaj cirkonstancoj kun malpli da zorgoj ili povis vivi unu por la alia pli senĝene. La viro laboris multe, li venis hejmen ofte nur malfruvespere, sed Mária vidis el ĉio ĉi nur, ke ŝia edzo ŝatas sian laboron. Intertempe ankaŭ en ŝi maturiĝis la decido, ili donos la infanon en durntagan vartejon, kaj ŝi iros labori kaj dume plulernos. En ŝi renaskiĝis la malnova decido. Sed la edzo en tiu temo estis malcedema: li, havante tian oficon kaj salajron, ne povas permesi al la edzino, ke ŝi laboru, krome por ŝi studi estas superflue, ŝi posedas la bezonatan klerecon eĉ tiel, en societo ili devis ĝis nun neniam ruĝiĝi pro honto. Ŝi vivu nur por la familio, por ilia filino, kiu havas tiel senteman stomakon, ke ili ne povus doni ŝin en la vartejon... Mária post kelkaj monatoj denove prezentis sian deziron, sed tiom decidinte, ke la viro cedis. Li intervenis helpe eĉ en ŝia dungiĝo, ŝi eklaboris kiel oficistino en la sekcio de personaraj aferoj de iu granda uzino. Post duonjaro la uzino ŝin proponis al la trimonata kultura lernejo de la Kleriga Ministerio, ĉar oni decidis, ke ŝi estos la direktorino de la konstruata kulturdomo.

Baldaŭ ni estos ĉe la fina disvolviĝo, kiu frakasis la vivon de Mária... Iutage la lernejestro vokis ŝin kaj komunikis al ŝi, ke ili ricevis leteron de la kompetentaj distriktaj instancoj: evidentiĝis pri ŝia patro, ke li estas kulako, kaŝinta la produktaĵojn transdonendajn al la ŝtato, kaj li atakis per toporo la ŝtatajn kolektistojn. La polico, evidente, arestis lin, kaj la distrikta tribunalo en akcelita proceso, pro perforta konduto kontraŭ registaraj oficuloj, pro neleĝa kaŝo de produktaĵoj kaj pro kontraŭreĝima incito, kondamnis lin pasigi kvin jarojn en la malliberejo. Oni eksigis Mária-n el la kurso jam samtage, kadre de spektakla lernejkunveno, jes ja, kun pasiaj, ŝablonaj alparoloj, kun brulstampigo humiliga ĝispolve, kun tempesta aplaŭdo. Tio okazis printempe de 1950... Mária eĉ ne ricevis vorton, sed se ŝi ricevus la rajton defendi sin, eĉ tiam ŝi ne povus ekparoli, ŝi nur terurite sidis kurbiĝante la dorson kaj ploris, ŝi apenaŭ aŭdis, kio okazas ĉirkaŭe. Ŝi eĉ pri tio ne memoras, kiuj estis tiuj du ŝiaj samlernejanoj, kiuj fine duflanke brak-enbrakigante ŝin elkondukis el la teritorio de la lernejo. Kiam ŝi alvenis hejme, spite al la nekutima frua tempo ŝi trovis hejme sian edzon, li pakis. Li informis ŝin, ke li scias ĉion, la lernejestro altelefonis lin en la laborejo. Estas evidente, ke post la okazintaĵoj li ne povas vivi kune kun filino de kulako, kondamnita je malliberejo. Li lasas la loĝejon kun la meblaro al ili, li kontribuos al la prizorgo de la infano, kaj li volas regule viziti la filineton... Ĉio ĉi okazis ene de kelkaj minutoj, Mária finrigardis la scenon apatie falinte en fotelon. Ŝi rekonsciiĝis malfacile, ŝi timis tra semajnoj pro tio, ke ŝi freneziĝos. Ankaŭ la fabriko senprokraste maldungis ŝin, ŝi restis abrupte sen pano, salajro. Ŝi ŝanĝis la loĝejon je pli malgranda, ili vivtenis sin el tio dum iom da tempo... Post la aresto de ŝia patro estis konfiskitaj ĉiuj dek unu arpentoj, restis la ilia sole nur la domo. Ŝia kormalsana patrino ne longe eltenis la provojn, ŝian vivon finis koratako... Mária iris hejmen, ŝi entombigis sian patrinon, ŝi monigis la vendeblajn moveblaĵojn, ŝi loĝigis en la domo sian junan parencon tiam edziĝintan. Ŝi volis viziti sian patron en la malliberejo, sed ŝi ne ricevis permeson. Ŝi eĉ ne aperigis en sia kapo tion, ke ŝi rehejmiĝu en la vilaĝon por provi akiri tie vivtenon por si mem kaj por la filino. Ŝi sukcesis post longa strebado, ke la komerca entrepreno Közért dungu ŝin kiel vendistinon. Ŝi estis lerta kaj fidinda kun konfidoveka konduto, ŝin ŝatis la aĉetantoj kaj la gekolegoj, post kelkaj semajnoj oni sidigis ŝin al la kasmaŝino kiel kasistinon. Neniam ŝi plendis pro sia laboro, neniam ŝi havis timon pro la laboro. Ankaŭ kun la filino ŝi vivis en bela konkordo. Nur la manko de la edzo ŝin turmentis pli kaj pli netolereble... La divorca proceso okazis glate, la tiam promociita vickolonelo povis ne malfacile aranĝi la rapidigon. La alimenton por la infano la viro sendis ĉiumonate akurate, sed depost la forlaso, li eĉ unufoje ne deziris viziti la infanon. Ĉu eble tial, ke li ne devu rigardi en ŝiajn okulojn? Ĉar estus tre ĝene renkonti ŝin, ĉu?... Jam eĉ en la laborejo ŝi ne sentis sin bone, per iu ŝia rimarko, kiun ŝi hazarde diris celante pri la escepta favoro ĝuata de la kafistino, ŝi malamikigis la amaton de la virino: la vendejestron. Sed eblas, ke la vendejestro kontraŭiĝis al ŝi tial, ĉar ŝi ne pretis kunkuŝi kun li eĉ post tiam, kiam li avancigis ŝin kasistino. La novaj malagrablaĵoj kaj seniluziiĝoj rapide amasiĝis, kaj tiuj muelis la nervojn de fratino Gioconda kaj fine kondukis ŝin al sia terura decido.

La eksperta opinio, kiun ni faris kun kolego Koroda por la tribunalo, preskaŭ egalis kun psikologia studaĵo pri la epoko. Ja ni ne nur registris la simptomojn, sed ni devis esplori ankaŭ la motivojn por kompreni la provizoran menskonfuzon de la akuzitino kaj la ekeston de ŝia nervomalsano. Kaj ni povis malkaŝi la kaŭzojn, pri kiuj silentis aŭ nenion sciis la protokolintoj. La resumon de nia opinio mi povas laŭvorte citi el miaj notoj: „La akuzita sinjorino Györgyné Ottó dum la plenumo de la murdo suferis pro tia mensmalsano (reaktiva depresio), kiu malkapabligis ŝin ekkoni la socian danĝeron de sia faro kaj malebligis la konvenan sintenon. Tiu ŝia deprima stato ankaŭ nun ekzistas, kvankam ĉesis ĝia socia danĝero, sed ĝi estas danĝera por ŝi persone eĉ nun, sekve estas bezone tuj komenci ŝian kuracadon. Laŭ nia diagnozo ŝia malsano estas kuracebla."

La tribunala traktado daŭris apenaŭ unu tagon. La tribunalo interrompis la prokriman proceduron laŭ la punkto n-ro 4, de la paragrafo 265. de la Kriminala Kodo, ĉesigis la anticipan arestigon de la akuzitino kaj alvokis la prokurorejon, ke ĝi kondukigu ŝin al la kompetenta distrikta policejo por transporti ŝin en la psikiatrian hospitalon. Tiel Mária la sekvan tagon aperis en nia sekcio. Ŝi estis obeema, facile kuracebla malsanulino. Kvankam dum la psikiatriaj esploroj ŝi akceptis min en sian konfidon (estas mia konvinkiĝo, ke ŝi akiris la neesperitan juĝistan decidon dank' al la riĉa motivaro de la antaŭaĵoj malkovritaj tiam), post ŝia alveno ĉi tie pasis tamen longa tempo, ĝis ŝia malsaneca enfermiĝemo solviĝis. Tamen post kelkaj semajnoj ŝi volonte konversaciis kun siaj malsanaj samsortanoj, kaj baldaŭ mi spertis, kiel bonan influon ŝi havas al la aliaj, ke ili respektis ŝiajn konsilojn, ke ili obeis al ŝi. Ŝiaj ĉeesto kaj parolo trankviligis eĉ tiujn, ĉe kiuj la flegistinaro apenaŭ iom sukcesis... Jes, ekzistis iu mirinde sugestiva forto en ŝia sinteno, statueska trankvilo, dignoplena konduto... Dum duonjaro ŝia stato boniĝis tiom, ke proksimiĝis la tago de ŝia ellaso. Tiutempe ni havis jam bonan amikecon inter ni, mi ofte paroladis kun ŝi, kaj rimarkeble ŝi persistis ligiĝi al mi, ŝi serĉis la eblojn esti kun mi, ŝi strebis meriti mian rekonon. Estis por mi klare, ke ŝi vidas en mi ne la viron, ja mi multe sciis pri ŝia eĉ tiutempe malsane troiga fobio kontraŭ la viroj. Estis tre kompreneble, kial ŝi kroĉiĝis al homo, kiu komprenis ŝian tragedion. Ŝin ekŝatis miaj gekolegoj, la flegistinoj, kaj tio kontribuis al ŝia resaniĝo, espereble kompleta... Iutage mi envokis ŝin ĉi tien, mi sidigis ŝin kaj proponis mokaon al ŝi, kaj mi diris: baldaŭ finiĝos via kuracado, kaj ni devos disiĝi unu de la alia. Mi observis, ke vi povas bone trakti la malsanulinojn: ĉu vi emus resti ĉi tie kiel flegistino?... Mia propono surprizis kaj konfuzis ŝin, post monatoj tiam ŝi denove ekploris. Ŝi dankis kortuŝite mian prizorgemon kaj respondis jese. Sinjorino Györgyné Ottó, nia flegato tiel fariĝis fratino Mária, plej pacienca, plej sindonema flegistino en nia sekcio... fratino Gioconda.

Eble nun vi jam komprenas, kial tiu nomo tiom konvenas

por ŝi. Ĉar vi devas scii ankoraŭ, ke tiun rideton – tiom karakterizan por ŝi – la pasintaj unu kaj duona jardekoj ĉizis al ŝi sur la vizaĝon. Nature surbaze de ŝiaj antaŭaj travivaĵoj kaj malnovaj memoroj. Tiu ĉi homo scias multege pri vivo kaj morto, tial ŝi povas kompreni ĉion, kio al kaj ĉirkaŭ ŝi okazis kaj okazas senĉese. Estas interesa karakterizaĵo de ŝia laboro, ke ŝi okupiĝas plej volonte pri la malsanulinoj kun sorto simila al la ŝia, pri la ŝiprompiĝintoj de la vivo, pri la viktimoj de la egoismo kaj senkoreco de la opaj homoj kaj de la epoko. Vi eĉ imagon ne havas pri tio, kiom el ili venas ĉi tien. Ĉu vi scias, kial aperis ĉi tie la kvindek ses jara virino kun Jesu-manio? Tial, ĉar ŝi plenedukis kvar gefilojn, el kiuj eĉ ne unu pretas subteni la frue kadukiĝintan patrinon, kaj ili volis porti ŝin en la hejmon de maljunuloj... Mi povus vicigi la similajn kazojn po dekoj, sed tiuj ne apartenas al la historio de fratino Gioconda.

Dum la unu kaj duona jardekoj pasigitaj ĉe ni, denove revenis al ŝi la terura pasinto, la animskuo preskaŭ reĵetis ŝin en la malnovan malsanon. En 1956, iam ĉirkaŭ la fino de la bataloj, iunokte aperis ĉe ŝi la iama edzo. Li estis vestita civile, lia korpa-anima stato estis timiga. Li serĉis refuĝon ĉe ŝi, li ne diris, de kiu kaj kial li devas fuĝi, kaj ŝi ne demandis pri tio. Ŝi senvorte akceptis lin en la hejmon, lavis, manĝigis kaj kuŝigis lin en sian propran liton, ja ŝi amis lin. Verdire tra la tuta vivo ŝi amis nur tiun unusolan viron... La atake aperinta feliĉo, la periodo de la novaj esperoj daŭris du semajnojn. Iuvespere, kiam ŝi revenis el la laboro, ŝin atendis hejme mallonga letero... La viro skribis, sufiĉas por li ĉio, kio estis kaj estas ĉi tie, li iras kun sia amiko al Okcidento. La frato de lia amiko vivas en Svedio, li havas malgrandan ferindustrian uzinon, kaj li povos per sia malnova metio trovi la kalkulon. Li dankas ŝian grandan bonecon kaj petas pardonon pro ĉio, sed li ne povas fari ion alian, li laciĝis. Evidente, ke sekvatage mi rimarkis ĉe ŝi: okazis io eksterordinara. Ŝi rakontis tion. Dum semajnoj mi serioze ĉagreniĝis pro ŝi, mi kuracis ŝin per medikamentoj, en la laboro mi traktis ŝin zorge, samtempe mi donis al ŝi tiom da okupo, kiom ŝi eltenis, mi kromlaborigis ŝin por deturni ŝian atenton. Poste alvenis de eksterlande la fotoj kaj la leteroj fanfaronantaj pri bona salajro, bela loĝejo kaj aŭtomobilo. Ju letero eĉ sugestis, ke ankaŭ ŝi povus eliri post li. La alloga novaĵo, la ebla, ke ŝi povos vivi denove kun la amata viro, ke ŝi povos kunvivi kun li spite al ĉio, nekredeble entuziasmigis fratinon Gioconda. Mi ne povis sufiĉe miri pri ŝia kapablo pardoni, pri ŝiaj forgesemo kaj infana kredemo... Venis ankoraŭ du leteroj post kreskantaj intervaloj, poste sekvis longa paŭzo, fine denove unu letero. En ĝi la foto de la sveda edzino kun la ĝemeloj. La bildo de du blondaj knabinetoj, dolĉe ridantaj. Ili ambaŭ kvazaŭ kopie memorigis pri ŝia filino, ja ĉiuj tri infanoj heredis la trajtojn de la patro.

Dum tuta semajno fratino Gioconda iris-venis mute inter ni, tiam ŝi entombigis en si mem nerefareble sian edzon kaj kun li ĉiujn virojn. Vi povas kredi min: dum unu kaj duona jardekoj ne estis en ŝia vivo alia krom tiu kariersopira, egoisma, malkuraĝa porko, en tiuj du semajnoj... Kiel vi spertas, eĉ nun ankoraŭ ŝi altiras la virajn rigardojn, ja ŝi ĵus estis kvardek-jara, kaj ekzistas en ŝi iu incite altira mistero, sed viro neniam plu povos al ŝi proksimiĝi... Ŝi estas eminenta ankaŭ kiel partnero en konversacioj, sed ŝi ekstaras kaj senvorte foriras se aperas du temoj: se oni komencas paroli en ŝia ĉeesto pri infanoj aŭ viroj. Tiu rideto eĉ tiam ne malaperas de sur ŝia vizaĝo, sed ĝi nur iel strange frostiĝas, rigidiĝas mortinta. Mi povus jam alkutimiĝi, ĉar mi havis la eblon vidi ŝian senmovan rideton kelkajn fojojn, tamen eĉ al mi, hardita psikiatro, trakuras frosto sur la dorso... Ŝia vivo malvastiĝis en malgrandan rondon, tio estis ĉe ŝi eĉ sindefendo, evidente. Ŝajnas, ke tio jam povos savi ŝin de nova disfalo. Ŝi vivas por la laboro, por la sortorompitoj similaj al ŝi, kiuj aperas ĉe ni senfine, ĉiutage, kiel la maro al la bordo elĵetadas la senmastriĝintajn boatojn kaj ŝiporestaĵojn... Por ke mi finu la historion de fratino Gioconda per literatureska komparo.

Tradukis: Imre Szabó

Frigyes Karinthy
(1887-1938)

LUKTO POR VIVI

Amiko, ŝajnas, ke laŭ Tezo
kaj Leĝo estas vi venkata —
kadavron vian ĉirkaŭas
hienoj kaj korvar' malsata.

Plifortis eĉ ne la besthordo,
vin murdis bestoj bagatelaj —
egale jam ke vin dividas
ĉu ungoj hundaj aŭ paseraj.

Kiam vi devis krude lukti,
la pugno haltis antaŭbate.
Malforto? Bono? Senkomprene.
Fiero? Timo? Nesciate.

Eble nur naŭzo. Samegale.
Mi pacas. Amen. Tiel estu.
Prefere manĝu min la vermoj,
ol tiujn vermojn mi digestu.

Tradukis: Imre Szabó

Desegno de László Panner

PANORAMO

Ĉina gasto en Budapeŝto

Meze de junio gastis en Budapeŝto Ĝaŭ Dze Jang, komisiita ĝenerala sekretario de la Ĉina Komunista Partio kaj ĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko.

Dum la lastaj jaroj la ĉinajhungaraj kontaktoj signife pliboniĝis, inkluzive la partiajn kontaktojn. La vizito de la altranga ĉina gasto donis okazon por meti la bazon de plua kunlaborado sur ekonomia, politika kaj kultura terenoj. La ĉina politikisto vizitis ankaŭ aliajn kvar socialismajn landojn: GDR, Pollandon, Ĉeĥoslovakion kaj Bulgarion.

Sur nia foto: János Kádár akceptas la ĉinan gaston.

Israela-Palestina rendevuo en Budapeŝto

En junio la hungara ĉefurbo gastigis la duan kunvenon de altranga delegitaro de la Palestina Liberiga Organizo kaj de la reprezentantoj de la Israelaj pacamaj fortoj. La kunveno celis trovis komunajn principojn por la solvo de la plurjardeka Mez-Orienta problemo. La unua simila kunveno okazis en Bukareŝto.

Sur nia foto: Charlie Biton, komunista deputito de la Israela parlamento (Kneset) kun Abu Mazen, membro de la plenumkomitato de la Palestina Liberiga Organizo.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO +

PANORAMO

Renaskiĝinta hotelo

Margarita insulo estas eble la plej bela loko de Budapeŝto – ĉi tie funkciis la eleganta kaj ŝatata Grand Hotel, kiu konservis la atmosferon de la pasintaj jardekoj.

Kun la paso de la tempo venis la bezono rekonstrui la malnovan hotelon laŭ la nunaj postuloj. Post longa kaj zorga laborado la 12an de junio estis malfermita la rekonstruita hotelo, kiu kontraktinte kun la internacia hotela reto Ramada, alprenis la nomon „Ramada Grand Hotel". Sur nia foto: la renaskiĝinta hotelo.

Somero alvenis

Kiel la ĉi-apuda foto pruvas, ankaŭ en Budapeŝto alvenis somero. Normale tio ne devus esti novaĵo, sed en tiu ĉi jaro, post la rigorega vintro kaj la malice malvarma printempo oni tute ne mirus, se en junio – anstataŭ somero – simple revenus vintro. Kompreneble, ni ne povas scii, ĉu la somero restos ĝis la apero de tiuj ĉi vortoj, tamen, la ekscite vestitaj knabinoj sur la apuda foto pruvas, ke almenaŭ dum unu tago vizitis varma vetero Budapeŝton.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

Departemento GYŐR-SOPRON

ciklámen tourist

La Departemento Győr-Sopron estas varie bela regiono de Okcidenta Hungario. Norde limas ĝin Danubo, kiu disbranĉiĝas kaj ĉirkaŭbrakas grandan teritorion kun sorĉe rava akva mondo, nomatan Szigetköz, *por reunuiĝi denove. Sur la insuletoj de* Szigetköz *iam estis vilaĝetoj, kies loĝantoj okupiĝis pri fiŝkaptado kaj orlavado. La surakvaj kaj surfacaj vojoj, kondukantaj en la profundon de arbaroj kaj kanaroj inter salikoj kaj poploj, prezentas mirindajn flaŭron kaj faŭnon al la turisto, vaganta en la viva silento de la naturo.*

La departemento montras alian vizaĝon al tiu, kiu alvenas en ĝi el okcidenta direkto. Tie ĉi oni renkontas la orientajn randojn de Alpoj, kovritajn de pinoj; la senarbejojn dekoras flortapiŝoj de ciklamenoj.

Estas aparta mondo ankaŭ la regiono de la lago Fertő, sur kies orienta bordo la restaĵoj de la iama „marĉolando" estis deklarita naturprotekta regiono. La sudan limon de la departemento fermas la rivero Rába kaj la nordaj montoj de la romantika montaro Bakony.

Kulturo, tradicioj

La Departemento Győr-Sopron estas regiono riĉa je artmonumentoj. Pannonhalma *estas rigardata kiel monumenta ilustraĵo de la hungara historio kaj arthistorio. La templo kaj la monaĥejo estis sanktigitaj en la jaro 1001. En ĝiaj biblioteko kaj arkivo oni konservas sennombrajn netakseble artvalorajn pecojn, interalie nian unuan aŭtentikan diplomon, la Fondodiplomon de la Abatejo de Tihany.*

La agrablaj, zigzagaj stratoj de Győr *kondukas al* Káptalandomb *(Kanonikara Monteto), kiun kronas la nuna Episkopo-burgo, kaj la katedralo, kies fudamentoj devenas el la 11a jarcento. En tiu lasta troviĝas la fama „herma" (busto-relikvujo) de Sankta Ladislao, elstara verko de la mezepoka juvelista arto.*

Sopron estas unu el tiuj hungaraj urboj, kiuj pleje riĉas je artmonumentoj; pro la modela prizorgado de la artmonumentoj ĝi ricevis Eŭropo-premion. En Fertőd *troviĝas la Esterházy-kastelo, nomata ankaŭ hungara Versajlo: tie loĝis dum kelka tempo ankaŭ Haydn. En la iama ŝtonminejo de* Fertőrákos, *havanta la atmosferon de la Egiptaj roktemploj, somere oni aranĝas teatrajn prezentadojn, kaj en la Kisfaludy-Teatro de* Győr *oni povas vidi spektaklojn de la mondfama baletensemblo de Győr.*

Hobio, libertempo

La riverorica regiono sukcese ofertas sin al la ŝatantoj de la akvaj sportoj kaj fiŝhokado. La bazoj ĉe la lago Fertő prezentas eblojn veladi; la sportaj kolonioj de Szigetköz ebligas avoksportojn ne nur sur la libera akvo, sed oni organizas ankaŭ romantikajn surakvajn vagadojn.

La regiono riĉa je sovaĝbestoj estas kvazaŭ paradizo por ĉasistoj. En la iama marĉo Hanság – kiun nun kovras alnaroj kaj poplaroj – estas Krisztinaberek*: tie kapreolojn, cervojn kaj aprojn povas renkonti la turisto. La urbo* Mosonmagyaróvár *ofertas agrablan tempopasigon al la ŝatantoj de la rajdado.*

Ripozejoj, resanigejoj

Estas konata fakto, ke Hungario aparte riĉas je kuracakvoj. Sed eĉ inter la famaj hungaraj kuracakvoj elstaras – ne nur pro sia kuracefiko kaj la koncernaj legendoj – la kuracbanejo de Sopron, *urbeto situanta je 7 km de Balf: ĝi funkcias en novbaroka kastelo kaj en la apuda sesetaĝa sanatorio. La klimato de la eta, bonatmosfera bankolonio estas agrabla, kaj la gastojn, kiuj venas ĉi tien pro malsanoj unuavice reŭmatismaj, atendas hotelo kun meblaro laŭstila, kaj ĉiuj kuraciloj de la moderna medicino.*

Tiuj, kiuj suferas pro malsano de la spirorganoj, povas viziti Lőverek *(same en la proksimeco de Sopron), kie bona klimato kaj moderne ekipitaj sanatorioj helpas la resaniĝon.*

Vinoj, festoj

En la okcidenta parto de la departemento, sur la nekrutaj montodeklivoj floras riĉa vitokulturo. Ĉi tie oni produktas unu el la plej famaj hungaraj vinoj, la tn. „blu-frankan", kiun faras elstara la unika aromo kaj la meza acidenhavo. La hungaraj vinproduktantoj kaj iliaj kolegoj en la ĉelima regiono Burgenland e la najbara Aŭstrio opinias, ke la speciala aromo de la „blu-franka" vino ŝuldiĝas al la klimato, difinita de la lago Fertő. Krom tio ankaŭ la proksimeco de la vulkandevenaj montoj norde de Balatono havas sian influon: dank' al ili la grundo ĉi tie havas konsiston tre favoran por la vitokulturo.

En Sopron kaj en la najbaraj vilaĝoj ĉe la enirejoj de la trinkejoj specialaj ŝildotabuloj informas la turistojn, kiajn vinojn oni ofertas en la koncerna ejo.

Estas ŝatataj turismaj eventoj la aŭtunaj vinberrikoltoj, kiujn akompanas subĉiela kuirado de gulaŝsupo aŭ de ŝafgulaŝo.

REVUO DE REVUOJ

Se Vi, kara leganto, en la Jubilea Jaro eble hezitus antaŭ la demando, ĉu rimarkiĝas progreso en la E-movado, mi rekomendas, rigardu ankaŭ la paletron de niaj revuoj. Farba etikedo, certe, tamen ĝi ne uziĝis hazarde, ĉar pliaj revuoj montras sin koloraj, feliĉe ne nur surkovrile sed ankaŭ pere de bunte interesaj artikoloj. La revuanto ĉiam pli malfacile kaj pene selektas, kaj triste lasas senmencie artikolojn ofte tre atentindajn. Precipe, se ili estis sincere kaj senmaske verkitaj, ĉar por diri la veron, troveblas foje diametre aliaj. Aperas foje gazetaj eroj kun maskitaj intencoj, jen enviaj, jen detruaj, eĉ eltruaj... Laŭ la Proverbaro: Al la papero ne mankas tolero.

Alispecaj maskoj – akre sinceraj – estas da kiuj EL POPOLA ĈINIO (3.) prezentas dekon da bunte brilaj por klarigi la kuriozajn vizaĝopentradojn de la aktoroj en la ĝenro de la t.n. Pekina opero. Malkovriĝas la sekretoj de l' simbolaj sencoj kaj karakterizaj nuancoj de la kolorplenaj ŝminkaĵoj, kiuj manifestas „klare" diversajn sortojn kaj trajtojn de la dramaj herooj. Sed laiko ne volu prezenti ilin, tial legu kaj vidu mem, samkiel la ĉi-numere abunde troveblajn interesajn temojn.

Ni restu ankoraŭ en la plej granda kontinento por foliumante en KONTAKTO (102.) revi pri la belecoj de Samarkando, ekscii pli pri la grandhistoria Irano, mediti pri arabaj popoldiraĵoj, lerte prezentitaj fare de la diligenta Al-Amily. Nia popolo, tre kompreneble, alte ŝatas – por tiel esprimi – „geografiaĵojn" inkluzive folkloraĵojn, do la redaktora linio ŝajnas celtrafa. Mi aldonu (fakte Kontakto aldonas) la bonvenan vojaĝraporton de Amri Wandel tra la lando de la inkaoj, en Peruo. Al la tiea E-gazeto, „Inka Popolo" mi jam vokis vian atenton, kaj jen la veturo inter iliaj pitoreskaj montegoj al la fantazie enigmaj urbo-ruinoj.

Tamen ne nur tie, sed en la tuta Latin-Ameriko la indianoj forte strebas al homdigna vivo. Ili volas solvi siajn historiajn problemojn ege pezajn: protekti sin kontraŭ la terkonfiskadoj, la industriaj detruadoj de siaj arbaroj kaj la ceteraj mortigaj minacoj por la praloĝantoj. Ĉe ili la „medioprotektado" signifas ion alian: veran lukton, eĉ bataladon por la vivrajtoj! La sobraj konstatoj de la (jam 4a!) ĝenerala kunveno de la indianaj popoloj ne povas ne veki konsenton (INTERNACIISTO 1-2.).

Pri antaŭenigo de Eo en Afriko la diskutantoj svingas la glavojn ne nur en sinsekvaj numeroj de ESPERANTO. La disko estas ĵetita ankaŭ al aliaj revuopaĝoj, eĉ al LITERATURA FOIRO (103.). kie mi prefere legus pompan prozon, ol oblikvan disputon, t.e. ne veran kontraŭargumentadon inter la artikolantoj. Certe, inter la multaj artikoloj tiurilataj aperis kelkaj tro entuziasmaj, ankaŭ ne tre realismaj (UK-on aranĝi baldaŭ en Afriko!?). Inter la pli sobraj nur apenaŭ troveblas dorsturnanto, la bezono por praktika instigado tra tiu kontinento estas pli ol klara. Mi tamen miras, kial la diskutantoj traktas la Afrikajn landojn kiel homogenajn, sen gravaj diferencoj laŭ cirkonstancoj? Kaj kial iuj ŝajnigas - verŝajne senintence –, ke tie la popoloj vivas kvazaŭ en senklasaj, sentavolaj socioj, egal-malsate en la mizero, sen emo kaj peno suprenlevi la kapon?

HEROLDO brave kaj lerte kontribuas al la sukcesigo de la jubilea kongreso en Varsovio. Abundo da artikoloj konigas en pluraj numeroj de la grandtradicia gazeto urbojn kaj kulturaĵojn de la naskotero de nia lingvo. Havas apartan gravecon el tutmovada vidpunkto, ke nia jubileo turnu ĉe multaj la atenton al la komenca historio de Eo ĉar estas verŝajne ties sekvo, ke la ekkonitaj iamaj malfacilaĵoj, la fortostreĉoj de la pioniroj firmigos en la mensoj la fidon kaj certecon por la plua kariero de nia lingvo-movado. Persone, mi trovis aparte konvena tiurilate la artikolon (eble ankaŭ flugfolie aŭ alimaniere distribuendan) de Irena Szanser pri la Varsoviaj jaroj kaj lokoj ligitaj al Zamenhof (4-5.).

Malferma, kia ĝi estas sukcese, montras sin laŭdinde EKUMENISMO (6.), modesta gazeto kun siaspece gravaj temoj. Tre rimarkinda artikolo, kiel mallonga studo, skizas la judan devenon de Kristanismo kaj evidentigas la apenaŭ konatajn eventojn de la komencoj. Por sukcese disvastigi ĝin ekster la juda popolo apostolo Paŭlo deturnis ĝin grave de la plej folkloreĉaj tradicioj, eĉ kontraŭstarigis la novan religion al la judaj principoj igi ĝin plaĉa en la Romia Imperio.

Superstiĉoj, primitivaj instinktoj kaj opinioj malveraj kompreneble ĉiam regis tra la mondo. Kaj kial tiuj forestu pri tiel grava, eĉ dolora, dolorega fenomeno, kiu torture sentigas sin foje pro niaj dentoj? Balázs Szemők publikigis tre ekscitan (feliĉe, ne dent-incitan) studon pri la „mondhistorio" de la superstiĉoj kaj miskredoj ĉirkaŭ la dentoj (STOMATOLOGIA FORUMO, 16-17.). Kun granda intereso mi sekvis la homajn kuriozajojn antaŭ la sciencaj malkovroj, kvankam verŝajne tiu temo ankoraŭ enhavas multe da malkovrindaĵoj. Eble tiam ni pli multe scios pri la historio de la stultaĵoj, la akompanantoj de nia homa genro.

Ervin *Fenyvesi*



Paĝo de komencantoj

János Sárközi

La ne-halt-ig-ebla mal-sato

Mal-juna amiko rakontis al mi kio okazis al li dum la fino de la milito. Proksime al la fino de la milito li far-iĝis *milit-kaptito.*[2] Tio okazis en lando *okcidente*[3] de Hungario. Tie li tra-vivis kaj el-lernis, kia estas la vera mal-sato.

– Jes, li diris; eĉ pensi mi ne povis, ke oni povas esti tiel mal-sata. Ni loĝis en arb-aro, kaj nur foje-foje ni ricevis flu-eblan manĝ-aĵon, kiu estis pli proksima al mal-pura akvo ol manĝ-aĵo, kaj tre mal-ofte *sekan*[4] *panon*[5]. Tiam ni manĝis pec-etojn de arboj. Feliĉe pura akvo fluis tra la arbaro, kaj tio tenis en ni la vivon.

Sed baldaŭ fin-iĝis la milito, kaj oni rapide trans-portis nin hejmen per *vagon-aro*[6]. Manĝ-aĵo ankaŭ en la vagon-aro ne estis, tial nia ega mal-sato ne havis finon. Antaŭ la *limo*[7] de nia lando, oni diris al ni, ke en la unua halt-ejo en Hungario hungaroj atendos nin; *salutos,*[8] kaj donos varman manĝ-aĵon. Ĉiu ricevos multe manĝi.

Kaj vere, ĉio okazis tiel, kiel ili diris. La *staci-domon*[9] oni pli-beligis, *muziko*[10] aŭd-iĝis, kaj apud la muro de la staci-domo staris grandaj ujoj, ĉe ili belaj vir-inoj, por dis-doni la varman manĝ-aĵon.

Kiam la mal-sat-egaj homoj ek-vidis tion, ili ne volis trankvile atendi plu en la vagon-aro, sed sam-tempe kur-egis ĉiu tien, komenciĝis granda inter-batado. tial la ujoj falis teren, la manĝ-aĵo, kiun ili tiel forte deziris, dis-fluis sur la tero, ricevis ĝin nur la piedoj. Ĉiu far-iĝi tre mal-pura kaj eĉ pli mal-sata.

Kial okazis tio? Ĉar ĉiu timis, ke la alia havos pli ol li. Tial ĉiu volis pli rapide kuri tien.

Mult-foje venas en mian kapon tiu rakonto, kiam mi vidas, ke sur la tero ĉiu homo, ĉiu lando volas pli rapide kuri ol la alia, por havi ion pli rapide, pli multe.

Nun-tempe ĉiu povus havi ĉion necesan. Ĉiu homo povus manĝi, neniu devus esti mal-sata. Sed, se pro tiu kur-ego – pro la timo – foje okazos inter-batado, la „ujoj" falos teren, kaj la valor-aĵoj, kiuj estas en ili dis-fluos, kio okazos poste?

1. Mal-sato: sento post longa ne-manĝo; 2. Milit-kaptito: milit-isto, kiun la mal-amiko ne permesas hejmen iri; 3. Okcidento: kie la suno mallev-iĝas. 4. Seka: kio ne havas akvon; 5. Pano: la plej grava manĝaĵo; 6. Vagon-aro: longa vetur-ilo; 7. Limo: kio estas inter la landoj. 8. Saluti: montri, diri afabl-econ al la al-ven-into; 9. Staci-domo: domo, kie la vagon-aro haltas; 10. Muziko: kanto de iloj.

János Sárközi

Kiam la kuraĝo estis tre grava

Danubo, kara mal-juna rivero. Ofte mi promen-adas laŭ ĝia bordo, rigard-adas la laŭbordajn arbojn, kies koloro ŝanĝ-iĝas en ĉiu parto de la jaro. Mi tre ŝatas tiun riveron, multaj memoroj ligas min al ĝi, kaj dum promen-adoj ofte mi re-memoras historiojn, kiuj okazis antaŭ multaj jaroj. Ofte tre interesaj memoroj aperas el la ne-tra-vid-ebla ombro de la forgeso.

Kun bela, juna knab-ino mi sid-adis apud grup-eto de mal-grandaj arboj, sur *insulo*[1] kiu estis ating-ebla tra *ponto*[2]. (Nature, tiam ankaŭ miaj jaroj estis malpli per kelk-dek ol nun-tempe.) Ni tre ŝatis tiun belan, silentan, trankvilan lokon, ofte ni rest-adis tie, kaj multe parol-dis.

La loko kie ni sidis ne estis tuj apud la akvo, sed iom pli fore. Tuj apud la akvo kondukis mal-larĝa voj-eto, aperis tri viroj. Ili tre silente, preskaŭ ŝtele iris unu post la alia. Iliaj vizaĝo kaj vest-aĵo tute ne vekis en ni agrablajn sentojn, tial ni restis en silento, kaj esperis, ke ili ne rimarkos nin, kaj for-iros.

Feliĉe mi tuj pensis, ke ili opinias, ke en mia mano, en la poŝo estas *pistolo*[4], tial ili ne kuraĝis veni pli proksimen. Ni staris tiel sen-move unu kontraŭ la aliaj ĉirkaŭ kvin minutojn. Mi tre atentis, ke mia mano restu en la poŝo. Mi regis min, malgraŭ la timo restis trankvila, ĉar mi bone sciis, ke nur tia-maniere mi povas mal-helpi la danĝeron.

Poste la tri uloj turnis sin, kaj silente, kiel ili venis, foriris, kaj mal-aperis sur la laŭ-rivera voj-eto. Nature ankaŭ ni tre rapide for-lasis la insulon post tiu tim-iga danĝero.

Sekvont-tage en la labor-ejo· mi rakontis al la kun-laborantoj, kio okazis. Ili ek-miris, kaj demandis: Ĉu vi vizitis tiun insulon? Via kapo estas tute mal-plena! Ĉu vi scias, ke tiu insulo estas kaŝ-ejo de mal-bon-uloj, de aĉ-uloj; eĉ gard-istoj de la ordo ne kuraĝas iri vespere sur tiun insulon! Oni diras, ke se tiuj aĉ-uloj povas kapti tie viron kun vir-ino, la kapon de la viro ili dis-batas piede, kaj la vir-inon ili per forto dev-igas fari tion, kion ili volas!

Nu, nur tiam mi vere ek-timis, kiam mi ek-sciis, en kia granda danĝero ni estis!

1. Insulo: ter-peco, kiun plene ĉirkaŭas akvo; 2. Ponto: Konstru-aĵo, super rivero por tra-iro; 3. Pantalono: Vesto peco; mal-supra parto de vestoj; 4. Pistolo: Ilo, per kiu de mal-proksi-proksimo eblas sen-viv-igi iun.

Miklós Tóth-Máté:

Tiel estas multe pli ekscite

La ruf-barba junulo staradis jam delonge proksime al la strata vendisto kaj rigardis, kiel la aĉetantoj elektadas el la kovertaj loteriaj biletoj. Ne kun bonŝanco. Kelkaj dekforintaj, kelkaj dudek-forintaj gajnoj kune kun multegaj „sen gajno". „Mi atendos ankoraŭ – pensis la ruf-barbulo –, nur en la fino."

Kiam nur tri loteriaj biletoj pendis sur la ringo, li montris al ili.

– Tiujn tri mi aĉetas – li diris kaj denombris dekkvin forintojn. La maljuna vendisto, portanta bekhavan ĉapon, detondis la loteriajn biletojn kaj transdonis ilin al la junulo. La unua estis sen gajno, la dua simile. Trompo – murmuris la ruf-barba junulo kaj disvolvis la lastan tre malrapide, preskaŭ laŭirante ĉiun milimetron. Li ne kredis al siaj okuloj. Sur ĝi estis presita teksto: „Urĝe iru al la strato „Umo", n-ro 5, etaĝo 2, pordo 12. Vi ne pentos."

– Bonvolu rigardi – li montris la bileton al la vendisto. – Kion mi komprenu sub tio?

La maljunulo, portanta bekhavan ĉapon, rigardis ĝin, lia sablokolora vizaĝo malkaŝis nenion...

– Iru tien – li diris.

– Sed kial?

– Mi ne scias.

– Kiele? Ĉu vi ne scias? Vi devas scii. Eble mi estas la unua, kiu elektis tian?

– Ne vi estas la unua, tamen mi ne scias. Sed eĉ se mi scius, mi ne rajtus malkaŝi. Tio estus kontraŭregula.

Li surtabligis alian ringon kun loteriaj biletoj, novaj aĉetantoj venis, la ruf-barba junulo flankenstaris. Li relegis la tekston kaj la lokon de la komenca malkonfido nun jam okupis scivolo. „Vi ne pentos." Do nur io bona estos kaj nenion li perdos, se li iros tien. Li scias, kie estas la strato „Umo", je kelkaj aŭtobusaj haltejoj, do ĝi tute ne troviĝas malproksime. Kaj eble tie oni disdonas la gajnaĵojn. Ĉu magnetofono? Ĉu kolora televidilo? Ĉu motorboato? Kial ne? Sed povas okazi, ke li gajnis partoprenon en grupa vojaĝo. Ĉu al Japanujo? Ĉu al Kanarioj? Ĉu al Nov-Zelando? Li estas bonŝanculo, kial do heziti ankoraŭ ĉi tie... Ridinde! Kie estas la plej proksima aŭtobusa haltejo?

Antaŭ la deketaĝa betondomo en la strato „Umo" li staradis iomete ekscitite. Ĝis nun neniam li gajnis ion, kaj nun subite estas okazo. Kion li gajnis? Li havas kun sia edzino fridŝrankon hejme. Ĝi ne necesas. Se tamen li gajnis tion, li elektos ion alian. Certe eblas.

Finfine li decidiĝis, li supreniris la duan etaĝon, li sonorigis. Malfermis la pordon tre ĉarma, alta blonda virino vestita nur per ĉta bikino.

– Mi estas Liza... – ŝi diris reidetante. – Bonvolu eniri.

La ruf-barba junulo sekvis ŝin konfuzita. Li ne atendis tian akcepton. Je la mansigno de la virino li eksidis en fotelo, kaj ĉirkaŭrigardis. „Kia logĉejo!" – li pensis kaj pedante fiksis rigardo ĉion. Lia rigardo ripozis sur la Bordoz-kolora kuŝejo la- Franca maniero, la multekostaj nepoluritaj, konsiderinde grandaj, pezaj mebloj kun ŝraŭboforma kolorornamo kaj plumbinga vitrodekorafo, kaj enŝteliĝis tra la nefermita banĉambra pordo ĝis la bankuvo el artefarita marmoro. Bonege! Kaj la virino! Fantazie! Sed kie oni tenas la gajnaĵojn? Eble li rajtos elekti el la mebloj? Ankaŭ tio ne estas malbona. Konvenas ankaŭ la fotelo, en kiu li sidas.

– Bonvolu transdoni vian loterian bileton... – diris la virino, kaj transpreninte ĝin, ŝi iris al la ŝranko kun tirkestoj en la ĉambroangulo. La ruf-barba junulo ekvidis nun ĉi tiun ŝrankon, kiu plene diferencis de la grandstilaj instalaĵoj. Rabotita, mustardo-flava, kun tirkestoj. En la antaŭĉambroj de bibliotekoj oni povas vidi similajn, en ĝi oni gardas la katalog-kartojn. La virino eltiris iun tirkeston, salivis la fingron kaj serĉadis inter la blankaj kartetoj. Poste ŝi elprenis iun, rigardis, balancis la kapon.

– Vi ne gajnis – ŝi diris –, bedaŭrinde.

– Kion signifas, ke mi ne gajnis? Kiele? Ĉu mi ne gajnis? – La ruf-barba junulo nervoziĝis. – Kaj ĉu tio estas jam tute certa?

– Sed...! – En la voĉo de la virino estas ofendiĝo. – Ĉu vi opinias, ke ni trompas vin? Vi ne gajnis, kaj finite. Ĝis revido!

– Mi ne komprenas... – ekstaris la ruf-barba junulo. – Tion mi estus povinta ekscii ankaŭ ĉe la maljunulo, portanta bekhavan ĉapon. Por kio servas ĉio ĉio?

– Tiel estas multe pli ekscite – diris la virino, dum ŝia svelta korpo balanciĝis, kiel poplo en la vento. – Ĉu vi ne opinias tiel?

– Jes... – konfesis la ruf-barba junulo kun moviĝanta Adam-pomo. – Kaj kio estus okazinta, se mi gajnus?

– Azeneto...! – ridis la virino, kaj dume ŝia bonodora mano laŭpromenis la rufan barbon de la junulo. – Alifoje elektu kun iom pli granda bonŝanco, kaj vi vidos. Kaj nun, adiaŭ, knabeto, ĉar la sekva homo povas veni kiam ajn.

Tradukis: István Takács

Desegnoj de Tamás Bakos

György Moldova
(1934 –)

Historioj pri la dogano

Jam tiam mi konis la doganiston, kiam li estis futbalisto. Pli poste mi estis trejnisto dum tri jaroj ĉe la Sporta Societo de la Doganistaro. La trajno proksimiĝis al Budapeŝto, kaj post la stacio Tatabánya li envenis nian kupeon.

– Johano – mi demandis –, de kiam vi servas kiel doganisto?

– Proksimume de dekkvin jaroj.

– Kaj kio estis la plej memorinda „granda trukado", kiun vi vidis?

– Trukado? Grandaj trukadoj ne ekzistas, la plej multajn ankaŭ vi konas: oni metas sube en la cigaredujon monbiletojn kaj kaŝmaskas ilin per duonigitaj cigaredoj; oni gluas monbiletojn de kvincent forintoj per leŭkoplasto al la akselo. Nu, foje oni petis doganiston partopreni en „kontrabando-ludo". Interne en la kupeo oni gluis sur la ŝovopordon saketon kaj kiam la deĵoranta doganisto malfermis la pordon, li mem ŝovis la doganendaĵon en la pordo-aperturon. Kiun historion mi rakontu al vi? Eble la aferon de la svisaj horloĝoj. Ĝi okazis antaŭ kelkaj jaroj.

Certe vi scias, ke ĉiuj doganoficejoj en la tuta mondo ricevas de tempo al tempo, kiel ankaŭ la nia, anonimajn denuncojn. Telefone aŭ skribe oni komunikas, ke en certa tempo alvenos iu, kiu kunportos kontrabandaĵon. Foje venis sciigo, ke meritos atenton el Svisio alvenanta kaj Hungarion vizitonta sinjorino, ĉar ŝi provos kontrabandi svisajn horloĝojn en la landon.

Vere alvenas la virino kun pelta ĉapo surkape, ŝi surhavas elegantan surtuton kun du butonvicoj. Ni akceptis ŝin kun distingita atento, funde priserĉis ŝin de kapo ĝis piedo, eĉ ni disigis la internon de la pelta ĉapo, sed ni trovis nenion ĉe ŝi. Mi skoldis la denuncinton, sed baldaŭ venis nova denunco, ke



la virino tamen kontrabandis ok ĝis dek horloĝojn, kiujn ŝi transdonis al sia bofrato por ke li vendu ilin.

Post unu monato denove venis la virino kaj tiam eĉ tion ni kontrolis, ĉu ŝi havas perukon? Ni ree ne trovis horloĝojn ĉe ŝi. Niasupoze, ŝi ne kuraĝis riski, sed post paso de unu semajno denove venis sciigo, ke ŝia bofrato ŝakras antaŭ nelonge akiritajn svisajn horloĝojn.

La trian fojon mia estro kaj mi kune akceptis la virinon. La olda estro prezentis al ŝi kafon kaj konjakon dirante:

– Aŭskultu min, sinjorino. Absolute ne interesas min tiuj ok ĝis dek horloĝoj, kiujn vi kunportas; por ni estas multe pli grava la trukado de vi uzata. Se vi malkaŝos ĝin, mi certigas vin, ke la nunan kontrabandaĵon vi povas konservi; se vi ne malkaŝos ĝin, la proksiman fojon vi ne ricevos vizon kaj via bofrato havos okazon palpadi la brikon enmasonitan por li en la muro de la karcero.

La virino sidis enpensiĝe, poste ŝi kapbalancis: estas en ordo. Ĉu vi scias, kiel ŝi kontrabandis la horloĝojn? Ili estis tegitaj per la originala ŝtofo de la surtuto kaj jene alkudritaj.

– Bona ideo.

– Se ni jam renkontiĝis, ĉu ankaŭ mi povas demandi ion? – alrigardis min la doganisto.

– Bonvolu demandi.

– Kio estis – kiel pasaĝero –, via plej granda trukado?

– Mi ne havis grandan trukadon. Mi memoras nur unu, eĉ tiu estis nur malgranda afero. Je la fino de la kvindekaj jaroj, estis malpermesate kunporti de Okcidento pošradion; la doganistoj tiel ĉasserĉis ilin kiel pli poste la kalkul-maŝinetojn. Mi estis en Aŭstrio kaj ĉiupreze mi volis kunporti pošradion por mi, do mi ĝin aĉetis en Vieno en la „ŝakradejo". Mi rompis al mi la kapon, kie ĝin kaŝi, ke ĉe la dogankontrolo ĝi ne estu trovota. Mi ekideis, ke oni malplej tiujn aĵojn vidas, kiuj troviĝas plej proksime al la okuloj, do mi metis ĝin en la internan pošon de mia jako.

La trajno alvenis al la limstacio Hegyeshalom. Venas la doganisto, li salutas.

– Ĉu vi havas ion por deklari? – li direktas la demandon al mi.

– Nenion.

– Bonvolu depreni vian valizon.

– Jes – kaj etendante mian manon al la valizo, hazarde per ĉi tiu movo mi ŝaltas la radion en mia pošo. Kvazaŭ tio estus hodiaŭ okazinta, tiel bone mi memoras: ĝuste ĵazo sonis. La doganisto nekomprene alrigardis min. En la plorinda situacio tra la malfermita fenestro mi almontris la stacion.

– Jam ankaŭ ĉe ni oni ludas tre modernan muzikon. Ni ne bezonas jam admiri Okcidenton – mi diris mangestante kaj per ĉi tiu movo mi malŝaltis la radion.

La doganisto alrigardis mian ŝvitbanitan vizaĝon, li provis rideti sciante tre bone, ke la verkistojn apartigas de la frenezuloj nur haro, fojfoje eĉ ne tiu. Li salutis kaj fermis post si la pordon.

Tradukis: István Nagy

Desegnoj de Tamás Bakos

Unu poemo – en du tradukoj

Mihály Babits

BOLYAI

„El nenio mi kreis novan,
alian mondon"
(Letero de János Bolyai
al sia patro)

Spiriton nian Dio ferme ligis
al spaco, tie povris nia menso;
kaj la avida fulmbute', la penso
eĉ ĝian baron ne alproksimiĝis.

Kaĝbirdon emis mi feliĉa juĝi,
se ĝi almenaŭ vidis *horizonton,*
mi el nenio kreis novan mondon, —
araneaĵan kablon por rifuĝi.

Trans ĉielo strikta, per nova leĝo
senfinon novan apertis spirito:
trans ĉiu imag' mi, estiel reĝo,

rabinte de la absurdo trezoron,
ridas vin kiel olda Eŭklido,
leĝdonant', kun Di' dividanta gloron.

Tradukis: Márton Fejes

Mihály Babits

BOLYAI

„El nenio mi kreis novan,
alian mondon."
Letero de Johano Bolyai
al sia patro

Mens' nia 'stis enspacigita ferme
de Di', kaj malliberis povra menso.
Avida fulmbuteo, homa penso,
ĝis orbaril' ne flugis deeterne.

Mi el neni' — kun feliĉig-intenco
por bird' vidanta vastan horizonton
tra l' kaĝo-drato — kreis novan mondon:
arane-ŝnuron por la kur-atenco.

Super ĉiel' per nova mia leĝo
mi novan spacon por la fort' spirita
malfermis trans realo kvazaŭ reĝo.

De mi maleblo estis prirabita.
Jen vin priridas mi, la Di-kunulo,
Eŭklid', leĝdona, sklava maljunulo.

Tradukis: *Péter András Rados*



Desegno de Ágnes Lukács

István Petelei

(1852-1910)

KAMPARANA HONTO

— Estera! Estera, ĉu vi aŭdas?

La demontega akvo susure torentis en sia fluejo, jen glutante la krivoĉon de la aglonaza, nigraokula, bruniĝinta junulo kun osteca mieno.

— Estera, hej! — La junulo staris transborde de la profunda akvo; antaŭenkliniĝante li observadis la malpuran, malgrandan vilaĝan korton.

— Estera, hej! — La pordoj de la domo estis fermitaj; en la fenestro kelkaj floroj revadis kaj en la krepuska obskuro la aĉaj ilarejoj ŝajnis dormeti.

— Estera, hej! Ĉu vi aŭdas?

Post longa tempo nerazita, maljuna, kaduka viro ĝemante rektiĝis de sur la stablo kaj elvenis el unu el la ilarejoj, forskuante la lignosplitojn kaj lame iris al la bordo de la rivereto.

— Nu, kion vi deziras tie transe?

— Bonvolu transĵeti al mi ŝnuregon. Hejtolignon mi kunportis por vi el la arbaro, kaj ĉi tie mi forkriegas la pulmon, ĝis vi moviĝas.

— Ne min vi vokis, Marteĉjo, se mi bone aŭdis!

— Voku do vin jam la lupa pesto... sed por vi mi portis la lignon... transĵetu la ŝnuregon kaj tiru ĝin al vi mem traakve.

— Miaj brakoj malfortas jam por tio.

— Alvoku Esteran kaj duope vi tiru!...

— Estinjo!...

Svelta, nudpieda fraŭlino elpaŝis el la ĝardeneto je la voko.

— Ĉu min vi vokis, Marteĉjo?

— Al via avo mi kunportis lignon por iloj, Estinjo, ke li havu laboron. Tiru ĝin traakve. Ulmo... Ĝi similas al mi: rektas, kiel sago, kaj malmomas, kiel fero...

— Tio estas laboro ne konvena al nia forto, Marteĉjo, ke ni ĝin altiru kontraŭ fluanta akvo.

— Ĉu vi volas prefere, ke mi mem portu ĝin al via korto? Ĉu mi estus bonvenigata, Estera, se mi portus ĝin?

— Tio signifus por vi grandan ĉirkaŭvojon, Marteĉjo.

— Eĉ pli grandan mi farus por vi, Estera.

— Ŝajnas, ke vi tamen ne al mi portis la lignon, Marteĉjo.

— Pro mi vi ne devas penadi, Marteĉjo...

La junulo dorsapogiĝis al iu kurba saliko, cigaredon volvis kaj kun plaĉo rigardis trans la rivereton. La fraŭlino sekvis per la okuloj la nigriĝantajn akvokrispojn por ne vidi la laŭtan junulon kaj turnis sin por eniri la domon. La raŭka voĉo de la junulo denove aŭdiĝis:

— Ne eniru ankoraŭ la domon, Estera! Mi pensis ankaŭ pri vi. Mi deŝiris por vi bukedon da karlinoj ĉe la Tegola-ŝtono (kaj li transĵetis la bukedon), ĉar mi memoras vin ankaŭ tiuloke, Estera!

— Malbone vi faras, Marteno — sed tion ŝi diris pli mallaŭte, ke tio malĝentile ne sonu. — Portu ĝin al iu alia, kiu plie meritas ĝin.

— Kompari vin eblas al neniu, Estera!

— Sed fianĉon ŝi havas — replikis tuse la maljunulo —, ja ankaŭ vi scias... Aleksandro estas ŝia fianĉo.

— Ne babilaĉu tion, kio vin ne koncernas... Nenio certas en la mondo, vi scias!

La fraŭlino heziteme levis la vilan floron.

Sentima, malsata birdeto saltadis sur ŝtonoj rande de la akvo, fiŝojn serĉante. En la vilaĝo bovidoj muĝis en la staloj, dolĉan lakton deziantaj. Je la grinco de la korta pordego la fraŭlino turniĝis... Iu enrigardis el la strato. La fraŭlino rapide ekiris tiudirekten kaj sciante, kiu staras ekstere, ŝi elpaŝis, la floron ĵetis al la pordega angulo.

Tiu junulo ekstere atakis ŝin per amaraj vortoj.

— Vane vi forĵetis la karlinojn, ĉar mi vidis ĉion.

— Kio do, se vi vidis?

— Kio do?... Du junuloj ne konvenas por unu fraŭlino... Volu elekti aŭ la florojn de Marteĉjo, aŭ min. Du junuloj malutilas por unu fraŭlino, floreto mia...

— Io vin incitas, Aleksandro?

— Nu, se vi ne estis bezonanta la floron de Marteĉjo, kial vi ne reĵetis ĝin al li?

— Kiel mi povus tion fari? Li alportis ankaŭ lignon al la avo.

La junulo mezuris ŝin per rigardo kaj kolere-

me pugnobatis al la aero. La fraŭlino senespere lin observis:

— Multe vi afliktas min, Aleksandro, de kiam mi venis hejmen.

— Multe vi afliktas min, Estinjo, de kiam vi venis hejmen...

— Antaŭe vi havis sole afablajn vortojn al mi.

— Antaŭe vi havis sole al mi afablajn vortojn, Estinjo...

La fraŭlino malpacience indigniĝis:

— Al kiu do mi havas ankoraŭ?

La junulo saltis, kvazaŭ risorto lin suprenĵetus.

— Gardu vin! Ĉu vi volas, ke mi parolu?... Mi vidis la florojn, kiujn vi forĵetis, kiam vi ekvidis min, kaj oni babilas eĉ kromajn aferojn pri vi, ke iu ĉiuvespere gvatas vian domon...

— Nian domon, ĉu?

— Ja, vin, mia fianĉino bela... ĝuste vin... Tamen Dio estu indulgema al ĉiuj.

La nokto kviete dislvolvadis sian vualon, la strato dronis en silento. La domoj de la bieneto iom moviĝante sidis inter arbobranĉoj, la anseroj en rekta vico, la meleagroj zigzagante paŝadis al la bestejo kaj ĉirkaŭ la pacema bovo remaĉanta nigraj skaraboj zumis tra la peziĝanta aero.

Ĉe la stratangulo, apud la triopa krucaro iu ĉifonulo ŝteliris malantaŭ la malhelaj arbustoj. La junulo per siaj akrevidaj okuloj lin rekonis kaj kaptis per kelke da saltegoj:

— Ĝuste pri vi mi meditis, olda ŝtelisto! — riproĉhurlis al li.

La maljunulo time mangestadis:

— Foriru de ĉi tie, stultulo! Nenion komunan ni havas.

La junulo lin prenis ĉekolume:

— Ion vi planas ankaŭ nun en malica kapo via, Baltazaro, ke vi ŝteliradas ĉi tie... Ĉar oni babiladas laŭ via malica buŝo... oni babiladas... ke nokte en via okupiĝo, dum via noktogardado, oni babiladas... ke vi vidis ion ĉi tie sub la fenestro de Estinjo, mia fianĉino... Kion? Eldiru... eldiru tuj. Kion vi scias? Mi volas aŭdi.

— Ne iĝu freneza, Aleksandro mia! Malprenu la kolumon, ĉar ne via patro aĉetis ĝin...

— Vere mi fortordos el vi la animon, se vi ne parolas...

— Tiukaze mi ja povus paroli... Stulta vi estas, Aleksandro! Kion mi devas vidi? Ĝuste mi? Miaj okuloj elkaviĝu, se mi vidas ĉi mallume. Kion vi volas, ke mi vidu?

La fraŭlino intervenis per riproĉaj vortoj:

— Ĉu mi meritas, Aleksandro, ke vi hontigu min?

— Ĉu vi timas tion, kion li scias?

— Dio vin punos pro tio, Aleksandro.

— Dio min punis per vi...

Kaj li flankenpuŝis la ruzvizaĝan maljunan kamparanon, poste kovris siajn okulojn. La turmentita noktogardisto iom fortiriĝis. La fraŭlino demandis kun flustraj lipoj:

— Kion devas scii pri mi Baltazaro, la noktogardisto?

La junulo deprenis la manon de siaj okuloj kaj kun mildiĝema rigardo observante la aflliktitan fraŭlinon, li diris iom pli mallaŭte:

— Mi tute ne scias, kion mi parolas. Estinjo! Vidu, vi ege enradikiĝis en mia koro kaj mi maltrankviliĝas pro vi... Ne koleru min.

De la korto la maljuna avo interrompis la amaran interparolon:

— Vi havis riproĉvortojn, ĉu? Tamen ne surstrate ordigu vian aferon... Ĉu vi envenas, Aleksandro?

— Ne, aveto, mi havas senprokrastan aferon, mi devas kapti ĉekole malhonestulon. — Kaj li apenaŭ adiaŭante la fraŭlinon, postkuris la maljunan kamparanon, kiu dume rapidpaŝe malaperis.

La maljunulo en la granda kahelforno ekbruligis spliton sub la kaldrono. La aeron plenigitan per fluganta fumo traflamis la fajro, kiu lumigis la malhelan ĉambreton.

La fraŭlino senvorte eksidis sur la kahela sidloko de la forno kaj incitis la fajron. Io eble iritis ŝiajn okulojn, ĉar larmoj elgutis el la palpebroj.

— Vi estas la portreto de via patrino. Ankaŭ por ŝi oni tajlis ampleksa la larmsaketon, ĉar ĝi en ŝi falice malligiĝis pro ĉiaspecaj bagatelaĵoj, same kiel en vi. Ĉu sole la fumo pikas viajn okulojn? Pro tio mi malŝatas la blondulinojn...

— Sole la fumo, aveto, la fumo...

En la kaldrono la akvo jam komencis muziki, kiam Marteĉjo — staranta apud ulmoŝtipo — frapis la porgedon. Iom post iom tute mallumiĝis kaj sur la nuba firmamento briletis kelkaj steloj. Aŭdeblis, kiam la ĉaro alportinta la ŝtipon klakmoviĝis for sur la senbrua, nigra strato, dum Marteĉjo etendis la manon super la malalta pordego, ekprenis ties kroĉilon kaj malfermis la flugilojn.

— Kial vi portis la ŝtipon nun Marteĉjo? — demandis la fraŭlino staranta ĉesojle el abundo de sia koro kun maltimo de ĉagreniĝo. — Kial vi nun portis? Vi havus tempon eĉ morgaŭ matene, escepte, se vi deziras, ke oni priklaĉu min. Ĉar oni jam klaĉas pri mi, notu bone! Kaj oni babilas pri tio, ke en mallumo fraŭloj vizitas min.

Marteĉjo rulis la ŝtipon perpiede sur la deklivan korton.

— Oni nur babilu en la vilaĝo... mi scias, kiu vi estas, kia vi estas! Kaj pleje vi belas al mi en la mondo; se eĉ al nèniu vi bezonatus, al mi vi konvenas, al mi vi pleje bonas, Estinjo, en la mondo! — Kaj li bonhumore volis preni al ŝi la manon.

Ŝi kolereme retiris ĝin. Marteĉjo kun ignoro akceptis tion por esti indiferenta je la respondo kaj amike li frapetis la ŝultrojn de la maljunulo.

— Drinkaĵon mi alportis, jen, se vi ne malŝa-

tas ĝin, aveto... — Kaj li metis sur la tablon plenan botelon kun bonodoraj herboj en ties fundo. Ankaŭ li mem okupis lokon apud la botelo, kubutumante vidalvide al la maljunulo.

— Ankaŭ vi malice alrigardas min, oldulo, en tiu ĉi domo, kiel iu alia? Probable ne! Eble vi scias, kiu mi estas? Mi ne estas pli malbona, ol aliaj homoj! Mia bieneto same malhavas sarkindaĵojn, kiel tiu de aliuloj, kaj miaj brakoj same tiom fortas, kiel tiuj de la aliaj... ĉu ne? Nekonsilinde ilin ekprovi!... Nu, gustumu la drinkaĵon, aveto — kaj li transdonis la botelon, viŝante sian buŝon per la maniko de la ĉemizo.

Poste li reprenis la botelon, eltrinkis iom el ĝi kaj la brakojn antaŭe tenante, li denove volvis cigaredon.

— Dio kreskigas la knabinojn tiel same, kiel florojn sur la kampo — do por kies ajn ekposedo. Ne speciale por iu, sed por ties plezurigo, kiu ilin deŝiras. La knabinon volas kapti kaj Petro, kaj Paŭlo — laŭ Dia deklaro ŝi apartenu al tiu, kiu pli lertas, pli fortas. Nu, la Dia moŝto tiel same ne destinis vian nepinon speciale por Aleksandro, sed por tiu, kiu ŝin deŝiros. Ĉu estas leĝigite, ke ŝi ne apartenu al mi?

Li fumadis plu, elbuŝigante grandajn fumrignojn kaj kubutumis sur la tablo tiel, ke li tute okupis ties duonon. La akvo bolis jam en la kaldrono. La fraŭlino — penante eviti la rigardon de Marteĉjo — jam kuiris la manĝaĵon kaj metis ĝin antaŭ la maljunulon.

— Tiukaze la bovo apartenas al vojrabisto, se li pli fortas... ĉar Dio ankaŭ la bovon ne destinis speciale por iu.

Ĉi tion iom poste la maljunulo diris sen li kuraĝiĝo. Marteĉjo ŝajnigis, kvazaŭ li ne estus aŭdinta tion kaj po gutegoj li suĉadis el la botelo.

— Mi havas belajn brodteksaĵojn en la kesto de mia panjo, kiujn ŝi mem faris permane, krome rulaĵojn da fajna tolo, kiel pura silko...

Estera eĉ rigardon ne ĵetis al la junulo, prefere ŝi moviĝadis ĉirkaŭ la forno.

— La littolaĵoj ĉe mi etendiĝas ĝis la trabo kaj ornamojn sur ili ankoraŭ mia avino brodis en sia knabina aĝo... krome mi havas rufan bekeŝon, kiun eĉ reĝino volonte portus.

La maljunulo manĝis enpensiĝante. La vilaĝo tute eksilentis, nur aŭdiĝis la susurado de la ŝvelinta akvo, mildiĝinta en la fluejo. La fraŭlino ree sidiĝis sur la sidloko de la kahelforno, klinante la kapon malsupren. La maljunulo mallaŭte ekparolis:

— Vere impona riĉeco, Marteĉjo! Tamen Dio destinis mian nepinon al alia viro...

— Ĉu vi traktis kun lia sankta moŝto?

— Ili estis traktintaj kun li.

— Ili komprenis lin mise. Denove ili parolu kun li.

La fraŭlino incitite ekparolis:

— Ĉar vi procesus eĉ kontraŭ Dio.

— Eĉ kontraŭ la infero por vi, Estinjo. Kaj mi procesos pro vi, ke vi fariĝu mia, eĉ se vi jam havas centoble fiančon... milde, se vi venos obeeme... kaj perforte, se oni vin retenos. — Arogante li ŝin rigardis kaj drinkis. — Vi havus ĉe mi bonan staton, Estinjo, vi venus al mi en riĉan domon... Ĉaro en la veturilejo, plenŝtopita kesto en la domo, garbaro sur la kampo, varma koro sub la ripoj de la mastro — ĉu dezirate io pli krom tio?

— Io jes, Marteĉjo! Nome tio, ke ne sidadu ĉi tie ĉe ni dum vespero... mi ne vokis vin, ĉe ne devigas vin restadi ĉi tie kaj se mi jam elektis aliulon por mi mem, ne hontigu min sub la okuloj de ĉiuj, ke vi sidas ĉi tie, kiam ne estas tempo por tio... Ĉar proksimiĝas la nokto... kiel oni opinios eksciante, ke fremdulo sidas ĉe ni...

La altstatura, osteca junulo leviĝis.

— Ĉu vi forpelas min? Ĉu vi kredas, ke mi estas ĉarpentita el ligno aĉa, se iu volas, min povu formovi de tie, kie por mi oportunas resti?... Gardu vin, ĉar vi venos ankoraŭ plore post mi, se vi forpelas min...

Li mezuris la ĉambreton per grandaj paŝoj: li malfermis la pordon de la antaŭdomo; revenis, piedpremis la cigaron kaj denove iradis iom, observante la fraŭlinon per obstina rigardo, poste li eniris la malhelan ĉambron, turnante dorson al la kovrita lito. Kiam ekstere la noktogardisto kun laŭta voĉtiro krie-signis la dekan horon, Marteĉjo ekscitite riproĉis al ŝi:

— Do, vi promesis vin al aliulo? Ĉu vi ne havas kroman direndon al mi de nun, Estinjo?

— Eble vi kredas, ke mi timas vin?

— Ĉu tio estas via lasta vorto?

— Jes... jes... nu... — balbutis la maljunulo.

— La lasta? Mi foriras do, sed ion mi forportas de ĉi tie... vian reputacion... Venu post ĝi, Estinjo. Vi trovos ĝin ĉe mi...

Kaj dum li parolis, per rapida movo li malfermis la fenestroklapojn al la strato kaj eksaltis sur la kornicon.

La fraŭlino teruriĝinte alkuris lin kaj kaptis lian veston.

— Kion vi faras, sankta Dio, vi volas fuĝi tra la fenestro?

— Lasu min... Vi forpelis min, mi eliras...

— Kion vi volas? Se oni vin rimarkos, kion oni opinios pri mi?

— Mi diris... venu post mi — li kriis kaj elsaltis, elŝirante sin el la manoj de la fraŭlino.

La noktogardisto ĝuste tiam pasis antaŭ la domo. Marteĉjo mallaŭte lin alparolis:

— Faru bruon, Baltazaro... Malfermu la buŝon...

La maljuna kamparano hurlis per plena gorĝo:

— Ŝtelisto... ŝtelisto... kaptu lin!

* * *

Surstrate ariĝis tuj legio da homoj. En la peza mallumo de ĉiuj direktoj venadis homoj, kunfrapiĝintaj, embarasite kriantaj. „Kaptu lin!" — ili kriadis. „Kiun?" „Kaptu lin!" El malfermitaj fenestroj aŭdiĝis: „Ŝtelisto, ŝtelisto!"

La noktogardisto hurlis al ili:

— Haltu, kien vi kuras? Ne timu, ĝis vi vidas min...

— Kiun vi kaptis? — ili molestis lin de ĉiuj flankoj.

La strato multhomiĝis, la pordegoj grincadis, korthundoj bojadis kolere.

Baltazaro superfortis la bruojn:

— Ne kriu... Ne okazas malbono, dum vi vidas min.

— Kio estas forŝtelita? — ili demandis jen tie, jen aliloke. — Ĉevalo?

— Nenio...

— Kial do vi hurlas ĉi tie?

— Mi hurlas, ĉar regulo postulas... kiam iu elsaltas tra fenestro... Kiel vi agus en sama okazo?

— Tra kies fenestro elsaltis tiu ulo?

— Jen tie? Tra la fenestro de Estinjo Virág li eskapis...

Subite ili eksilentis. „Ni observu, kio okazis tie" — stentoris iu voĉo. Ili ĉiuj sin turnis al la domo. Dume kelkaj virinoj laŭtparolaj, informiĝivolaj sin pretigis por spuri. Iu transsaltis la branĉplektaĵon: li malfermis la pordegajn klapojn. Iu virino falpuŝiĝis je la ulmoŝtipo kaj en la mallumo blasfemante veadis.

En la malvasta kuirejo lampo flagretis kaj la maljunulo time staris apud la tablo. Konfuzaj klamoj direktiĝis al li. La falpuŝiĝinta virino alkriis lin:

— La pesto vin frapu, maljunaĉa azeno, kial vi staras tie? Kio okazas ĉe vi? Jam honesta homo ne rajtas loĝi ĉi tie najbare? Ĉu vi estas ebria?

— La fraŭlino petolis, ne la maljunulo...

— Ŝi petolu en la arda infero, sed ne ĉi tie, dum nokto. Kion vi faras?

— Mi staras ĉi tie, kiel vi vidas per la propraj okuloj.

— Prefere vi utiligus viajn okulojn por ne kaŭzi honton antaŭ via nazo... Ĉu vi ne hontas, kiam malhonestaĵoj ekiĝas sub via tegmento? Bele vi edukis vian nepinon; ŝia patrino ne povas ripozi en sia tombo.

Kaj ŝi ĉirkaŭrigardis kun la manoj sur siaj larĝaj koksoj.

— Kie vi troviĝas mallume, Estinjo, vi fajna urtikfloro, ĉar mi ne vidas vin. Kie vi kaŝas vin for de la homoj? Ĉu tra via fenestro fuĝadas la fraŭloj? Ĉu vi indignigas la apudan domaron?

— Hej — ŝi kriis —, se troveblas ĉi tie ĉastaj knabinoj... ili tuj rapidiru hejmen... ĉi tie ĉastaj knabinoj ne rajtas restadi, ĉi tie fraŭloj fuĝadas tra la fenestro... Nesciate, kiom da ili estas kaŝitaj en ĉiu angulo... kiun vi rekontas... tuj rapidiru hejmen...

La maljunulo konfuzite balbutis:

— Vi ne scias, pri kio vi parolas.

— Ĉu mi ne scias? Mi scias nur tion, ke mi estas vekita ellite pro via nepino, kiam oni kriadas pri ŝtelisto... Kaj kion vi scias? Diru!

La homoj komencis disŝutiĝi ĉirkaŭ la pordo. La batalema virino akre spirblovis pro kolero kaj en tiu sama momento el la mallumo svelta junulo ekaperis.

— Ankaŭ vi ĉeestas, Aleksandro? Jen vi mankis ankoraŭ.

— Flankiĝu — kriis la junulo kaj larĝe li mangestadis. — Kio ĉi tie okazas?

— Malrapide — diris tiu, kiu suferis frapon fare de la junulo.

Iu el la mallumo aldonis:

— Li nur kverelu... ĉar la ludo iras je lia propra haŭto... Kiu alia gardu kaj ŝirmu la fianĉinon, se ne li mem?

La junulo raŭke kriis:

— Forportu sin ĉiu, al kiu la vivo estas kara...

Kaj en la sekva minuto Aleksandro ĵetis sin al la noktogardisto kaj kaptis lin je gorĝo:

— Vi parolu...

— Ĉu mi? Kiel mi kapablas paroli, Aleksandro, se vi premas mian gorĝon?...

Dekope oni alkriis: „Ne insultu Baltazaron." „Iu fuĝis tra la fenestro." „Li gardis la domon."

— Kiu fuĝis tra la fenestro? — li demandis kun ekscitiĝo.

La noktogardisto singulte respondis:

— Marteĉjo...

La homoj kaptis la junulon por liberigi la noktogardiston, sed ili tuj forlasis lin, ĉar konfuzita bruo aŭdiĝis de la riveretbordo... Iom poste kriado sonis: „Iu saltis en la akvon." „La fraŭlino saltis en la akvon... Estinjo, ve..."

— Ŝin pelis la honto — diris la virino, same kuranta al tiu direkto. Amaso da brakoj etendiĝis al la akvo. Eĉ en la blinda mallumo vidiĝis jen aperanta, jen mergiĝanta kapo sur la nigra akvospegulo. Subite pluraj homoj ensaltis por ŝi...

La brakoj de la junulo defalis de sur la gorĝo de la noktogardisto. Sian vizaĝon la junulo premkaŝis per manplatoj pro terura ektimo. Tuj poste li ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ vekiĝinta el sonĝo kaj per enorma ekpreno li eltiris apogan foston el la palisaro.

— Mi kaptos en ĉi tiu nokto... tiun alian... se ekzistas Dio en la ĉieloj...

Kaj li kuris al la monto, kie stiras la domo de Marteĉjo...

Tradukis: Jozefo Kiss

D-ro Pál Avar

Nova medicina koncepto

1. Moviĝo en la psikoterapio

Eĉ la nuntempaj psikiatriaj fakkuracistoj malofte uzas adekvatajn kuracmetodojn. Por klarigi tiun bedaŭrindan situacion, eble sufiĉas mencii la plie nekonatajn kaŭzojn de la mensaj malsanoj, t.e. la malcertan etiologion. Tamen ne tio estas la plej granda malfeliĉo por nia fako – almenaŭ laŭ mia opinio –, sed la plie kaj daŭre ekzistanta malnova vidpunkto, pli konkrete: la unuflanka biologia aspekto.

Teorie ĉiu kolego scias, ke oni bezonas distingi inter la homo kaj la rato. Tamen ili ĉiam neglektas tion en siaj kuracaj praktikoj. La homa raso dum sia mult-cent-miljara evoluo dividis la laboron, detaligis la produktoprocezon, tial unu persono neniam formas unu individuon. Nur la grupo de l' homoj faras unuon, t.n. referencan grupon (angle: *reference group*). Tiu koncepto, tiu ĉi nova nocio revoluciigis la modernan antropologion, la sociologion kaj espereble ĝi baldaŭ difuziĝos en la kuracan medicinon.

Koncerne la psikoterapion, la problemo sekvas el la malnova pensmaniero aplikata en nia teritorio: el la eksmodiĝinta, unuflanka hombildo reganta la universitatajn librojn kaj la praktikantajn cerbojn.

Nun mi ne volas tuŝi la epokfaran ideon, teorion kaj metodon de Freud: la psikoanalizon. Eĉ tiu granda kreaĵo ne atingis ĝis nun la nuntempajn medicinajn fakultatojn, nek la tutan medicinan sciencon. Bedaŭrinde ĝi restis nur en la privata praktiko simile al la aliaj psikologiaj kuracmetodoj – almenaŭ ĉe ni, en Hungarujo.

Mia nuna tasko estas sciigi la Leganton pri la malavantaĝoj de la individuaj metodoj, poste skizi per malmultaj vortoj la eblecon de nova terapi-koncepto.

La menciita psikoanalizo, eĉ ankoraŭ la aliaj metodoj, ekzemple la hipnoto, la konduta terapio ktp. ĝenerale kaŭzas dependecon inter la kuracisto kaj la paciento. Sekve tiu ĉi dependeco faras nedezirindan regreson en la personeco de la malsanulo. Tiu similas al la rilato inter la infano kaj liaj gepatroj.

Mia kuracmetodo, nomita: heroa terapio (aperigita en 1972) evitas ĉi tiun danĝeron, ĉar ĝi instruas la pacienton ne ĉiam ripetadi siajn plendojn, sed ĝi helpas lin trovi – sola aŭ kune kun la kuracisto – unu aŭ kelkajn sukcesajn plenumaĵojn, unu aŭ kelkajn belajn travivaĵojn inter siaj rememoraĵoj. Poste li provas elvoki eĉ la detalojn almenaŭ de unu grava evento aŭ rilato (epika metodo).

La rolo de la terapiisto estas senĉese instigi tiun rememorigan fantazion, imagan klopodon. Poste en certa, oportuna momento enkonduki la pacienton en la grupon, pli precize; en la grupan situacion. Tie povas disvolviĝi la pozitivaj, ĝis tiam subpremitaj trajtoj de lia personeco. Fine la grupo, la nova, akirita grupo helpas rekrei la konfuzajn aŭ konfliktajn interrilatojn de la malnova, sed natura medio, kaj helpas elforĝi la novan, pli maturan „ego"-on.

La plej gravaj indikoj pri la heroa terapio estas la nervozaj malsanoj, malplie la psikozoj. Mi okupiĝos nun precipe pri la kazoj de la alkoholismo.

2. La kuracado de l' homo

Kiam mi komencis la kuracan praktikon, mi baldaŭ rimarkis, ke io ne estas en ordo.

Unue la malsanuloj kaj iliaj parencoj kuris al mi timeme, kun angoro. Poste, demetinte siajn ŝarĝojn, ili jam ne interesiĝis plu pri la premanta medicina problemo. Tiam mi sentis gravan ofendiĝon pro tio.

Tiu sentema stato daŭris longe. Nur malfrue, ĉirkaŭ post jardekoj mi kapablis koncepti kaj per vortoj esprimi la kaŭzon de mia surprizo.

Nome: kiel aliaj estaĵoj, ankaŭ la homa individuo ne ekzistas sola. Sed kiel membro, li partoprenas en la tuta grupa vivo. Aldone: kun lia plena sorto, ĝis la morto. Precize kaj pragmatike, li estas propraĵo de lia biologia grupo (familio), kaj en la kazo de la raso homa nur – li fariĝas membro de ceteraj sociaj grupoj (laborloka, amika rondo kaj ne malofte de iu sekreta interrilato). Ĉiuj estas vere problemsolvantaj grupoj, en kiuj racia aktiveco fluadas (poligrupismo).

En realaj aŭ raciaj (aŭ praktikaj) problemsolvantaj cirkloj naskiĝas normoj, kiuj estas kulturaj valoroj. Ili operacias kaj direktas la individuon kaj lian grupan konduton.

La biologia grupo estas pli forta ol iu ajn alia grupo. Tiu organizo fariĝas la modelo por ĉiuj sociaj komunumoj. „Kiel vi fartas en via laborloko?" – demandis min unu el miaj amikoj. – „Bone!" – mi respondis, – „ĉar la atmosfero estas tute familia. La ĉefo kiel nia vera patro..." La kontraŭan varianton oni povas apenaŭ imagi. Jen: – „Kiel vi fartas en via familia rondo?" – oni demandus en ĉi tiu kazo. – „Bone, kiel en la laborloko!" – respondus iu grandanima amiko. – „Mia patro kiel mia laborloka ĉefo..."

Mi skribis pli supre: unu el la plej grandaj malfeliĉoj estas la ĝis nun vivanta, daŭre ekzistanta malnova medicina vidmaniero. Pli konkrete: la nura biologia

aspekto. Teorie ĉiu kuracisto scias, ke oni bezonas distingi inter la homo kaj rato. Tamen ankoraŭ multaj neglektas tion en sia medicina praktiko. La homa raso dum sia multcent-mil-jara evoluo laŭgrade dividis la problemsolvantan aktivecon: la laboron. Ĝi detaligis la produkto-procezon, tial ke hodiaŭ unu persono jam ne formas unu individuon, nur la grupo de l' homoj faras unuon. Tiu koncepto, tiu ĉi nova nocio revoluciigis la modernan antropologion, la sociologion kaj espereble ĝi baldaŭ difuziĝos en la kuracan medicinon.

Koncerne la psikoterapion, la problemo sekvas el la olda pensmaniero aplikita al nia teritorio: la eksmodiĝinta, unuflanka hombildo regas la universitatajn lernolibrojn kaj la praktikantajn cerbojn.

Ĉi tiel mi oratoris en la komenco de tiu ĉi artikolo. Kaj mi kredas, ke mi pravis.

Kiam mi esploris plu la demandon, mi trovis, ke ĉiu grupo havas ĝeneralan kaj gravan funkcion en la personec-dinamiko. Se oni suferas vundon aŭ difekton en sia iu ajn grupo, onia situacio ekŝanceliĝas. Poste onia grupa pozicio gravitas en la direkto de la rando, al la ekskomuniko. Timo kaj angoro striktigas la konscion, kaj ili estigas tunelvidon.

En ĉi tiu kriza stato oni ne povas komplekse vidi kaj elaste konduti. Ĝi produktas internan tension, perfortan emocion kaj regreson, kaj oni uzas nepre maltaŭgan kaj malkorektan strategion por liberigi sin en la malagrabla kaj neeltenebla situacio: el la frustriga krizo.

En ĉi tiu stato la paciento ne akceptas iun ajn racian solv-proponon. La nuntempe ĝenerale uzata interveno en la krizan staton (ekzemple: la telefonhelpo) ne estas pli ol surfaca aranĝo, provizora deflankigo, simple dirante: fajroestingo. Nur iu bone organizata invado – de la flanko de bone instruita teamo –, kiel de iu ambulanca savbrigado kapablas solvi la problemon.

Ĉi tiu aktiveco nomiĝas *redempcio,* t.e. elaĉeto.

Nun mi ne povas detaligi ĉi tiun studobjekton. Mi nur mencias kelkajn ekzemplojn kaj pensojn el la dektrijara fakmaterialo. Tia estas la „triangula terapio' kontraŭ la alkoholmalsano.

La triangula terapio estas karakteriza redempcia metodo, ĉar la „triangulo" formas novan grupon, novan problemsolvantan komunumon. Ĉi tiun grupon la paciento verŝajne akceptas, ĉar li ne estas imuna kontraŭ tiu ĝis tiam nekonata organizo, kaj tial li ne estos tie – almenaŭ komence ne – en randlima aŭ marĝena situacio.

3. La triangula terapio

Kiam oni mencias la vorton „triangulo", certe ĉiuj el vi pensas unuafoje pri la malnova teatra nocio. Triangulo estis iam kutima temo de multaj teatraĵoj. En la centro de la okazintaĵo staris tipa geedza situacio: la edzo aŭ la edzino iun tagon enamiĝis al tria persono, al la Potenca Tria. Tuj la ĉiutaga trankvila atmosfero forvaporiĝis el la vivo de la geedza paro, kaj la komplikaĵoj komenciĝis...

Mia afero – eble bedaŭrinde – ne tuŝas tian pikantan sferon. En mia kuraca metodo temas pri „triopo" psikologie: pri triopo, kiu signifas en la praktiko, ke inter la kuraciston kaj la malsanulon – la tradician kurac-duopon – enpaŝas ankoraŭ tria persono. Ĉi tiu ne nepre estas la amiko de la familio (t.n. hejma amiko) aŭ strikte tiu de la geedza paro. Ne! La rolanto povas esti la edzo mem (la edzo de la malsanulino) aŭ la edzino (tiu de la malsanulo). Sed ankaŭ iu ajn membro de la kolegaro aŭ tiu de la amikaro konvenas. Gravas nur, ke la koncernulo havu intiman rilaton al la malsanulo.

Do, kio estas la rolo de tiu tria kompano? Nu, li aŭ ŝi partoprenas en la psikoterapia „ludo".

Ili unuafoje ligas kontrakton. Kompreneble ne formale, nur rite. Do sen papero... En ĉi tiu kontrakto, la tria ludanto entreprenas specialan helpon je la kuraca laboro. Li helpas kaj la kuraciston, kaj la pacienton dum la tuta kuraca procezo.

Tiu rolo enhavas du gravajn funkciojn:

1. akiri la recepton kaj aĉeti la Antaethyl (anticol)-tablojdojn;
2. glutigi tiun kontraŭ-alkoholan medikamenton ^iutage, laŭeble en la sama horo.

Kvankam la kuracisto estas, kiu ligas ĉi tiun kontrakton, tamen ĝiaj reguloj devigas ankaŭ lin. T.e. la medicinisto devas direkti kaj kontroli la kuracadon; la malsanulo devas ĉiuokaze akcepti kaj gluti la medikamenton el la mano de la tria entreprenanto.

Tiuj, kiuj legis ĉi tiun unuan parton de mia artikolo, verŝajne konjektas, eble kelkaj el ili klare komprenas, ke tiu kuraca metodo havas du apartajn dimensiojn.

La unua estas la reala, se tiel diri: racia aspekto. T.e. la ofta drinko, laŭgrade malboniĝintaj familiaj kontaktoj, netolerebla situacio por la infanoj, la unuaj certaj signoj de la dekadenca laborkapableco, poste la perdo de la laborloko kaj fine la kuracado per la konstanta englutado de la tablojdo.

La dua aspekto estas nereala, ĝuste malracia. La rito de la kuraca kontrakto kreas novan, iomete solenan klimaton inter la tri kontraktintaj personoj. T.e. klimaton de la ambaŭflanka konfido, la esperon de la rekomenco de la viv-vojo, de renaskiĝo.

Unu el miaj pacientoj ekkriis tiel post la kontraktliganta iniciado: „Mi estas feliĉa! Mi ne devas plu drinki, ĉar mi nun fariĝis nova homo!"

Ja tiaspecaj deklaroj kaj manifestaĵoj ne aŭdeblas tre ofte en nia faka praktiko: nek en la alkohologio, nek en la larĝa psikiatria-psikoterapia teritorio.

Verdire: ekzistas unu ne tre nova direkto, nome la transakcia analizo, kiun fondis E. Berne.

Proksimume sepdek kazoj de pacientaro kolektiĝis ĝis nun en mia dek unue jara eksperimento. El tiom da trianguloj ankoraŭ vivas la plimulto. Troviĝas jam kelkaj kolegoj, ne nur psikiatroj, kiuj same uzas la kuracan triangulon – espereble kun la sama sukceso.

recenzoj

Esperanto kaj socio

Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. Studoj de D. Blanke, E. K. Drezen, M. I. Isajev, U. Lins, S. N. Podkaminer kaj A. Rátkai. Redaktis Detlev Blanke. Dua eldono. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1986. 19x13 cm. 228 p. Prezo: 13,80 gld. (Por Hungario: 60,- forintoj)

Antaŭ pli ol 200 paĝoj plenaj de pensigaj ideoj recenzanto staras embarasata kiel vizitanto en granda scienca muzeo. Detlev Blanke, redaktante, aranĝis la rigardindaĵojn laŭ tri fakoj: historio, ideaj fontoj kaj perspektivoj de la internacia/universala lingvo. Tamen la tri fakoj ne estas facile distingeblaj, ekzemple, p. 26, 46 kaj 223 pritraktas la saman temon: la sintenon de gvidantoj de la Komunista Internacio al internacia lingvo.

Unu el la ĉefaj pensoj de la plimulto de la ses kontribuintoj estas kontraŭi la ideon, ke la deziro de Zamenhof, ke la tuta homaro havu unu lingvon, estis esenca „interna ideo" por la sukceso de Esperanto kompare al aliaj lingvoprojektoj. Ekzistas pruvoj, ke Volapük kaj Ido havis la saman internan ideon. Esperanto sukcesis, ĉar Zamenhof komprenis, ke ne li sola, sed la tuta kolektivo de la uzantoj, decidos pri la plua libera evoluigo de la lingvo sur firma neŝanĝebla fundamento per tradukitaj kaj originalaj literaturaĵoj. Malgraŭ ĉio ideoj estas ligitaj al lingvoj. Ekzemple, se oni uzas la araban lingvon, oni nepre scias pli multon pri la Korano ol uzantoj de aliaj lingvoj.

En konvinka artikolo Semjon Podkaminer konkludas, ke Lenin nek parolis Esperanton nek malaprobis ĝin. En 1920 Lenin opiniis, ke ĝi povus esti utila lingvo por la celoj de internacia laborista movado, kvankam en 1914 li skribis, ke la tutmonda lingvo eble estos la angla lingvo, aŭ sola aŭ kune kun la rusa lingvo.

Artikolo pri la Internacio de Proleta Esperantistaro ne estas tiel konvinka. Detaloj mankas aŭ estas eraraj. Laŭ p. 56, ekzemple, IPE malfondiĝis en 1933, kiam laŭ n-ro 4(14) de *Sur Posteno* (Moskvo) ĝi havis ĉirkaŭ 17.500 membrojn. La vera jaro de ĝia malfondiĝo estis 1939, kiam laŭ n-ro 82 de la brita *Ruĝa Stelo* ĝia membraro estis 500. Mankas klarigo, kial la anoj de la Sovetrespublikara Esperantista Unio ĉesis esti anoj de IPE kaj kial la sukcesa Proleta Esperanto-Korespondado inter rusaj fabriklaboristoj kaj eksterlandaj laboristoj finiĝis.

Artikoloj de Detlev Blanke kaj Ulrich Lins detale priskribas la kunlaboron de laboristaj esperantistoj en Germanio kaj Sovet-Unio dum la Respubliko de Weimar (Vajmar) kaj la vanajn provojn de germanaj neŭtraluloj sin ligi al la posta nazia ŝtato.

Edward Ockey

La pioniraj jaroj

I. Kökény – V. Bleier: Enciklopedio de Esperanto. Tria eldono. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1986. 600 p. 24x17 cm. Prez.: 45,00 ned.gld.

Tiu, kiu volas posedi fidindan konsultlibron pri la historio de la disvolviĝo de la Esperanta lingvo, literaturo kaj movado inter 1887 kaj 1932, ne povas fari pli bone ol aĉeti la Enciklopedion de Esperanto.

Per nova faksimila eldono Hungara Esperanto-Asocio faras bonan servon al la esperantistaro. Antaŭ ol Esperanto fariĝos 100-jara, ni denove disponas pri detala informlibro pri la unuaj 45 jaroj de ĝia vivo. Kaj eĉ en pli oportuna formato, ĉar ĉiuj 600 paĝoj de la duvoluma unua eldono nun troviĝas en unu volumo kaj la bindaĵo de tiu unu volumo estas pli fortika ol tiuj de la originalaj du volumoj.

Grandan parton de la Enciklopedio okupas tri temoj: biografioj de ĉ. 1500 homoj, kiuj faris memorindaĵojn por Esperanto, detaloj pri ĉ. 450 gravaj libroj, gazetoj kaj revuoj, kaj historioj de la disvastiĝo de Esperanto en la plej gravaj landoj. Tiu de Hungario, ekzemple, okupas 6 paĝojn kaj duonon.

Multaj paĝoj estas dediĉitaj al la vivo kaj verkoj de Zamenhof kaj al liaj familianoj.

Ĉio estas facile konsultebla per alfabeta listo de la familiaj nomoj de la homoj, la titoloj de la eldonaĵoj, kaj la nomoj de la landoj.

Sed pli multo troviĝas en la verko. Ne nur detaloj pri eldonejoj kaj presejoj, kie naskiĝis nia literaturo, kaj bibliotekoj, kiuj donas al ĝi daŭran hejmon, sed ankaŭ informo pri la strukturo de Esperanto, ĝia disvastigo kaj ĝia uzado por komercaj, radioprogramaj, turismaj, sciencaj, politikaj, religiaj kaj aliaj celoj, inkluzive de filatelo, korespondado kaj sporto.

Aliaj memorindaj artikoloj estas tiuj pri instrumetodoj, stenografiaj sistemoj uzitaj de esperantistoj, internaciaj geedziĝoj, blindaj esperantistoj, malsukcesintaj internacilingvaj projektoj, jarlibroj, adresaroj, kongresoj, grupoj, insignoj kaj aliaj informiloj pri nia lingvo. Specialan atenton ricevis la marksismaj vidpunktoj pri universala kaj internacia lingvo, la laborista movado, la opinioj de la Komunista Internacio pri Esperanto, la proleta esperantistaro kaj revoluciaj Esperanto-verkistoj.

La ĉirkaŭ 25 tre interesaj prilingvaj artikoloj verkitaj de Kalocsay estas ankoraŭ aktualaj, ekzemple, pri la uzo de la artikolo „la", la prepozicio „da', duoblaj literoj, neologismoj, pasivaj participoj, neoficialaj sufiksoj, verboj transiraj kaj netransiraj, elparolo, rimo, ritmo, la principo de neceso kaj sufiĉo, vortfarado, vortordo, kaj Raymond Schwartz.

Kalocsay estis nur unu el pli ol cent konataj esperantistoj, kiuj kunlaboris aŭ verkis artikolojn por la Enciklopedio. Ĉi tie mi menciu nur Julion Baghy, Pál Balkányi, Miklós Bánó, Imre Baranyai, Ferenc Csutak, László Halka, György Karczag, József Mihalik, Ferenc Szilágyi, József Takács kaj Lajos Tárkony.

Ĉio estas verkita en perfekta simpla stilo, kiu vekas la intereson de la leganto kaj tenas ĝin. Kelkaj nacilingvaj enciklopedioj estas nur kolektoj de malnovaj sekaj ostoj, sed la *Enciklopedio de Esperanto* vivas kaj ĝi vigligas la leganton. Li povas nur admiri kaj firme decidi daŭrigi la kuraĝajn penegojn de niaj pioniroj.

Edward Ockey

„Stefeta" distrilo

Stefan MacGill: Streĉ' eĉ, Steĉjskeĉ'!
Antwerpeno, 1986. Eldonis Stefeto.
88 paĝoj, ilus. Prezo: 9,30 gld. Por Hungario: 50 forintoj.

Jen la plej nova libro de la populara aŭtoro kaj talenta skeĉisto, kiu ekde multaj jaroj amuzas la partoprenantojn de Universalaj Kongresoj kaj aliaj internaciaj kunvenoj kun multe da sukceso. Lia celo estas „konstrui unikan Esperantan humuron, kiu estu pli ol la t.n. universala humuro, kaj certe pli ol nacia."

Ĉu eblas „konstrui" humuron?

Kiel? Kaj kiatipan? Kiel humurfabrikisto li uzas diversajn metodojn, procedmanierojn kaj materialojn por produkti altnivelan ridindaĵon al sia internacia publiko. La plej brila el ili estas la lingva humuro. Li kapablas senlace kaj senfine ludadi per vortoj, kaj mirigi nin per siaj novaj kaj antaŭe neimageblaj vortkreaĵoj, atestante la neelĉerpeblan riĉecon de nia komuna lingvo. Per akraj okuloj li ekvidas ĉiujn eblecojn por ĵonglado. En la skeĉo „Semantika Inflacio", ekzemple, li eksperimentas per ciferoj, konstruante tekston amuzan plenplene da vortoj, kiuj enhavas ian numeralon (OKuloj, konDUkisto, penTRI, ktp.). En „Vi kaj Ci" li same ludas per pronomoj. Liaj vortludoj bezonas sufiĉe altkvalitan lingvoscion, aŭ bonan vortaron, kaj por legantoj de la pli frenezigaj enigmo-pecoj eĉ sanan nervosistemon.

La aliaj teritorioj ridindigitaj estas la Esperanta movado kaj la plej nervoziga politika afero de nia mondo: la armado. Kiel pacamanto kaj denaska esperantisto li montras la senfruktajn akademiajn kaj politikajn diskutojn en kurba spegulo. Se vi estas sufiĉe bone informita en la ĝangalo de movadaj aferoj, ĉefe tiuj de TEJO, vi tutcerte tre ĝuos la skeĉon „Statuta futbalo", subtitolita „Irita komitat-debat-konkluda aplikado... de dinamika pilkluda bato-arto-taktiko", kiu anagrama subtitolo donas al vi klaran ideon pri la vort-ĵonglado trovebla en la skeĉo mem. La volumo enhavas du pecojn, kiuj estas bazitaj sur situacia komiko, kaj kiuj jam montras en la direkton de la absurdo. Unu estas „Hotelĉambro", telefon-monologo de kompatinda gasto de hotelo senfenestra, senbanĉambra, kiu vane luktas solvi sian senesperan situacion... La alia, „Tradukado Paralela", estos certe alte taksata far la parolantoj de la angla lingvo, ĉar ĝi prezentas ne tro efikan interpretadon inter la du lingvoj. Ĉi tie ni devas rimarki, ke kontraŭ lia intenco krei internacian humuron, la aŭtoro tamen havas anglecan humur-senton, kiu fakto estas tute natura.

Fine ni povas konstati, ke ĉi tiu multflanka eldonaĵo estas rekomendebla ne nur por amuzado, sed ankaŭ uzeblas kiel interesa rimedo por lingvo-lernado kaj instruado.

Ildikó Király

Instigilo

Baza Literatura Krestomatio. Redaktis: Vilmos Benczik. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1986; 282 paĝoj; formato: 120x185 mm; prezo: 13,80 guldenoj.

Jam la duan fojon ĉi tiu literatura krestomatio travivis sian renaskiĝon. 1979 oni presigis 3500 ekzemplerojn de tiu libro, en 1982 ankoraŭfoje la saman kvanton. Nun, en 1986, sekvis 2500 ekzempleroj. Entute, do, 9500 ekzempleroj! Tio estas konsiderinda kvanto por Esperanto-libro!

Kompare al la unua eldonaĵo nur ŝanĝiĝis la eksteraĵo de la libro. Ĝi ricevis alian grafikan aspekton — ĉu pli bonan estas demando de la persona gusto...! La interno de la libro restis kiel tiuj de la ambaŭ antaŭaj. Oni nur simple fotomekanike represis la paĝojn. Tio ŝparis monon, sed ne helpis pliboni gi la tuton. En mia ekzemplero la unuopaj paĝoj ricevis supre pli da libera marĝeno ol kutime — sed tiu marĝeno mankas je la suba parto. Kelkaj paĝoj estas pale presitaj — rezulto de la faksimila reeldono. Tio ĉi libroamikon eble povus ĝeni. Sed, kompreneble, ne influas la enhavon. Kaj ĉi tiu restis sammaniere, kiel jam en la pli fruaj eldonaĵoj. La leganto renkontas la verkojn de entute 58 Esperantaj aŭtoroj, de Zamenhof ĝis Lorjak, do, de la komenco ĝis la nuntempo; li/ŝi estas gvidata tra la Esperanta literaturo vivanta en ĉiuj anguloj de nia terglobo. Oni ankaŭ ricevas envidon en la Esperantan historion. Ekzemple fare de represo de la historia parolado de la iniciatoro de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof, antaŭ la delegitaro de la Unua Kongreso en Bulonjo-sur-Maro.

Ne mankas tiaj famaj aŭtoroj kiel Antoni Grabowski, Kabe (Kazimierz Bein), Edmond Privat, Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Raymond Schwartz, Hilda Dresen, William Auld, Marjorie Boulton, Baldur Ragnarsson — nur por surlistigi kelkajn. Iliajn verkojn oni povas ĝui kiel stimulon, kiel deserton. Oni ricevas apetiton pri pliaj verkoj de tiuj aŭtoroj. Kaj tio tute plenumas la celon de ĉi tiu libro: instigi al daŭrigo de la legado, konatigi al novbakitaj (kaj ne nur al tiaj!) esperantistoj la abundan trezoron de la esperantlingva literaturo. La kompilinto nur ofertas kvazaŭ aperitivon — la sekvontan menuon (diru: literaturon) la leganto mem elektu. Tiu ĉi metodo bone funkcias. Tamen, certe ne rilate al tiu speco de leganto, kiun sur paĝo 72 Julio Baghy priskribas:

„Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto,
estas mi esperantisto".

Joachim Schulze

Pli kompleta bildo Pri poeto

Hristo Botev: Elektita verkaro. Eldonis Sofia-Press, 1986. Tradukis Ivan Dobrev kaj Ivan Sarafov, redaktis Hristo Gorov. 19,5 cm., 84 paĝoj. Prezo: 30,- forintoj.

Antaŭparolo de Hristo Radevski enkondukas la libreton, kiu enhavas deksep poemojn kaj ok prozaĵojn de Hristo Botev, bulgara poeto kaj nacia heroo kiel batalinto por libero.

Tre estiminda estas la intenco pere de la Internacia Lingvo konigi verkaron de granduloj de ajna nacia literaturo, precipe, se temas pri malmultnombra popolo, kiel bulgaroj.

La parenceco de Botev kaj Petőfi jam estis plurfoje rekonata kaj menciita — reciproke flanke de hungaroj kaj bulgaroj —; nun tiu ĉi elekto ne nur pravigas tiun parencecon, sed bone kompletigas la ĝis nun konatan bildon pri Botev; kiun bildon liaj poeziaĵoj (jam parte konataj por esperantistoj) sugestis pri li. La elekto el la artikoloj aldonas ion al la bildo: krom poeto kaj liberbatalanto montras al ni la ĝisostan patrioton, ĵurnaliston, klasbatalanton kaj internaciiston. „Mi kredas je la unika komuna forto de homa gento sur la terglobo, kiu forto kreas bonon." — komenciĝas lia artikolo „La kredo de bulgara komunumo" — sed ĝi kvazaŭ estus „Kredo de homa komuno".

En la lastaj dek paĝoj sekvas klarigaj notoj, kiuj bone helpas ekkonon de la medio en kiu vivis kaj verkis Botev; la sociajn kaj historiajn cirkonstancojn. Lingvaĵo bona kaj en la poezia, kaj en la proza parto. Preseraro nur esceptokaze, forlaso de difinita artikolo nur kelkfoje, sed ne ĝene. Redaktado — eminenta; libro — rekomendida.

Márton Fejes

La bestoj instruas

*Anaseto kaj koketo * Fabeloj. Adaptis Hŭang Ĝjunŭan; 11. Ĉu Ĉŭan. — Pekino: Ĉina esperanto-eldonejo, 1985. — 28 p.; kol. il.; 18x16 cm. Prezo por Hungario:*

Porinfana literaturo kaj bildlibroj fontis

el popularaj bildstrioj instruaj, kiuj unue celis la plenkreskulojn. Kvankam abundis tiuj kun moraliga enhavo, estis ankaŭ edukaj, juraj, historiaj, sciencaj, ludaj kaj religiaj. Nur meze de la 17a jc ekestis la vera infanlibro. La granda pedagogo Jan Komenský metis la postulon, kiun respondu la porinfana libro: ĉio rakontata al la infanoj devas esti samtempe montrata.

Ĝuste tiajn librojn eldonas la ĉinaj esperantistoj. Speciale agrablaj estas iliaj bildlibroj destinitaj al etinfanoj. Unu el tiaj — taŭga por 3-6 jaraj infanoj — estas „Anaseto kaj koketo", kies tri rakontoj prezentas momentojn el la vivo de bestoj. Bestoj, kiuj kondutas kiel homoj.

La unua rakonto konatigas nin kun du amikoj, kies interhelpo ne lasas Anaseton malsati, alian fojon savas la dronantan Koketon. Tiu helpo aperas natura al iliaj karakteroj. „Brasiko kaj ĝia semo" prezentas kontrastajn agojn de la blanka kaj griza kunikletoj. Se la lasta, estante konsumanto, ne hontas plurfoje veni al la maljuna Kapro por brasiko; la unua, estante laborema, preferas preni semojn kaj mem kulturas brasikojn. Kaj la lasta rakonto „Malgranda Simio" bildigas la konatan proverbon: „kiu du leporojn pafas, neniun trafas".

Akceptante, ke la infanliteraturo primare celas eduki (ankaŭ eduki la estetikan koncepton), ni vidas, ke la nomita libreto plenumas la celon, al kiu servas la esprimivaj bildoj kaj klara teksto sen speciale altrudata moralo. Sed ĉu troviĝos tiom da edukotaj/plezuriĝontaj etuloj? Ja la denaska esperantismo, kvankam havanta sian propran historieton, dume ne havas videblan rolon en la Esperanta komunumo. Ankaŭ nesufiĉa densiĝo de la internaciaj kontaktoj ne permesas rapidan kreskon de tiu modesta nombro. Aliflanke, estas ankoraŭ frue paroli pri la Esperanta infanliteraturo, nun ni havas nur sporade eldonatajn infanlibrojn en Esperanto. Tial la libro, kia la recenzata, normale trafas la plenkreskulojn, ne la infanojn. Vere, la ĉinaj bestoj instruas, sed kiujn?...

Halina *Gorecka*

Inundo de sintenoj

István Nemere: La alta akvo. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1985; 129 paĝoj; formato: 140x200 mm; prezo: 15 guldenoj.

István Nemere — konata nekonato por mi. Mi zelotas pri li. Pri liaj romanoj. Kaj ĉi tiuj estas konataj al mi, la aŭtoron mi ne persone konas. Mi nur scias, ke Nemere kun konstanta reguleco, kvazaŭ oni povus ĝustigi la horloĝon laŭ li, naskadas esperantlingvajn romanojn. „Blinda birdo", „Sur kampo granita" ktp. devenis el lia plumo. Kaj ili jam trovis grandan rekonon inter la esperantista legantaro.

Nun surmerkatiĝis lia nova romano „La alta akvo". Temas pri la interrilatoj de tri ĉefrolantoj: la inĝeniero Valter Nogradi, ties edzino Izabela kaj Peter Orban, iama profesoro. La altiĝanta akvo, kaŭzita per akvobarajo, minacas la ermitejon de la profesoro kaj la rilatojn inter la trio. Nemere skribis romanon kun aktuala temo, pri naturprotektado kaj strebado de la socio plialtigi la industrian produktadon per kurento, kiun liveru la fortoj de la akvo. La akvon retenas granda digo. Sekve ĝi inundas la terenon kaj la pensojn, elvokas agadojn de la inĝeniero, Izabela kaj Peter, kiujn la leganto antaŭe ne povas prikalkuli.

Tiom sufiĉu pri la enhavo de la romano. Mi aldonu kelkajn ĝeneralajn pri Nemere, pri liaj stilrimedoj. Li fascine ludigas la vortojn, surpaperigas koncizajn frazojn, esprimas pensojn per malmultaj vortoj. Nemere elĉerpas preskaŭ ĉiujn eblecojn, donitajn fare de la Lingvo Internacia. Preskaŭ ĝis la limo de la farebleco li ĵonglas per vortoj. Li (kiel jam antaŭ li ankaŭ aliaj aŭtoroj) eluzas la vortkonstruadon, kreas kunmetitaĵojn malofte legitajn Sed, li ankaŭ kunmetas prepoziciojn en nekutima maniero: „desur", „desub"... ĉu vere nekutimaĵoj? „Depost" jam delonge kaŝe penetris en Esperanton. Nemere nun nur logike sekvas al tiu tendenco. Ĉu bona tendenco aŭ ne? Mi nek havas la kuraĝon nek la kompetentecon priĵuĝi tion. Certe estus tasko por la Akademio de Esperanto doni klarajn respondojn (kaj ne nur pri tiu relativa malgravaĵo!).

Nemere majstras nian lingvon. Li emas perfekte mallongigi la frazojn. Ekzemplo montru per kio li atingas tion: „Ne tuŝante permane la bariereton li iras supren". La hungara aŭtoro eluzas la eblecon de la adverbigado — aparta donaco por esperantlingva verkisto! Nemere akceptas danke tiun ĉi donacon. Kaj la legantaro certe lian novan romanon, kiu ne estu lia lasta!

Joachim Schulze

Proletaj poetoj

Canko Murgin: Esperanto-poetoj de Bulgario.
Eldonis: Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1985. 66 p. 20x14 cm. Prezo: 0,60 lev.

Ekster Bulgario malmultaj homoj scias, kial la proporcio de esperantistoj en Bulgario estas pli alta ol en aliaj landoj. Unu el la kaŭzoj certe estis la politika lukto de multaj bulgaraj esperantistoj por liberigi sian popolon kaj perfektigi sian socion.

Inter la luktantoj estis multaj studentoj, kiuj per poemoj esprimis siajn dezirojn por liberiĝo kaj progreso. El la iamaj studentoj pluraj daŭrigis sian poezian verkadon eĉ ĝis hodia-. Ĉi-jare Bulgara Esperantista Asocio intencas aperigi kolekton de iliaj poemoj, sed unue venis ĉi tiuj kritikaj studoj de Canko Murgin pri a plej gravaj el ili.

La honoro verki la unuan Esperanto-poemon en Bulgario apartenas al Ĥristo Trikjakin (1890-1964), kies poemo estis verkita en Veliko Tarnovo en 1904 kaj presita en la gazeto *Lumo* en 1906. Rivalis lin Ĥristo Rjaĥovski (1881-1933), socialdemokrata studento pri juro, eksigita el la Universitato de Sofio pro sia revoluciema politikado, kies poemoj unue aperis en la bulgara *Unua Paŝo* en 1906.

El la dudek poemoj verkitaj de bulgaroj antaŭ la unua mondmilito duono apartenis al Petro Jordanov (1884-1952), bibliotekisto kaj poste advokato en Sofio.

En 1922 Dimitro Slatarski, vilaĝa instruisto apud Varno, komencis traduki kaj verki (ofte pseŭdonime) poezion en Esperanto, el kiu 70 % havis revoluciajn temojn.

Asen Grigorov (1903-1985), poŝtoficisto, komencis verki poemojn en Esperanto en 1924. Ĝis 1927 liaj poemoj estis pesimismaj, sed post tiu jaro ili estis kontraŭfaŝismaj, pacdefendaj kaj optimismaj spite tion, ke li estis kondamnita pro siaj politikaj principoj al trijara malliberiĝo en 1941. Liaj verkoj devis kompreneble dum longa tempo aperi pseŭdonime.

Ĥristo Gorov, sindikata aktivulo, ekverkis siajn poemojn en 1928, kiam li estis 20-jara. Ili ofte temas pri laboristaj herooj de la historio.

Violin Oljanov, ĵurnalisto, dediĉis sian unuan poemon al la Esperantista Societo „Albatr(os)o" tuj post bombatakoj kontraŭ ties klubejo en Varno en 1936, kiam li estis apenaŭ 17-jara kaj ĵus eksigita el gimnazio pro kontraŭfaŝista agado. Por homaj rajtoj kaj pri Esperanto, montoj kaj la naturo temis liaj postaj poemoj.

Multe pli ol bibliografia konsultlibro kun datoj, pseŭdonimoj kaj poemtitoloj, *Esperanto-poetoj de Bulgario* enhavas en simpla Esperanto interesajn detalojn pri la vivoj kaj meritoj de la poemverkintoj.

Edward Ockey

Bernard Golden

Finnugristoj-Esperantistoj

La Finnugra Societo, kiu estas nur kvar jarojn pli aĝa ol Esperanto, festis sian 100-jaran datrevenon en 1983. En sia sidejo en Helsinki, la Societo eldonas *Suomalais-Ugrilaisen Seuran Aikakauskirja* (Revuo de la Finnugra Societo). Ĝi estas internacie prestiĝa fakperiodaĵo dediĉita al la lingvistiko, filologio kaj parencaj kulturhistoriaj studbranĉoj pri la popoloj parolantaj lingvojn apartenantajn al la vasta finnugra familio; inter la plej gravaj estas la hungara, finna, estona, lapona, samojeda kaj vogula. La 73-a volumo de la revuo, eldonita en 1974, enhavas liston de ĉiuj funkciuloj kaj anoj de la Societo ekde ĝia fondiĝo ĝis la nuntempo. Pro scivolemo mi ĵetis rigardon sur kelkajn paĝojn, kie svarmis nomoj de kleruloj el pluraj mondpartoj, kaj miaj okuloj subite haltis ĉe la komenciĝo de la listo de honoraj membroj. La unuaj tri laŭ aboco-vicordo estis Paul Ariste, Géza Bárczi kaj Björn Collinder! Opiniante, ke mi eble mislegis la nomojn, mi relegis ilin. Jes, ne estis dubo, tiel ili estis presitaj – unu estono, unu hungaro kaj unu svedo – ĉiuj tri konataj al mi, ne kiel finnugristoj sed kiel esperantistoj. Nun mi fariĝis eĉ pli scivola kaj demandis min: ĉu estas nura koincido, ke tri eminentaj verdstelanoj, kiuj en la profesia vivo okupiĝas pri finnugraj lingvoj, troviĝas kune en la sama fakorganizaĵo, kaj plue kiel honoraj membroj? ^u estos eble trovi nomojn de aliaj lingvoscienculoj kaj etnografoj, esplorantaj sur la sama tereno, kiuj interesiĝas ankaŭ pri la internacilingva demando? Ne vane mi zorge tralegis la tridek-kelkajn paĝojn konsistigantajn la membrohistorion de la Societo; mi sukcesis rikolti almenaŭ 14 nomojn de diversnaciaj doktuloj pri la finnugristiko, kiuj iel havas rilaton kun Esperanto aŭ la interlingvistiko ĝenerale.

Aktiva esperantisto en kaj ekster Finnlando estis Gustav John Ramstedt, specialisto pri la altaja lingvistiko. Ĉar mi jam detale rakontis pri li aliloke[1, 2], mi ne donos pli da detaloj tie ĉi. Ankaŭ bone konata al finnugristoj kaj esperantistoj estas Emil Nestor Setala, la patro de la moderna finnugristiko; lian karieron kiel lingvisto kaj subtenanto de Esperanto en Finnlando mi priskribis en alia publikigita artikolo[3]. Tria finna klerulo, kiu ludis gravan rolon en la Finnugra Societo, estis Paavo Ilmari Ravila (1902-1974). Li estis vicprezidanto kaj prezidanto de la Societo, profesoro kaj rektoro de la Universitato de Helsinki kaj membro de la Akademio de la Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-jaro. Dum Zamenhof-festo en la Universitato de Helsinki, li prezentis prelegon kun la titolo „Pri la mondlingva problemo". Li ankaŭ subskribis individue la Proponon de UEA pri la disvastigo de Esperanto, kiu estis transdonita al la Unuiĝintaj Nacioj en 1966.

Ankoraŭ unu el la honoraj membroj de la Finnugra Societo estis Karl Bernhard Wiklund (mortis en 1934), profesoro ĉe la Universitato de Uppsala kaj samtempulo de E. N. Setala kaj G. J. Ramstedt. Li specialistiĝis pri la lapona lingvo kaj verkis, krom fakaj artikoloj, fonetikan analizon de tiu lingvo kaj ankaŭ vortaron. Li estis la instruisto de Björn Collinder. Jen kiel li spertis la utilon de Esperanto. Antaŭ 87 jaroj, en 1900, Paul Nylén, unu el la pioniroj de la sveda Esperanto-movado kaj la redaktoro de la tiutempe plej grava internacia Esperanto-gazeto, *Lingvo Internacia*, aperigis la sekvan informon.

– Nur Esperanto helpis! La docento de Finna-Ugra lingvistiko en la universitato Uppsala, d-ro K. B. Wiklund, kondukas en tiu ĉi aŭtuno kurson de hungara lingvo en la universitato. En la komenco de oktobro li, dum interparolo kun la redaktoro de L. I., okaze esprimis sian bedaŭron pri la malfacilaĵoj akiri konvenan hungaran literaturon por sia kurso: li skribis kelke de leteroj en hungara, en germana kaj en franca lingvoj al hungaraj librovendistoj, sed ankoraŭ post duonjaro liaj skriboj donis nenian rezultaton. „Ho, nenio estas pli simpla", respondis la redaktoro, „per la helpo de Esperanto mi tuj venigos al vi librojn, kiujn vi deziras." Dirite, farite. Post kelke da tagoj li ricevis el Szegzárd (tiele!) tion, kion li bezonis. Al siaj lernantoj li poste rakontis la aventuron kaj havis la bonvolecon speciale rekomendi la lingvon Esperanto, kiu nun helpis lin[4].

Kiu konas la historion de la hungara Esperanto-movado, certe facile divenos la nomon de la helpena samideano el Szekszárd, kiu sendis al la sveda finnugristo la publikigaĵojn, kiujn li bezonis; li estis la presisto Paŭlo Lengyel.

Aparte interesa por finnaj esperantistoj estas la agado de unu el la plej eminentaj hungaraj membroj de la Finnugra Societo. Li estis Béla Vikár (1859-1945), etnografo, etnomuzikologo, tradukisto kaj membro de la Hungara Scienca Akademio, kiu en 1909 faris la unuan tradukon de *Kalevala* en la hungaran lingvon. En 1888 li komencis lerni la gruzan lingvon kun la celo hungarigi la faman epopeon de la 12-a jc., „La Tigrofela Kavaliro", verkitan de Ŝota Rustaveli. Li ne povis plenumi tiun taskon pro lingvaj malfacilaĵoj, ĉar estis granda diferenco inter la moderna kaj antikva gruzaj lingvoj. Preskaŭ du jardekojn poste, Béla Vikár renkontiĝis kun la budapeŝta esperantisto-prelato d-ro Sándor Giesswein kaj informis lin pri la problemo rilate tradukon de la majstroverko de la gruza literaturo. Li klarigis, ke provo akiri helpon de gruza poeto pere de la hungara konsulejo en Tifliso fiaskis. Giesswein informis Vikár pri Esperanto kaj proponis kontakti la Esperanto-socieon en tiu urbo. Lia klopodo sukcesis, kaj venis al Hungario la gruza poeto kaj literaturisto – kaj esperantisto! – Ciklaŭri. Vikár estis lerninta Esperanton, kaj la du kleruloj, helpe de la Internacia Lingvo Esperanto, pasigis duonjaron kune por finfari la tradukaĵon, kiu estis publikigita en 1912.

Okaze de la 110-a datreveno de la naskiĝo de Béla Vikár, estis aranĝita memorfesto en Kaposvár, kiun ĉeestis ankaŭ du finnaj profesoroj, Au-Kõnni Erkki kaj Vainõ Kaukonen. Parolis dum la kunsido ankaŭ Károly Kazimir, la ĉefreĝisoro, kiu surscenigis *Kalevala* en Hungario. Mi ne scias, ĉu Béla Vikár verkis originale en Esperanto, sed du liaj hungarlingvaj poemoj titolitaj „Eszperantó" estis publikigitaj en 1929 kaj 1931 respektive.

Inter la membroj de la Finnugra Societo estas ankaŭ lingvistoj, kiuj estas kontraŭ Esperanto aŭ kiuj okupiĝas pri aliaj planlingvaj projektoj. Tio estas temo por aparta artikolo.

Notoj

1. Bernard GOLDEN. G.J. Ramstedt (1873-1950): pionira esploristo pri la korea lingvo kaj esperantisto. *La Espero el Koreujo*. 1983; 8 (5 [56]): 6-7.
2. Bernard GOLDEN. Verda Stelo super Mongolio – G.J. Ramstedt. *Esperanto en Skotlando*. 1985; 137: 14-16.
3. Bernard GOLDEN. Finnugristo-Esperantisto: Emil Nestor Setala (1864-1935). *Kulturaj Kajeroj*. 1980; 2: 8-9.
4. Jan STRÖNNE (redaktoro). *Duona jarcento de Esperanto kune kun Paul Nylén*. Stockholm; 1942. 63 pĝ. Vd. pĝ. 12.

GAJA PAĜO

Pretendemo

- Kelnero! Alportu menuon por mi. Ho! La supo estu varmega! La viandon mi petas sengrase, kaj aparte la legomaĵojn. Nu, la saŭco estu varma, la melonon surŝutu per fridigita kremo...
- Komprenite, sinjoro. Kaj kian dentoŝkrapilon vi deziras? – ĝentilas la kelnero. – Ĉu barokan, rokoko aŭ modernstilan?

Sincero

Gasto: Kiu estas via plej freŝa fiŝaĵo?
Kelnero (kliniĝante sufloras): La olea sardino, sinjoro!

Hungara kutimo

- Karulo, mia amikino Piroŝka rekomendis viziti foje ĉinan restoracion, ĉu bone?
- Volonte, karulinjo, se ili kuiros bongustan gulaŝon...

Drinkeje 1.

- Kelnero! Bonvolu porti unu bieron!
- Ĉu glason, sinjoro, aŭ kruĉon?
- Barelon! Mi ne volas ĉiuminute ree mendi.

Drinkeje 2.

- Grandioze, mia Rozinjo! En la drinkejo la vino iĝis pli malkara je dek procentoj.
- Feliĉe! Do vi ŝparis dek procentojn...
- Kion vi pensas? Tiom pli mi trinkis!

Aŭguro?

- Grandioza feliĉo atendas min – ŝi rakontas al amikino. – Tion aŭguristino vidis en mia manplato!
- Aŭguri el manplato, ha! Primitiva kaj stulta metodo. Turnu vin alifoje al kafrestaĵo!

Feliĉulo

- Mia aĉa memoro iĝis mem oro por mi! Mi tute forgesis, ke mi iĝis iam edzo de mia Sara. Sekve, dum dekjaro mi vivis kun la ekcita amatino kaj ne kun la edzino Sara!

Bona grupano

- Pardonu samideano, vi ŝuldas ankoraŭ al nia grupo kotizon.
- Estas pardonite, samideano!

Rano kaj cikonio

- Tamen, tamen, mia karega... – ĝemas la junulo. – Ne estu tiel malvarma kiel rano...
- Nu, rano mi certe ne estas – sonas ŝia respondo. – Tamen mi timas la cikonion!

In-verse

- Tiu malĝentila Vilĉjo daŭre incitas min – plendas Laŭra.
- Sed mi konas lin milda kaj afabla! – miras amikino.
- Tiu sovaĝulo, ĉu? Imagu, li deklaris sin tiel bonkonduta, ke mi ne devos timi eĉ brakumon de li. Kaj la obstina knabo eĉ ne kisas min!

Ĉu novaĵo?

- Ĉu estas io nova, olda amiko?
- Ho, jes. Mia edzino kokris min...
- Nu, vi jam aŭdas malbone. Mi demandis pri io nova!

Vivu la muziko!

- Miajn plej belajn plezurojn mi dankas al Beethoven kaj Mozart!
- Vi certe ofte vizitas la koncertejojn?
- Por diri sincere: ne mi, sed la gepatroj de mia amikino...

Vivu la ludado!

- Brava avo vi estas, najbaro! Certe, vi plezure rigardas vian nepineton sur la ludplaco?
- Tute ne! Sed mi esperas konatiĝi kun iu dudekjara patrineto...

Dekoltaĵoj

- Estante tajloro, ĉu vi klarigus al mi, kial kreskas nuntempe la virina dekoltaĵo?
- Nenio pli simplas! Junulinoj pere de ĝi volas gajni edzon. Kvankam ne-jam-junulinoj pere de ĝi gajnas kutime gripon...

Ervin *Fenyvesi*

HUNGARA LITERATURO EN ESPERANTO

Sep titolojn vi trovos en la ĉeflinioj de nia enigmo, tiujn de hungaraj verkoj en Esperanto (ensendendaj linioj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

HORIZONTALE: *1. Romano de Géza Gárdonyi, tr. Hamvai*, 14. Kun „o" vira, kun „a" virina nomo, 15. Ekskluziva memamo, malaltruismo, 16. Identaj konsonantoj, 17. Pli malfruaj, 18. Frapi por tranĉi, 19. Reen: interjekcio por peti ripeton, 20. Kotonon, 21. Ne pieda, 22. Piktogramo indikanta direkton, 23. Vortfino en internaciaj teknikaj esprimoj, pseŭdosufikso por komplika aparaton, 24. Koncerna pagilon, 25. Akre morda, moka verko (R), 26. Vin kaj min, 27. Arto de kinematografio, 28. Koncerna ĉefurbon de Kubo, 29. Ano de kelta gento en Malgranda Azio (R), 31. Ekstremflanka, 33. Pafileg' 34. Konjunkcio uzata post komparativo, *35. Romano de József Darvas, tr. Somlai*, 37. Fil', 38. Moviĝis fluidaĵo, 41. Samspecaj de kubuto, 42. Flama, 44. Sciigi okazintaĵon (R), 45. Returnire, 46. Ŝafharar', 47. Ĉefurbo de Jordanio, 48. Blasfemi (R) 49. Frapo de H. 18., 50. Premforto pro la tera altiro, 51. Interne malplena, 52. Trioble ses, 53. Frakcio, 54. Virina nomo, 55. Li peras (R), 56. Julian Tuwim, 57. Pure ideala (ekz. amo), 59. Rumania rivero, *60. Kolektaĵo de porinfanaj poemoj, 61. Bestromano de István Fekete.*

VERTIKALE: *1. Amuza romano de Aszlányi, tr. Somlai*, 2. Zagreba, 3. Serion da nomoj, 4. Teatristo (R), 5. Ĝeme plendan, 6. Otto Ginsberg, *7. Fabelpoemo de Petőfi, tr. Kalocsay*, 8. Latina diino de ĉasado, 9. Neoficiala adjektiva sufikso, 10. Romiaj ciferoj: 500 kaj 1001, 11. Tabelvorto, 12. Deveno, *13. Librotitolo de elektitaj poemoj de Attila József*, 19. Anoj de SAT, 21. Reĝo, imperiestro (R), 22. Tropikan ebenaĵon, 24. Mitologia, 25. Ujo el teksaĵo (R), 27. ^arĝaŭtomobilo, 30. La cara edikto, 32. Apoteko ruslingve, 36. Temo de proceso (R), 39. Larme plendu!, 40. Sulfuro, nitrogeno, oksigeno, 43. Informu pri la okazintaĵo!, 46. La senharul', 48. Sankta – en pluraj lingvoj, 49. Ekzemple Gilgameŝ, 51. Virseksa infano (R), 52. Kara – angle, 54. Kordinstrumento (R), 55. Fosforo kaj natrio, 57. Paul Nylén, 58. Reen: la lasta litero.

I.Z.



Solvo de la krucenigmo en la numero 1986/6:

Ĝin kovras blua ond' ĉiela,
sub ĝi lazuras onda spac'.
Sed ŝtormon serĉas ĝi ribela,
kvazaŭ en ŝtormoj estus pac'.

(Lermontov, trad. Gusev)

Premion gajnis per lotumado: M.A. Belegolovskij, Doneck, SU; Karlo Benkő, Debrecen, H; Josef Cink, Červená Voda, CS.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Baza legolibro por komencantoj
redaktita de
Vilmos Benczik

1. Per kiom da radikoj estas verkitaj la unuaj dektri legaĵoj?
2. Kiu estas la aŭtoro de „Novajn gepatrojn mi serĉas"?
3. De kie venas la nomo de urbo Jalta, laŭ Fjodor Georgievič Aleksandr?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1986/6:

1. En kvin variantoj aperis „Malsato", poemo de Attila József.
2. Lajos Tárkony tradukis la poemo „Saluto al Thomas Mann".
3. La poemo „Ĉe Danubo" komenciĝas per la citita verso.

Premion gajnis per lotumado: Adolf *Staňura*, Havířov, CS; *Takács* István, Marcali, H. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:
En la n-ro 1987/5: Serĉu mian sonĝon de István Nemere.

Leterkesto

Rafat SKALINSKI, Torun, PL: Via kono estis ĝusta. La interesa – kvankam diskutebla – libro „Senlegenda biografio de Zamenhof" estas verkita de Ito Kanzi kaj eldonita en Japanio. Ĝi estas havebla ankaŭ ĉe la libroservo de UEA.

Vladimir BELAJEV, Essentuki, SU: Ankaŭ ni delonge deziras havi glumarkojn kun E-movadaj sloganoj. Ni devas do beda-ri, ke verŝajne pro teknikaj komplikaĵoj (eventuale ankaŭ pro malkonvenaj kostoj) ne troviĝas eldonejo por ili. Kion fari? Eble ni trankviligu nin rekonante, ke amika kaj bonvena korespondado estas ja senprobleme farebla sen ili, do glu-manke... Koncerne nian rubrikon, kiu publikas la korespond-dezirojn, vi certe rimarkis la provon vicigi ilin laŭ la konkretaj deziroj, interesiĝoj kaj profesioj, resp. aĝoj. Tiuj ŝajnas al ni pli gravaj vidpunktoj ol la landoj. Ilin cetere klare signas la konataj (aŭ facile ekkoneblaj) internaciaj landosignoj por veturiloj, kiujn ni uzas jen ankaŭ en ĉi tiu rubriko).

S-ino Denise JORQUET, Marseille, F: Ni transdonis vian dankindan gratulon por la aŭtoroj de „Kamionista aventuro" kaj Kongresa raporto el Pekino, kiun ili certe meritis pro la sprita kaj trafa rakontado. Dumtempe jam pasis la tempo – ĝia kutimo, ĉu ne? – kaj kiam vi legos ĉi tiun respondon, verŝajne jam pasos la jubilea kongreso en Varsovio, kaj niaj redakcianoj jam denove konceptos la raporton pri tiu tre grava movada kunveno, precize 100 jarojn post la apero de nia bela kaj interliga Esperanto.

Korespondi deziras

Elizabeta *Krawiec* (33) instruistino de matematiko, int. pri muziko, turismo, literaturo, kantas pasie, kol. „elefantojn, alportantajn feliĉon". SZCZECIN, Uzorowiskowa 2, PL-70-885. – Darius *Jach* (26) fraŭlo kun hungara junulino. Int. pri muziko, sportoj, turismo. Ĉiujn alskribojn respondos. LÓDZ, Kasprzaka 60 m 11, PL-91-078. – S-ro *Gombos* Tamás (22) ktm, pri multaj temoj, ZALAEGERSZEG, Átalszegett u. 11. H-8900. – Svetlana *Rakitina* (24) ekonomiistino, pri sporto, arto, literaturo, E-movado, vojaĝoj k.a. MOSKVO, Saratovskaja 1-1-77, SU-109.518. – Inĝ. Vladimir *Drobjarko* (28) fraŭlo, pri senalkoholaj kokteloj, konfitaĵoj, kol. bk, ktm. KIEV, pr. 40-let Oktabrja 122, 2-28. SU-252.127. – S-ino Gabriela *Baiverlin* (24) pri vojaĝoj, pentrado k.a. SOUMAGNE, 22 rue Wergifosse, B-4634, Belgio. – Lernanto Zbigniew *Pszczolkowski* (17) por praktiki lingvon, pri filatelo, sporto, literaturo. WEGRA, Olszewiec, PL-06-412. – Inĝ. Marek *Migurski* (54) energiisto, speciale pri antikva historio, arĥeologio, kaj turismo. GLIWICE, ul. Czajki 21/12, PL-44-114. – F-ino Eglé *Trinkutė* (18) int. pri lingvoj, matematiko, vojaĝoj k.a. JONAVA, Žeimiu takas 6-22, Litovio SU-235.000. – Inĝ. Algirdas MAŽUIKA (47) kun diverslandaj amikoj. Kol. bk de pentraĵoj. ŠIAULIAI, Žalgirio 6-5, Litovio SU-235.408. –

E-klubo JUNA KORO petas sendi E-lingvajn bk por ekspozicio kaj septembra letervespero propaganda. ZALAEGERSZEG, Pf. 263, H-8900. – Vladimir *Belajev* instruisto de E en aŭkazaj urboj, ktm, pĉt, interŝ. div. aĵojn. Resp. garantiata. ESSENTUKI, ab.k. 29, SU-257.600. – F-ino Andra *ŽELTANTAITĖ* (20) ktm, pĉt. ŠIAULIAI-C, Novatorij 9, Litovio SU-235.400. – Anna *Balanik* (35) instuistino pĉt. LVOV, ul. Poĵarskogo 4/b/27. SU-290.012. – S-ro Ryszard *Pulawski* (30) aŭtobusŝoforo, ktm, int. pri fotado kaj aŭtoj. MUŔÓW ul. Lipowa 1/5, PL-46.030. – Rolandas *Stramkauskas* (21) studento de la franca, int. pri lingvoj (F, I, H, Eo) kaj basketbalo. VARÉNA, str. Mokyklos 24, Litovio SU-234.640. – Anatolio *Dovbiš* (42) invalido, pasia kolektanto kaj E-isto-korespondanto, interŝ. kalendaretoj, E-aĵoj, bk pri katoj, hundoj, filmsteloj. Registrite sendu! ŠOSTKA-7, Sumsk, pk. 27, Ukrainio, SU-245.110. – Instruistino Marija *Sirakova* (29) int. pri populkutimoj, nuna vivo. PLOVDIV, st. Malgara 2, BG-4004. – Studento Mieczyslaw *Szydlowski* (25) kun interesaj homoj pĉt. ZIELONA GORA, ul. Ogrodowa 5/4. PL-65-461. – F-ino Larisa *Mamoškina* (24) desegnisto, pri arto, sporto, literaturo, E-movado, vojaĝo k.a. MOSKVO, Simonovskij val 7-2-346. SU-109.044. – Gustavo C. *Morales*, pri movado, E-lernado, interŝ. bk. pm, revuoj. D-BEDRE GBUA, Randul 209, KUBO.

Lingva domeno!

Nova lingva ludilo por

*– **komencantoj,** kiuj povas per ĝi ekzerciĝi en la lingvo,*
*– por **spertaj esperantistoj,** kiuj elprovu per ĝi sian lingvan inventemon!*
Ludo, en kiu oni povas NUR GAJNI, riĉigante sian lingvoscion!

Oni mendu ĝin kontraŭ 15,- gld. (aŭ 98,-Ft) ĉe la Libroservo de HEA aŭ de UEA!



HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca aldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. • Por Hungario: 96,- Ft, al eksterlando por unu jaro 114,- forintoj. • Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1368) • Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704.

FABRIKO DE ELEKTROIZOLAĴOJ KAJ PLASTO

La Fabriko de Elektroizolaĵoj kaj Plasto liveras teknike altkvalitajn plastajn peĉojn – duonpretajn kaj pretajn produktojn – al la elektra, veturila, mebla kaj konstrua industrioj. La entrepreno, nun festinta la centenarion de sia fondiĝo antaŭ kvar jaroj, organizas kaj direktas la laboron de tri – grandparte memstaraj – fabrikoj.

VSZM

1883

Niaj ĉefaj produktoj:

Je varmo ŝrumpantaj plastaj tuboj „KONTRAKTEN"
Polipropilenaj kaj durgumaj akumulatorujoj
Plastaj tubetoj por elektraj dratoj, kaj aliaj artikloj por elektra muntado
Produktaĵoj bakelitaj kaj moliĝantaj je varmo

Budapest XI., Fehérvári út 120. 1116

Fondojaro: 1883.

ĈE LA OKCIDENTA PORDO DE HUNGARIO KORE SALUTAS KAJ BONVENIGAS VIN LA DOMMASTRO DE LA DEPARTEMENTO GYŐR-SOPRON:

ciklámen tourist

BELEGAJ MALNOVAJ ARKITEKTURAJ KREAĴOJ. UNIKAJ NATURBELAĴOJ. FAMA GASTRONOMIO.









VIZITU NIN, ESTU NIA GASTO!

El la sekvaj numeroj de „HUNGARA VIVO" Vi povos ĉerpi pli detalajn informojn pri la vidindaĵoj de nia departemento. Petu nian Esperantlingvan prospekton ce la sekva adreso:

CIKLAMEN TOURIST
H-9023 GYÖR. JÓKAI U. 12.
☎ 36/96-16-050
Tx: 24-616

1987 AUG 04